

G. Boeree · S. Davies

Gramatiko de
Lingua Franca Nova



Gramatiko de Elefeno

Literoj kaj prononco

Alfabeto

Elefeno uzas la plej bone konatan alfabeton en la mondo: la roman aŭ latinan.

- minuskloj
 - **a b c d e f g h i j l m n o p r s t u v x z**
- majuskloj
 - **A B C D E F G H I J L M N O P R S T U V X Z**

K (k), Q (q), W (w) kaj Y (y) ne aperas en ordinaraj vortoj. En ĉirkaŭ cent internaciaj vortoj de nelatina deveno oni povas skribi W anstataŭ U, kaj Y anstataŭ I, por havigi pli rekoneblan aspekton: **ioga/yoga, piniin/pinyin, sueter/sweter, ueb/web**. Krom en tiuj okazoj oni uzas K, Q, W kaj Y nur por konservi la originajn formojn de propraj nomoj kaj alilingvaj vortoj.

Ankaŭ H ne oftas, sed oni trovas ĝin en iuj fakaj kaj kulturaj terminoj.

Majuskloj

Oni uzas majusklon ĉe la komenco de la unua vorto en frazo.

Majusklojn oni uzas ankaŭ ĉe la komenco de propraj nomoj. Kiam propra nomo konsistas el pluraj vortoj, oni majuskligas ĉiun vorton – krom malgravaj vortoj kiel **la** kaj **de**:

- Homoj veraj aŭ imagaj, kaj ankaŭ personigitaj bestoj kaj aĵoj
 - **Maria, San Paulo, Barack Obama, Jan de Hartog, Seniora Braun, Oscar de la Renta, Mickey Mouse**
- Organizaĵoj, ekz. kompanioj, asocioj
 - **Ikea, Naciones Unida, Organiza Mundal de Sania**
- Politikaj regionoj, ekz. nacioj, ŝtatoj, urboj
 - **Frans, Atina, Site de New York, Statos Unida de America**
- Geografiaj lokoj, ekz. riveroj, oceanoj, lagoj, montoj
 - **la Alpes, Rio Amazon, Mar Atlantica**
- Literoj de la alfabeto
 - **E, N**

Sed kun titoloj de artaj kaj literaturaj verkoj, oni majuskligas nur la unuan vorton de la titolo (kune kun iuj propraj nomoj, kiuj ĉeestas):

- **Un sonia de un note de mediaestate** – Somermeznoĝka sonĝo
- **La frates Karamazov** – La fratoj Karamazov
- **Tocata e fuga en D minor** – Tokato kaj fugo en D minora

Foje, kiel en avertoj, oni uzas majusklojn por EMFAZI tutajn vortojn aŭ vortgrupojn.

Elefeno uzas minusklojn tie, kie iuj lingvoj uzas majusklojn:

- Semajntagoj
 - **lundi, jovedi** – lundo, ĵaŭdo
- Monatoj
 - **marto, novembre** – marto, novembro
- Festotagoj kaj similaj okazoj
 - **natal, ramadan, pascua** – Kristnasko, Ramadano, Pasko
- Jarcentoj
 - **la sentenio dudes-un** – la dudek-unua jarcento
- Lingvoj kaj popoloj
 - **catalan, xines** – la kataluna, la ĉina

Liternomoj

Parole oni uzas la jenajn silabojn por nomi literojn, ekz. kiam oni literumas vorton:

- **a be ce de e ef ge hax i je ka el em en o pe qua er es te u ve
wa ex ya ze**

Ĉi tiuj estas substantivoj kaj pluraligeblaj: **as, bes, efes**.

Skribe oni povas simple prezenti la literon mem, majuskle, eventuale aldonante **-s** por la pluralo:

- **La parola “matemática” ave tre As, du Ms** (prononco: **emes**), **e un E**. – La vorto “matemática” havas tri A-ojn, du M-ojn, kaj unu E.

Vokaloj

Oni prononcas la literojn A, E, I, O, kaj U kiel en la hispana aŭ la itala – fakte kiel en Esperanto:

A [a]	vasta antaŭa neronda	ambasada
E [e]	mezvasta antaŭa neronda	estende
I [i]	malvasta antaŭa neronda	ibridi
O [o]	mezvasta malantaŭa ronda	odorosa
U [u]	malvasta malantaŭa ronda	cultur

La vokalsonoj toleras iom da variado. Ekzemple, oni povas prononci A kiel [ɑ], E kiel [ɛ] o [ej], kaj O kiel [ɔ] o [ow] sen miskomprenigo.

Diftongoj

Kiam unu vokalo sekvas alian, kutime oni prononcas ilin aparte. Sed en kvar okazoj, kiam la dua vokalo estas I aŭ U, la du vokaloj formas diftongon:

AI [aj]	kiel AJ en Esperanto	pais
AU [aw]	kiel AŬ	auto
EU [ew]	kiel EŬ	euro
OI [oj]	kiel OJ	seluloide

Aldoni prefikson ne kreas diftongon: **reuni** [re-uni], **supraindise** [supra-indise]. Pro similaj kialoj, dusilaba prononco estas norma ankaŭ en kelkaj aliaj vortoj: **egoiste** [ego-iste], **proibi** [pro-ibi]. Tiajn vortojn oni indikas en la vortaro, ekz. “proibi (o-i)”.

La sinsekvo EI maloftas. Normale oni prononcas ĝin kiel du apartajn vokalojn: **ateiste** [ate-iste], **feida** [fe-ida], **reinventa** [re-inventa]. Sed se oni trovas tiun prononcon malfacila, oni povas diri [ej] aŭ eĉ [e] anstataŭe.

Kiam I aŭ U staras antaŭ alia vokalo, oni ĝin duonvokaligas – kiel J aŭ Ŭ en Esperanto – en la jenaj okazoj:

- Komence de vorto
 - **ioga** [joga], **ueste** [weste]
- Inter du aliaj vokaloj
 - **joia** [zoja], **ciui** [kiwi], **veia** [veja]
- LI, NI entre du aliaj vokaloj
 - **folia** [folja], **anio** [anjo] – sed ne en la unua silabo de vorto
- CU, GU antaŭ vokalo
 - **acua** [akwa], **cual** [kwal], **sangue** [sangwe]

En aliaj okazoj – ekz. **emosia**, **abitual**, **plia** – la I aŭ U restas plena vokalo.

Kvankam ĉi tiuj reguloj difinas la norman prononcon de diftongoj, oni povas ilin ignori sen konfuzo.

Konsonantoj

La jenaj literoj estas konsonantoj:

B [b]	kiel B en Esperanto	voĉa dulipa plozivo	bebe
--------------	---------------------	---------------------	-------------

C [k]	kiel K	senvoĉa vela plozivo	clica
D [d]	kiel D	voĉa denta/alveola plozivo	donada
F [f]	kiel F	senvoĉa lipdenta frikativo	fotografi
G [g]	kiel G	voĉa vela plozivo	garga
H [h]	kiel H, aŭ silenta	senvoĉa glota frikativo	haicu
J [ʒ]	kiel Ĵ	voĉa postalveola frikativo	jeolojia
L [l]	kiel L	voĉa denta/alveola laterala alproksimanto	lingual
M [m]	kiel M	voĉa dulipa nazalo	mesma
N [n]	kiel N	voĉa denta/alveola nazalo	negante
P [p]	kiel P	voĉa dulipa plozivo	paper
R [r]	kiel R	voĉa denta/alveola trilo	rubarbo
S [s]	kiel S	senvoĉa denta/alveola frikativo	sistemes
T [t]	kiel T	senvoĉa denta/alveola plozivo	tota
V [v]	kiel V	voĉa lipdenta frikativo	vivosa
X [ʃ]	kiel Ŝ	senvoĉa postalveola frikativo	xuxa
Z [z]	kiel Z	voĉa denta/alveola frikativo	zezea

Notu la jenajn aferojn:

- **C** sonas ĉiam kiel K, neniam kiel S aŭ la esperanta C.
- **F** sonas ĉiam kiel F, neniam kiel V.
- **G** sonas ĉiam kiel la esperanta G, neniam kiel Ĝ.
- **H** povas esti silenta, se parolanto preferas.
- **J** estas [ʒ] same kiel en la franca kaj la portugala: kiel la esperanta Ĵ.

- **N** antaŭ G aŭ C havas la sonon de NG [ŋ] en la angla: **longa, ance**. Silabofina NG, kiel en **bumerang** aŭ **gangster**, havas tiun saman sonon: la G silentas.
- **R** havas tiun vibran sonon, kiun ĝi havas en la hispana, la itala, kaj ofte en esperanto.
- **S** sonas ĉiam kiel S, neniam kiel Z.
- **V** havas neniam la sonon de B, malkiel en la hispana.
- **X** estas [ʃ] kiel Ŝ en esperanto.
- **Z** sonas ĉiam kiel Z.

Ĉar konsonantoj en iuj kombinoj aŭ lokoj estas malfacilaj por kelkaj parolantoj, Elefeno permesas la jenajn variantojn:

- **J**
 - Oni povas prononci J ankaŭ kiel Ĝ [dʒ], se oni preferas.
- **R**
 - Aliaj R-sonoj (kiel en la franca, la germana, aŭ la angla) estas akcepteblaj, se nur oni povas klare distingi ilin de la aliaj sonoj de Elefeno.
- **X**
 - Oni povas prononci ĝin ankaŭ kiel Ĉ [tʃ], se oni preferas.
- **Z**
 - Oni povas prononci ĝin ankaŭ kiel C [ts], kiel en la germana kaj la itala, se oni preferas.
- **haicu, bahamas**
 - Oni povas lasi la H silenta en prononco, se oni preferas: [aicu], [ba-amas].
- **blog, club**

- Kelkaj internaciaj vortoj finiĝas per nekutimaj konsonantoj. Por faciligi la prononcon oni povas aldoni finan E: [bloge], [klube].
- **spada, strada**
 - Iuj vortoj komenciĝas per S antaŭ konsonanto. Se tion oni trovas malfacila, oni povas aldoni komencan E: [espada], [estrada].
- **gnostica, psikolojia**
 - Kelkaj sciencaj vortoj komenciĝas per nekutimaj konsonantgrupoj, kiel ekzemple FT, GN, MN, PS, or PT. La unuan konsonanton oni povas lasi silenta: [nostika], [sikolojia].
- **ambargris, esflue, fortres, rontgen**
 - Kelkaj maloftaj vortoj enhavas pli komplikajn grupojn, kun tri konsonantoj aŭ pli. Se ili malfacilas, oni povas aldoni ŝvaon (neŭtralan vokalon) al la prononco: [ambarəgris], [esəflue], [forətres/fortəres], [rontəgen].

Fremdaj konsonantoj

Kiam la alilingvaj konsonantoj aperas en vorto, kutime oni prononcas ilin ĉi tiel:

K [k] kiel C

Q [k] kiel C

W [u] aŭ [w] kiel U

Y [i] aŭ [j] kiel I

Akcento

Se vorto havas pli ol unu vokalon, unu el la vokaloj havas akcenton (pli fortan prononcon). Ĉi-sube la akcentajn vokalojn indikas substreko.

La baza regulo estas, ke oni akcentu la vokalon antaŭ la lasta konsonanto de vorto:

- **falda**
- **integra**
- **matematika**
- **albatros**
- **ranur**

Post aldono de sufikso, la akcento povas moviĝi:

- **matematika → matematical**
- **radiograf → radiografia** (senŝanĝe)
- **radiograf → radiografiste**

Sed post aldono de la pluraliga **-s**, la akcento ne moviĝas:

- **un falda → du faldas**
- **un joven → tre jovenes**
- **ambos** – ĉi tiun specialan vorton oni akcentas kvazaŭ pluralon

La I aŭ U de diftongo kondukas kiel konsonanto ĉi-rilate:

- **abaia**

- **ciui**
- **bonsai**
- **cacau**

Se neni vokalo antaŭas la lastan konsonanton, oni akcentas la unuan vokalon:

- **trae**
- **fea**
- **tio**
- **proa**
- **jua**

Iuj vortoj havas pli ol unu vokalon post sia lasta konsonanto. Se la vokaloj estas IA, IE, IO, UA, UE, aŭ UO, oni akcentas ankoraŭ la vokalon antaŭ la konsonanto:

- **asentua**
- **jelosia**
- **rituo**
- **alio**

Sed kiam la finaj vokaloj estas AE, AO, EA, EO, OA, OE, aŭ UI, oni akcentas la unuan vokalon de la paro:

- **coneo**
- **idea**
- **sutrae**
- **produi**

(Sed en **estingui** kaj **vacui** la U estas duonvokalo laŭ [alia regulo](#).)

Oni ofte prononcas **ala, asi, agu, ami, enemi, perce, alo, oce** kaj **ura** akcentante la lastan vokalon kaj ne la unuan. Ambaŭ prononcoj estas akcepteblaj.

Kunmetitaj vortoj kiel **parario** kaj **mediadia** retenas la originan akcenton de sia dua elemento.

Elefeno ne estas tonlingvo: ĝi ne distingas vortojn per ŝanĝoj de la voĉalto. Tamen unu maniero por montri, ke frazo estas demando, estas fini ĝin per leviĝanta tono:

- **Tu parla portugez?** – kun leviĝanta tono en la fina vorto
- **Tu no parla portugez.** – kun tono ebena aŭ falanta

Fonotaktiko

La formojn de ordinaraj vortoj en Elefeno difinas iuj reguloj.

Du okazoj de la sama vokalo (kiel **aa**) ne povas apudi unu la alian, krom kie tio rezultas de prefiksado: “reenvia”, “coopera”. En tiaj okazoj oni prononcas ambaŭ vokalojn.

La sinesekvo **ou** ne normale akcepteblas.

Se sufikso kreus nevalidan vokalsinsekvon, oni eliminis la duan vokalon de la sinsekvo:

- **comedia + -iste** → (comediiste) → **comediste** – komediisto

Oni permesas nur la jenajn konsonantgrupojn komence de silabo:

- **pr-, br-, pl-, bl-**
- **tr-, dr-**
- **cr-, gr-, cl-, gl-**
- **fr-, vr-, fl-**
- **sl-**
- **sp-, st-, sc-**
- **sf-**
- **spr-, str-, scr-**
- **spl-, scl-**

Oni permesas nur la jenajn konsonantojn fine de silabo, kaj antaŭ ili devas stari vokalo:

- **-f, -s, -x**
- **-m, -n, -l, -r**

Vortmeza konsonantgrupo estas valida, se oni povas ĝin dividi inter du validaj silaboj:

- **encontrante = en-con-tran-te**
- **mostrabilia = mo-stra-bli-a**
- **instinto = in-stin-to**

Ĉi tiujn regulojn oni povas libere malobei ĉe propraj nomoj, kiel ankaŭ ĉe fakaj, internaciaj, aŭ kulturdependaj vortoj.

Frazoj

Plej multe da **frazoj** en Elefeno enhavas [verban vortgrupon](#), kiu prezentas ĝenerale la okazon de ago. Verba vortgrupo konsistas el verbo kaj eventualaj modifiloj kiel [adverboj](#) aŭ [prepoziciaj vortgrupoj](#).

Plej multe da frazoj enhavas ankaŭ almenaŭ unu [substantivan vortgrupon](#), kiu prezentas ĝenerale ulon aŭ aĵon. Substantiva vortgrupo konsistas el substantivo kaj eventualaj modifiloj kiel [difiniloj](#), [adjektivoj](#), kaj [prepoziciaj vortgrupoj](#).

Subjekto kaj objekto

La du plej gravaj substantivaj vortgrupoj estas la **subjekto** kaj la **objekto**. Ilia preciza signifo dependas de la elektita verbo, sed, se paroli nebulde, la subjekto estas tiu ulo aŭ aĵo, kiu faras la agon, kaj la objekto estas tiu ulo aŭ aĵo, kiun la ago rekte trafas.

En Elefeno, la subjekto ĉiam staras antaŭ la verbo, kaj la objekto ĉiam post:

- **La gato** xasa **la scural**. – La kato (*subjekto*) ... ĉasas (*verbo*) ... la sciuron (*objekto*).
- **La xica** gusta **la musica**. – La knabino (*subjekto*) ... ŝatas (*verbo*) ... la muzikon (*objekto*).
- **La can** dormi. – La hundo (*subjekto*) ... dormas (*verbo*).

Povas okazi, ke pro stilo aŭ klareco oni volas komenci la frazon per la objekto de la verbo. En tiaj okazoj, la objekton sekvu komo, kaj oni uzu ankaŭ pronomon por la objekto post la verbo:

- **La gatos**, me no gusta **los**. – Katojn mi ne ŝatas.

Plej multe da verboj bezonas subjekton, sed [multaj ne bezonas objekton](#).

Komplementoj

Alia ofta ero de frazo estas la **komplemento**. Tio estas kroma priskribo de la subjekto, kiu povas sekvi verbojn kiel **es** (esti), **deveni** (fariĝi), **pare** (ŝajni), kaj **resta** (resti):

- Computadores es **macinas**. – Komputiloj (subjekto) ... estas (verbo) ... maŝinoj (komplemento).
- La aira pare **umida**. – La aero (subjekto) ... ŝajnas (verbo) ... humida (komplemento).
- La comeda deveni **fria**. – La manĝaĵo (subjekto) ... devenas (verbo) ... malvarma (komplemento).
- La patatas ia resta **calda**. – La terpomoj (subjekto) ... restis (verbo) ... varmaj (komplemento).
- Nosa taxe es **reconstrui la mur**. – Nia tasko (subjekto) ... estas (verbo) ... rekonstrui la muron (komplemento: subfrazo).
- La idea es **ce tu canta**. – La ideo (subjekto) ... estas (verbo) ... ke vi kantas (komplemento: subfrazo).

Kelkaj lingvoj ebligas ankaŭ komplementojn de objektoj, kiel en “Mi trovas ĉi tiun fromaĝon *abomeninda*” aŭ “Ili elektis lin

prezidanto”. Ĉi tiu speco de komplemento ne ekzistas en Elefeno.

Prepozicioj

Alia grava ero de frazo estas la **prepozicia vortgrupo**, kiu aldonas detalon al antaŭa substantivo aŭ verbo, aŭ al la tuta frazo:

- La om ia cade **tra sua seja**. – La viro (subjekto) ... falis (verbo) ... tra sia seĝo (prepozicia vortgrupo).
- **En la note**, la stelas apare. – En la nokto (prepozicia vortgrupo) ... la steloj (subjekto) ... aperas (verbo).
- Me dona esta poma **a tu**. – Mi (subjekto) ... donas (verbo) ... ĉi tiun pomon (objekto) ... al vi (prepozicia vortgrupo).
- Tu no aspeta **como tua foto**. – Vi (subjekto) ... ne aspektas (verbo) ... kiel via foto (prepozicia vortgrupo).

Subfrazoj

Krom vortgrupoj, kelkaj frazoj enhavas ankaŭ subfrazojn, kiuj estas kvazaŭ pli etaj frazoj interne de la pli granda frazo. Ili povas modifi substantivajn vortgrupojn, verbajn vortgrupojn, aŭ la tuton de la pli granda frazo:

- La om **ci ia abita asi** ia vade a Paris. – La viro, kiu loĝis ĉi tie, iris al Parizo.
- El va visita en julio, **cuando la clima es bon**. – Li vizitos en julio, kiam la vetero estos bona.

- On no ia permete me fa la cosas **como me ia desira.** – Oni ne permesis, ke mi faru aferojn, kiel mi deziris.
- Me pensa **ce el es bela.** – Mi pensas, ke ŝi belas.

Substantivoj

Oni tipe enkondukas **substantivon** per [difiniloj](#), kaj povas sekvigi ĝin per [adjektivoj](#) kaj [prepoziciaj vortgrupoj](#), por krei [substantivan vortgrupon](#). Tipaj substantivoj prezentas objektojn kiel homoj, lokoj, kaj aĵoj, sed substantivoj povas ankaŭ prezenti pli abstraktajn konceptojn, kiuj similas gramatike.

Pluralo

Oni aldonas **-s** al substantivo por pluraligi ĝin. Se la singulara substantivo finiĝas per konsonanto, oni aldonas **-es** anstataŭe. La plurala finaĵo ne ŝanĝas la [akcenton](#) de la vorto:

- **gato, gatos** – kato, katoj
- **om, omes** – viro, viroj

[Adjektivoj](#), kiuj modifas substantivon, ne ŝanĝiĝas, kiam la substantivo estas plurala. Sed kiam oni uzas adjektivon kiel substantivon, oni povas pluraligi ĝin:

- **la bones, la males, e la feas** – the bonaj, la malbonaj, kaj la malbelaj
- **multe belas** – multaj belaj / multaj belul(in)oj

Kelkaj substantivoj, kiuj pluralas en iuj lingvoj, estas singularaj en Elefeno:

- El regarda un **sisor** con un **binoculo**. – Li rigardas tondilon per binoklo.
- On usa un **bretela** per suporta sua **pantalon**. – Oni uzas ŝelkon por teni sian pantalonon.
- Me ia compra esta **oculo** de sol en **Nederland**. – Mi aĉetis ĉi tiujn okulvitrojn en Nederlando.

Nombreblaj kaj nenombreblaj substantivoj

Kiel multaj lingvoj, Elefeno distingas **nombreblajn** kaj **nenombreblajn** substantivojn. Nombrebla substantivo estas modifebla per [nombrovorto](#) kaj povas akcepti la pluralan **-s**. Tipaj nombreblaj substantivoj prezentas objektojn, kiuj estas klaraj individuoj, kiel domoj, katoj, kaj pensoj. Ekzemple:

- **un** auto; la autos; **cuatro** autos – aŭto; la aŭtoj; kvar aŭtoj
- **un** gato; multe gatos; **un milion** gatos – kato; multaj katoj; miliono da katoj

Kontraste, nenombreblaj substantivoj normale ne akceptas la pluralan **-s**. Nenombreblaj substantivoj tipe prezentas masojn sen klara individueco, kiel ekzemple likvoj (akvo, suko), pulvoroj (sukero, sablo), substancoj (metalo, ligno), aŭ abstraktaj kvalitoj (eleganteco, malrapideco). Kiam ilin modifas nombro aŭ alia kvanta vorto, oni ofte aldonas mezurunuon por klareco.

Ekzemple:

- la acua; alga acua; **tre tases de** acua – la akvo; iom da akvo; tri taso da akvo

- lenio; multe lenio; **du pesos de** lenio – ligno; multe da ligno; du pecoj da ligno

Nenombreblajn substantivojn oni povas tamen uzi nombreble. Ili tiam prezentas apartajn ekzemplojn aŭ okazojn:

- Du **cafes**, per favore. – Du kafojn, mi petas.
- Me ia proba multe **cesos**. – Mi gustumis multajn fromaĝojn.
- On no pote compara la **belias** de Paris e Venezia. – Oni ne povas kompari la belecojn de Parizo kaj Venecio.

Sekso

Substantivoj kutime ne indikas sian sekson. Por distingi la seksojn, oni uzas la adjektivojn **mas** kaj **fema**:

- **un cavalo mas** – virĉevalo
- **un cavalo fema** – ĉevalino

Sed ĉe kelkaj vortoj por parencoj, oni indikas virojn per **-o** kaj inojn per **-a**:

- **avo, ava** – avo, avino
- **fio, fia** – filo, filino
- **neto, neta** – nepo, nepino
- **sobrino, sobrina** – nevo, nevino
- **sposo, sposa** – edzo, edzino
- **tio, tia** – onklo, onklino
- **xico, xica** – knabo, knabino

Krome, ĉe kelkaj paroj oni uzas malsamajn vortojn por la du seksoj:

- **cavalor, dama** – kavaliro, damo
- **dio, diva** – dio, diino
- **om, fem** – viro, virino
- **padre, madre** – patro, patrino
- **re, rea** – reĝo, reĝino
- **senior, seniora** – sinjoro, sinjorino
- **frate, sore** – frato, fratino

La malofta sufikso **-esa** formas la inan varianton de kelkaj historiaj sociaj roloj:

- **abade, abadesa** – abato, abatino
- **baron, baronesa** – barono, baronino
- **conte, contesa** – grafo, grafino
- **duxe, duxesa** – duko, dukino
- **imperor, imperoesa** – imperiestro, imperiestrino
- **marci, marcesa** – markizo, markizino
- **prinse, prinsesa** – princo, princino
- **tsar, tsaresa** – caro, carino

Substantivaj vortgrupoj

Substantiva vortgrupo konsistas el substantivo kaj ties modifiloj: [difiniloj](#), kiuj staras antaŭ la substantivo, kaj [adjektivoj](#) kaj [prepoziciaj vortgrupoj](#), kiuj sekvas ĝin.

La du plej gravaj substantivaj vortgrupoj en [frazo](#) estas la **subjekto** kaj la **objekto**. La subjekto antaŭas la verbon, kaj la objekto sekvas la verbon. Aliajn substantivajn vortgrupojn oni kutime enkondukas per [prepozicioj](#) por klari ilian rolon.

Substantiva vortgrupo devas normale enhavi difinilon – eble nur la pluralmontrilon **-s**. Sed tiu ĉi regulo ne aplikas al propraj nomoj, al la nomoj de semajntagoj, monatoj, kaj lingvoj, kaj al nenombreblaj substantivoj:

- **Desembre** es calda en **Australia**. – Decembro estas varma en Aŭstralio.
- **Nederlandes** es mea lingua orijinal. – La nederlanda estas mia origina lingvo.
- Me gusta **pan**. – Mi ŝatas panon.

Oni ofte malstreĉas la regulon ankaŭ, kiam la substantiva vortgrupo sekvas prepozicion, aparte en fiksjaj esprimoj:

- El es la comandor **de polisia**. – Li estas la poliestro.
- Me no gusta come bur **de aracide**. – Mi ne ŝatas manĝi ternuksbuteron.
- Nos vade **a scola**. – Ni iras al la lernejo.
- Acel es un problem **sin solve** en matematica. – Tio estas sensolva problemo en matematiko.
- Un virgula pare nesesada **per claria**. – Komo ŝajnas necesa por klareco.

Adjektivo aŭ difinilo povas esti modifita de antaŭmetita [adverbo](#). Ĉar adverboj aspektas kiel adjektivoj, sinsekvajn adjektivojn oni

kutime apartigas per komoj aŭ **e**. Parole, la frazmelodio klarigas la diferencon:

- **Sola un** poma **multe putrida** ia resta. – Restis nur tre putra pomo.
- Me ia encontra un fem **bela inteligente**. – Mi renkontis virinon bele inteligentan.
- Me ia encontra un fem **bela, joven, e inteligente**. – Mi renkontis virinon belan, junan, kaj inteligentan.

Foje substantivo nur simbolas iun ajn membron de sia klaso. En tiaj okazoj ne multe gravas, ĉu oni uzas **la** aŭ **un**, aŭ ĉu la substantivo estas plurala aŭ singulara:

- **La arpa** es un instrumento musical. – La harpo estas muzikilo.
- **Un arpa** es un instrumento musical. – Harpo estas muzikilo.
- **Arpas** es instrumentos musical. – Harpoj estas muzikiloj.

[Pronomo](#) estas aparta varianto de substantiva vortgrupo.

Normale oni ne povas modifi pronomojn.

Apozicio

Oni diras, ke du substantivaj vortgrupoj estas en **apozicio**, kiam unu rekte sekvas la alian kaj ambaŭ prezentas la saman ulon aŭ aĵon. Plej ofte, la dua vortgrupo identigas la ulon aŭ aĵon:

- la Rio **Amazona** – la rivero Amazono
- la Mar **Pasifica** – la oceano Pacifiko
- la Isola **Skye** – la insulo Skye

- la Universia **Harvard** – la Universitato Harvard
- la Funda **Ford** – la Fondaĵo Ford
- Re **George 5** – reĝo Georgo la 5-a
- San **Jacobo la major** – Sankta Jakobo la pli aĝa
- Piotr **la grande** – Petro la Granda
- mea ami **Simon** – mia amiko Simon
- la parola “**inverno**” – la vorto “inverno”
- la libro **La prinse peti** – la libro *La eta princo*

Akronimoj kaj unuopaj literoj povas rekte sekvi substantivon por modifi ĝin:

- La disionario es ance disponible como un fix **PDF**. – La vortaro disponeblas ankaŭ kiel PDF-dosiero.
- El ia porta un camisa **T** blu de escota **V**. – Ŝi portis bluan T-ĉemizon kun V-forma dekoltaĵo.

Foje oni uzas du substantivojn samtempe por nomi aĵon aŭ ulon. Tiaokaze, oni kunigas la substantivojn per dividstreko:

- un produor-dirijor – produktoro-reĝisoro
- un primador-scanador – printilo-skanilo

En ĉiuj tiaj okazoj, oni aldonas la pluralan **-s** aŭ **-es** al ambaŭ substantivoj:

- la statos-membros – la membroŝtatoj
- produores-dirijores – produktoroj-reĝisoroj

Speciala okazo rilatas al la verbo **nomi** (kiu signifas “nomi”):

- Nos ia nomi el **Orion**. – Ni nomis lin Oriono.
- Me nomi esta forma **un obelisce**. — Mi nomas ĉi tiun formon obelisko.

Difiniloj

Difinilo estas vorto, kiu modifas [substantivon](#) por priskribi ties identecon kaj kvanton. Krom la pluralmontrilo **-s** (kiun oni rigardas kiel difinilon en Elefeno), la difiniloj staras ĉiam antaŭ la substantivo.

Ekzistas pluraj malsamaj klasoj de difinilo. Tipa ekzemplo de ĉiu klaso estas: [tota](#), [la](#), [esta](#), [cual](#), [cada](#), [mea](#), [multe](#), [otra](#).

Antaŭdifiniloj

Tota signifas “ĉiom da” aŭ “ĉiuj”. Ĝi indikas la tutan kvanton de tio, kion la substantivo esprimas. Malsimile de [cada](#), **tota** traktas la tuton kiel simplan aron, kaj ne kiel apartajn individuojn:

- **Tota linguas** es absurda. – Ĉiuj lingvoj estas absurdaj.
- Me va ama tu per **tota tempo**. – Mi amos vin per ĉiom da tempo / la tuto de la tempo.
- La lete ia vade a **tota locas**. – La lakto iris ĉiudirekten.
- On ia oia la musica tra **tota la vila**. – Oni aŭdis la muzikon tra la tuta urbo / la tuto de la urbo.

Ambos signifas “ambaŭ”. Oni povas uzi ĝin anstataŭ **tota**, kiam oni scias, ke la tuta kvanto estas nur du. La substantivo estu plurala:

- **Ambos gamas** es debil. – Ambaŭ kruroj estas malfortaj.

Semantike, **tota** kaj **ambos** ne malsamas ol [kvantaj difiniloj](#), sed oni traktas ilin kiel apartan klason pro ilia sintakso: ili [staras antaŭ ĉiu alia difinilo](#) en substantiva vortgrupo, inkluzive de **la**.

Oni povas ilin uzi ankaŭ kiel [pronomojn](#).

Artikoloj

Elefeno havas du **artikolojn** – la difina artikolo **la**, kaj la nedifina artikolo **un**. “Difina” ĉi tie signifas, ke la substantivo esprimas ion “jam difinitan”, kaj ke ĝi do ne esprimas ion novan.

La enkondukas substantivon, kiu indikas iun aŭ ion, pri kiu la aŭskultanto jam konscias. Oni uzas ĝin en la jenaj specoj de situacio:

- Oni jam menciis la aferon:
 - Me ia compra un casa. **La casa** es peti. – Mi aĉetis domon. La domo estas malgranda.
- La aŭskultanto povas facile diveni, ke la afero ekzistas:
 - Me ia compra un casa. **La cosina** es grande. – Mi aĉetis domon. La kuirejo estas granda.
- La cetero de la frazo specifas la aferon sufiĉe bone:
 - El ia perde **la numeros** de telefon de sua amis. – Ŝi perdis la telefonnumerojn de siaj amikoj.
- La aŭskultanto povas rekte percepti la aferon:
 - **La musica** es bela, no? – La muziko belas, ĉu ne?
- La afero estas bone konata al ĉiuj. Tio inkluzivas studokampojn kaj abstraktajn substantivojn:

- **La luna** es multe distante de la tera. – La luno estas tre malproksima de la tero.
- Me ne comprende **la matematika**. – Mi ne komprenas matematikon.
- El ama **la cafe**. – Ŝi amas kafon.
- La felisia es plu importante ca **la ricia**. – Feliĉo pli gravas ol riĉo.

Un enkondukas singularan substantivon, kiu esprimas ion, pri kiu la aŭskultanto ankoraŭ ne konscias. Oni ne uzas ĝin kun pluralaj aŭ nenombreblaj substantivoj. (Simila difinilo ne ekzistas en Esperanto. Sed **un** funkcias ankaŭ kiel [kvanta difinilo](#) kun la signifo “unu”.)

- Me vole leje **un libro**. – Mi volas legi libron.
- **Un gato** ia veni en la sala. – Kato venis en la ĉambron.

Iuj lingvoj havas partitivan artikolon, kiu indikas nespecifican kvanton de nenombrebla substantivo. Elefeno uzas **la**, aŭ neniun ajn artikolon:

- Me gusta **la cafe**. – Mi ŝatas kafon / Mi ŝatas la kafon.
- Me gusta **cafe**. – Mi ŝatas kafon.
- Me bevi **cafe**. – Mi trinkas kafon.

Montraj difiniloj

La **montraj difiniloj** gestas al tio, kion la substantivo esprimas, lokante ĝin en tempo aŭ spaco aŭ la teksto mem.

Esta signifas “ĉi tiu”. Ĝi similas al **la**, sed montras ion proksiman al la parolanto, ĉu fizike, ĉu metafore:

- Me posese **esta casa**. – Mi posedas ĉi tiun domon.
- **Esta libros** es merveliosa. – Tiuj ĉi libroj estas mirindaj.
- Me gusta **esta cafe**. – Mi ŝatas ĉi tiun kafon.
- **Esta mense** ia es difisil. – Ĉi tiu monato malfacilis.
- **Esta frase** conteni sinco parolas. – Ĉi frazo enhavas kvin vortojn.

Acel signifas “tiu”. Ankaŭ ĝi similas al **la**, sed montras ion malproksiman de la parolanto, aŭ almenaŭ pli malproksiman ol **esta**:

- **Acel xico** regarda **acel xicas**. – Tiu knabo rigardas tiujn knabinojn.
- Atenta denova en **acel modo**. – Provu denove tiumaniere.
- **Acel torta** es noncomable. – Tiu kuko estas nemanĝebla.

Oni povas ŝanĝi **esta** kaj **acel** al [pronomoj](#).

Demandaj difiniloj

La **demandaj difiniloj** estas unu maniero por krei [demandojn](#).

Cual demandas “kiu” aŭ “kia”:

- **Cual animal** es acel? – Kiu/kia besto estas tio?
- **Cual vegetales** es la plu bon? – Kiu legomoj plej bonas?
- Tu veni de **cual pais**? – De kiu lando vi venas?
- **Cual fenestras** es rompeda? – Kiu fenestroj estas rompita?

- **Cual pinta** tu prefere? – Kiun farbon vi preferas?

Cuanto demandas “kiom da”, ĉu kun nombrebla substantivo, ĉu kun nenombrebla:

- **Cuanto casas** es en tua strada? – Kiom da domoj estas sur via strato?
- **Cuanto pan** tu pote come? – Kiom da pano vi povas manĝi?

Oni uzas **cual** kaj **cuanto** ankaŭ kiel [pronomojn](#).

Elektaj difiniloj

La **elektaj difiniloj** elektas specifajn individuojn el la tuta aro:

- **cada** – ĉiu
- **cualce** – iu ajn
- **alga** – iuj, iom da, kelkaj, kelke da
- **no** – neniu, neniom da
- **sola** – sola, solaj

Cada signifas “ĉiu”, se oni rigardas la erojn laŭvice kiel apartajn individuojn. La substantivo estu nombrebla sed singulara:

- **Cada can** ave un nom. – Ĉiu hundo havas nomon.
- Me no ia leje **cada parola**. – Mi ne legis ĉiun vorton.
- Tu fa la mesma era a **cada ves**. – Vi faras la saman eraron ĉiufoje.

Cualce signifas “iu ajn” – ne gravas, kiun oni elektos. La substantivo estas kutime nombrebla:

- Prende **cualce carta**. – Elektu iun ajn karton.
- **Cualce contenadores** va sufisi. – Iuj ajn ujoj sufiĉos.

Alga indikas, ke oni ne specifas la identecon de tio, kion la substantivo esprimas:

- Me ia leje acel en **alga libro**. – Mi legis tiun en iu libro.
- Cisa me va reveni a **alga dia**. – Eble mi revenos iun tagon.
- **Alga cosa** es rompita. – Io estas rompita.

Kiam oni uzas ĝin kun substantivo nenombrebla, aŭ substantivo nombrebla kaj plurala, **alga** indikas, ke oni ne specifas ne nur la identecon, sed ankaŭ la kvanton. Ofte oni subkomprenas, ke la nespecifa kvanto estas relative malgranda – alie oni dirus **multe** – sed ne tiom emfaze malgranda kiel ĉe **poca**:

- Me va leje **alga libros**. – Mi legos kelkajn librojn.
- **Alga polvo** ia cade de la soffito. – Iom da polvo falis de la plafono.
- El ave **alga pan** en sua sesto. – Ŝi havas iom da pano en sia korbo.

No signifas “neniu” aŭ “neniom da”. Ĝi indikas nulan kvanton (aŭ la neekziston) de tio, kion la substantivo esprimas:

- Me ave **no arbores** en mea jardin. – Mi havas neniujn arbojn / Mi ne havas arbojn en mia ĝardeno.
- Tu va senti **no dole**. – Vi sentos neniun doloron.
- **No arbor** es plu alta ca la tore Eiffel. – Neniu arbo estas pli alta ol la Eiffel-turo.

- Me ia encontra **no person** en la parce. – Mi renkontis neniun (homon) en la parko.

Sola signifas “sola” – ekzistas aŭ gravas nur tiu ĉi kaj ne aliaj:

- El es **la sola doktor** en la vila. – Li estas la sola kuracisto en la urbo.
- Estas es **la sola du parolas** cual nos no comprende. – Ĉi tiuj estas la solaj du vortoj, kiujn ni ne komprenas.
- Me va destrui la mur con **un sola colpa**. – Mi detruos la muron per unu sola bato.

Oni uzas ĉi tiujn difinilojn, escepte de **no** e **sola**, ankaŭ kiel [pronomojn](#). Ili formas ankaŭ la specialajn pronomojn **cadun**, **cualcun**, **algun**, kaj **nun**, kiuj indikas *homojn*. Por indiki *aĵojn*, oni simple sekvas la difinilon per **cosa**.

Posedaj difiniloj

La **posedaj difiniloj** estas **mea**, **tua**, **nosa**, e **vosa**:

- **Mea gato** ia come un mus. – Mia kato manĝis muson.
- Me gusta multe **tua dansa**. – Mi multe ŝatas vian dancon.
- **Nosa ecipo** va gania la premio. – Nia teamo gajnos la premion.
- **Mea desira** es forte. – Mia deziro esta forta.

Posedon oni povas indiki ankaŭ per tia esprimo kiel **de me**:

- Acel es **la casa de tu**. – Tio estas via domo.

La triapersona poseda difinilo estas **sua**, egale kiam la responda pronomo estus **el, lo, los, on**, aŭ **se**:

- La ipopotamo abri **sua boca**. – La hipopotamo malfermas sian buŝon.
- Nos regarda **sua dentes**. – Ni rigardas ĝiajn dentojn.

Por esprimi “ilia” (t.e. **de los**, aŭ **de se** ĉe plurala **se**), eblas uzi la difinilon **lor** anstataŭ **sua**. Sed tio neniam estas deviga. **Sua** ĉiam eblas (kaj estas pli tradicia), sed en iaj frazoj **lor** povas esti pli klara:

- La oteloroj montra **lor sala** a siaj visitores. – La gastejestro montras ilian ĉambron al siaj gastoj.
- La visitores gusta multe **lor sala / sua sala**. – La gastoj multe ŝatas sian ĉambron.
- Ance la oteloroj gusta **lor sala**. – La gastejestro ankaŭ ŝatas ilian ĉambron.

Kvantaj difiniloj

Kvantaj difiniloj helpas esprimi la kvanton de tio, kion la substantivo indikas:

- **-s – -j** (*pluralmontrilo*)
- **un** – unu
- **du, tre, cuatro...** – du, tri, kvar...
- **multe** – multaj, multe da
- **poca** – malmultaj, malmulte da
- **plu** – pli multaj, pli multe da

- **la plu** – plej multaj, plej multe da
- **min** – malpli multaj, malpli multe da
- **la min** – malplej multaj, malplej multe da

La pluralmontrilo **-s** estas la plej baza kvanta difinilo.

Substantiva vortgrupo, kiu inkluzivas pluralan substantivon, bezonas neniun alian difinilon:

- Me va leje **libros**. – Mi legos librojn.
- Me va leje **la libros**. – Mi legos la librojn.

Krom esti la [nedifina artikolo](#), **un** estas la nombro “unu”. Ĝi indikas unuopan kvanton de tio, kion la substantivo esprimas. La substantivo estu tial nombrebla sed singulara:

- Me ave **un frate** e **du sores**. – Mi havas unu fraton kaj du fratinojn.

Simile, la aliaj [nombrovortoj](#) – **du**, **tre**, **cuatro**, etc – estas kvantaj difiniloj.

- Me ave **tre gatos** obesa. – Mi havas tri dikajn katojn.
- Me ave **cuatro plu anios** ca mea frate. – Mi estas kvar jarojn pli aĝa ol mia frato.

Multe signifas “multaj” aŭ “multe da”. Ĝi indikas grandan kvanton de tio, kion la substantivo esprimas, kaj oni uzas ĝin kun nombreblaj kaj nenombreblaj substantivoj:

- Esta casa sta ja asi tra **multe anios**. – Ĉi tiu domo staris ĉi tie multajn jarojn.

- La pijones come **multe pan.** – La kolomboj manĝas multe da pano.

Poca estas la malo de **multe**, kaj indikas malgrandan kvanton. Ĝi signifas “malmultaj” aŭ “malmulte da”:

- Me reconose **poca persones.** – Mi rekonas malmultajn homojn. (*vere ne multajn*)
- El pote dona **poca aida.** – Li povas doni malmulte da helpo. (*vere ne multe*)
- *Komparu:* Me pote leje **alga parolas.** — Mi povas legi kelkajn vortojn. (*malgrandan nombron*)

Plu signifas “pli multaj” aŭ “pli multe da”. Ĝi indikas pli grandan kvanton de tio, kion la substantivo esprimas, kaj oni uzas ĝin kun nombreblaj kaj nenombreblaj substantivoj. **La plu** signifas “plej multaj” aŭ “plej multe da” – la plej grandan kvanton:

- Tu ave **plu libros** ca me. – Vi havas pli multe da libroj ol mi.
- **La plu linguas** es bela. – Plej multaj lingvoj estas belaj.
- **Plu pan** es en la cosina. – Pli da pano estas en la kuirejo.
- **La plu fango** es repulsante. – Plej multe da koto estas abomeninda.

Min estas la malo de **plu**, kaj signifas “malpli multaj” aŭ “malpli multe da”. Ĝi indikas pli malgrandan kvanton, kaj oni uzas ĝin kun nombreblaj kaj nenombreblaj substantivoj. **La min** signifas “malplej multaj” aŭ “malplej multe da”:

- Me desira **min vegetales** ca el. – Mi deziras malpli da legomoj ol ŝi.
- Tu ia leje **la min libros** de qualcun ci me conose. – Vi legis la plej malmultajn librojn el iu ajn, kiun mi konas.
- El ave **min interesa** a cada dia. – Li havas ĉiutage malpli multe da intereso.

Oni povas ŝanĝi ĉiun kvantan difinilon al [pronomo](#).

Similecaj difiniloj

Kvar kromaj difiniloj temas pri simileco kaj malsameco:

La mesma signifas “sama”. Normale oni ne povas ellasi la vorton **la**, kvankam oni povas ŝanĝi ĝin al **esta** aŭ **acel**:

- Tu porta **la mesma calsetas** como me. – Vi portas la samajn ŝtrumpetojn kiel mi.
- La gera ia comensa en **la mesma anio**. – La milito komenciĝis en la sama jaro.
- Nos va reveni a **esta mesma tema** pos un semana. – Ni revenos al tiu ĉi sama temo post unu semajno.

Otra signifas “alia” aŭ “ankoraŭ unu aŭ iom da”.

- Nos ave aora esta **tre otra problemes**. – Ni havas nun ĉi tiujn tri aliajn problemojn.
- **La otra solve** ia es plu bon. – La alia solvo pli bonis.
- Tu ave **otra pan?** – Ĉu vi havas alian panon?

Tal signifas “tia” – de tiu aŭ tiu ĉi speco:

- Me konstrui un macina de tempo. – Mi konstruas tempomaŝinon.
 - **Tal cosas** es nonposable. – Tiaj aferoj ne eblas.
- Me xerca un abeor. – Mi serĉas abeliston.
 - Me no conose **un tal person**. – Mi ne konas tian homon.
- Tu vole repinti la sala? – Ĉu vi volas refarbi la ĉambron?
 - Me prefere evita **tal labora**. – Mi preferas eviti tian laboron.
- Tu ave plu libros como estas? – Ĉu vi havas pli da libroj kiel ĉi tiuj?
 - Si, me ave du otra **tal libros**. – Jes, mi havas du aliajn librojn ĉi tiajn.

Propre signifas “propra”, emfazante la posedanton de la substantivo. Ĝi estas aparte utila post la difinilo **sua** por klarigi, ke la signifo estas refleksiva, t.e. ke la substantivo apartenas al la subjekto de la frazo:

- **Mea propre idea** es an plu strana. – Mia propria ideo estas eĉ pli stranga.
- El ia trova la xarpe de sua sposo e ia pone lo sirca **sua propre colo**. – Ŝi trovis la koltukon de sia edzo kaj metis ĝin ĉirkaŭ la propran kolon.

Ordo de difiniloj

La difiniloj sekvas regulan ordon:

- La **antaŭdifiniloj** **tota** kaj **ambos**, se ili ĉeestas, staras antaŭ ĉiuj aliaj.

- Poste venas [artikolo](#), [montra difinilo](#), [demanda difinilo](#), [elekta difinilo](#), aŭ [poseda difinilo](#). Normale ne pli ol unu tia difinilo troviĝas en substantiva vortgrupo.
- Post tio, oni povas trovi [kvantajn difinilojn](#) aŭ [similecajn difinilojn](#). [Simileca difinilo](#) estas neniam la unua vorto en la vortgrupo de *singulara nombrebla* substantivo. Ĝi ĉiam sekvas alian difinilon – aŭ du, se unu el ili estas [antaŭdifinilo](#) (ekzemple **tota la otra libro**).
- La [adjektivoj](#) **bon** kaj **mal**, kvankam ne mem difiniloj, kutime staras antaŭ la substantivo, post iuj ajn difiniloj.

Ekzemple:

- El ia colie **sua poca posedas** e parti. – Ŝi kolektis siajn malmultajn posedaĵojn kaj foriris.
- **Un otra problem** es la manca de aira fresca asi. – Alia problemo estas la manko de freŝa aero ĉi tie.
- Nos no ia tradui ancora **acel otra cuatro frases**. – Ni ankoraŭ ne tradukis tiujn aliajn kvar frazojn.
- **Tota la omes** ia vade a la costa. – Ĉiuj viroj iris al la marbordo.

Pronomoj

Pronomo estas vorto, kiu anstataŭas pli longan [substantivan vortgrupon](#).

Personaj pronomoj

- **me** – mi, min
- **tu** – vi, vin (*unu persono*)
- **el** – li, ŝi, lin, ŝin
- **lo** – ĝi, ĝin
- **nos** – ni, nin
- **vos** – vi, vin (*pli ol unu persono*)
- **los** – ili, ilin

Tu estas singulara kaj **vos** estas plurala en ĉiuj situacioj, kaj formalaj kaj neformalaj.

El estas uzata por indiki homojn kaj tiajn bestojn kiel mamuloj kaj birdoj. Oni povas ĝin apliki metafore ankaŭ al aliaj bestoj, robotoj, la luno, ŝtormoj, ktp.

Lo estas uzata por indiki aĵojn, simplajn bestojn, ideojn, konceptojn, ktp.

Los estas uzata kiel la pluralo de kaj **el** kaj **lo**.

Elefeno kutime ne distingas “li” kaj “ŝi”. La formoj **elo** (“li”) kaj **ela** (“ŝi”) estas maloftaj, sed oni povas uzi ilin por eviti troan

ripetiĝon de la nomoj de homoj, kiam oni parolas pri viro kaj virino en la same kunteksto.

- Do es Joana? **El** es en la jardin. – Kie estas Joana? **Ŝi** estas en la ĝardeno.
- Do es mea come de matina? **Lo** es en la cosina. – Kie estas mia matenmanĝo? **Ĝi** estas en la kuirejo.

Personan pronomon oni povas sekvigi per [rilata subfrazo](#). Se la signifo restas klara, oni povas ellasi la pronomon, lasante la rilatan pronomon fari duoblan laboron:

- El recorda sempre la nomes de **los ci** el ia encontra. – Li ĉiam memoras la nomojn de tiuj, kiujn li renkontis.
- Me respeta **tu, ci** es tan saja. – Mi respektas vin, kiu estas tiel saĝa.
- **El ci** osa, gania. – Tiu, kiu aŭdacas, gajnas.
- **Ci** osa, gania. – Kiu aŭdacas, gajnas.

On estas ĝenerala nedifina pronomo, kiel “oni” en Esperanto. **Ĝi** indikas “homoj ĝenerale” aŭ “iu arbitra homo”. **Ĝi** ofte evitas la bezonon de pasiva verbo:

- **On** dise ce tu va parti. – Oni diras, ke vi foriros.
- **On** debe repete la verbo. – Oni devus ripeti la verbon. / La verbo devus esti ripetita.

Se estas la refleksiva pronomo por la tria persono, kaj singulare kaj plurale. **Ĝi** indikas la subjekton de la aktuala verbo, sed estas mem neniam la subjekto:

- Lo limpi **se**. – Ĝi purigas sin.
- Los lava **se**. – Ili lavas sin.

La posedaj pronomoj (“la mia”, “la via”, ktp) estas la [posedaj difiniloj](#) (“mia”, “via”, ktp), enkondukitaj de **la**:

- Me ia trova mea libros, ma tu no ia trova **la tuas**. – Mi trovis miajn librojn, sed vi ne trovis la viajn.
- Lo es ance plu grande ca **la mea**. – Ĝi estas ankaŭ pli granda ol la mia.
- No toca acel jueta! Lo no es **la tua**. – Ne tuŝu tiun ludilon! Ĝi ne estas via!

Difinilaj pronomoj

Ĝuste kiel oni povas ŝanĝi [adjektivon](#) al [substantivo](#), tiel oni povas ŝanĝi plej multajn [difinilojn](#) al pronomoj. La pronomoj **esta**, **acel**, kaj **otra** povas ĉiam akcepti la pluraligan **-s**. Kelkaj aliaj pronomoj povas ankaŭ akcepti **-s**, se tio pli klarigas la frazon.

- **tota, totas** – ĉio, ĉiom, ĉiuj (*kune*)
- **ambos** – ambaŭ
- **esta, estas** – ĉi tiu, ĉi tiuj
- **acel, aceles** – tiu, tiuj
- **cualce, cualces** – iu ajn
- **cada** – ĉiu (*individue*)
- **alga, algas** – iuj, iom, kelkaj
- **cual** – kiu, kiuj, kio
- **multe, multes** – multaj, multe

- **poca, pocas** – malmultaj, malmulte
- **plu** – pli multaj, pli multe
- **la plu** – plej multaj, plej multe
- **min** – malpli multaj, malpli multe
- **la min** – malplej multaj, malplej multe
- **un/la otra, (la) otras** – (la) alia, (la) aliaj
- **la mesma, la mesmas** – la sama, la samaj
- **un tal, tales** – tia, tiaj

Ekzemploj:

- **Estas** aspeta bela! – Ĉi tiuj aspektas bele!
- Prende **cualce**. – Prenu iun ajn (el aro).
- Me no vole judi, car me gusta egal **cada**. – Mi ne volas juĝi, ĉar mi ŝatas ĉiun egale.
- Me vole grasia **cada de esta persones**. – Mi volas danki ĉiun el tiuj ĉi homoj.
- **Alga(s)** pensa ancora ce la mundo es plata. – Kelkaj (homoj) ankoraŭ pensas, ke la mondo estas plata.
- Tu ia versa mal la vino. **Alga** es sur la table. – Vi malbone verŝis la vinon. Iom estas sur la tablo.
- **Multe(s)** de nos es programores. – Multaj el ni estas programistoj.
- Me no ia regarda **multe(s) de acel filmas**. – Mi ne rigardis multajn el tiuj filmoj.
- Me reconose **poca(s)** de la persones en la fola. – Mi rekonas malmultajn de la homoj en la amaso.
- **Plu** va ariva pronto. – Pli multaj alvenos baldaŭ.

- Alga parolas es clar, ma on no pote leje facil **la plu**. – Iuj vortoj estas klaraj, sed oni ne povas facile legi la plej multajn.
- Tu ave **min** ca me. – Vi havas pli malmulte ol mi.
- Me vole bonveni **tota(s) de vos**. – Mi volas bonvenigi ĉiujn el vi / vi ĉiujn.
- Me ia compra sinco libros nova, ma me ia lasa **tota(s)** en la bus. – Mi aĉetis kvin novajn librojn, sed mi lasis ĉiujn en la buso.
- **Ambos** de la infantes jua felis. – Ambaŭ el la infanoj ludas feliĉe.

La [nombrovortojn](#) oni povas uzi kiel pronomojn por indiki grupojn de specifa grandeco. Tiuj pronomoj kutime ne akceptas la pluraligan **-s** kaj ne bezonas difinilojn:

- **Tre** de mea amis va ariva a esta sera. – Tri el miaj amikoj alvenos ĉi-vespere.
- Cuanto pizas tu ia come? – Kiom da picoj vi manĝis?
 - **Cuatro!** – Kvar!
- La **cuatro** de nos va come en junta. – Ni kvar manĝos kune.
- **Un** de mea gatos manca. – Mankas unu el miaj katoj.
- La **tre** ia abita en la mesma aparte. – La tri loĝis en la sama apartamento.

Por indiki neprecizajn oblojn de nombroj kiel **sentos**, **mil**, aŭ **milion**, oni aldonas la pluraligan **-s**:

- On ia ave **miles** de persones a la conserta. – Miloj da homoj ĉeestis la koncerton.

- A cada anio, **miliones** migra a otra paises. – Ĉiujare milionoj migras en aliajn landojn.
- On ia vacui **miles de plu** persones de locas inondada par la deluvias. – Oni evakuis milojn da kromaj homoj el regionoj superakvitaj de la inundoj.
- On pote fatura **plu sentos** per servi. – Oni povas pagigi pliajn centojn kontraŭ servado.

Oni ne povas ŝanĝi **la** al pronomo. Oni uzas **el, lo** kaj **los** anstataŭe:

- La casa de mea padre es plu grande ca **lo** de mea frate. – La domo de mia patro estas pli granda ol tiu de mia frato.
- El es ance plu grande ca **lo** cual me intende compra. – Ĝi estas ankaŭ pli granda ol tiu, kiun mi intencas aĉeti.

Oni ne povas uzi **no** kiel pronomon, sed ĝi ja formas **nun** kaj **no cosa**. Ankaŭ la nombrovorton **zero** oni povas uzi kiel pronomon.

La idiomaĵa esprimo **la un la otra** (aŭ **lunlotra**) signifas “unu la alian”. Ĝi havas variantojn kiel **la un o la otra** (unu aŭ la alia), **la un pos la otra** (aŭ **pos lunlotra**, unu post alia), kaj **la un sur la otra** (aŭ **sur lunlotra**, unu sur alia):

- La xicos colpa **la un la otra / lunlotra**. – La knaboj batas unu la alian.
- Me pila mea crepes **la un sur la otra / sur lunlotra**. – Mi amasigas miajn krespojn unu sur alian.

En iuj frazoj, pronomon tuj sekvas [verbo](#), tiel ke oni riskas miskompreni la pronomon kiel difinilon sekvitan de [verbo reuzita kiel substantivo](#). Ekzemple, senkontekste oni ne povas certiĝi, ĉu **acel veni de Italia** signifas “tiu veno de Italio” aŭ “tio venas de Italio”. En plej multaj kazoj, la konteksto tute evidentigas la celon. Sed Elefen-komencantoj kaj tiuj, kiuj deziras eviti esti miskomprenataj, povas aldoni simplan substantivon – kiel **person** aŭ **cosa** – post la difinilo anstataŭ ĝin pronomigi:

- **Acel cosa** veni de Italia. – Tiu afero venas de Italio.
- Recorda ce **alga persones** (o **algas**) abita en sua auto. – Memoru, ke iuj personoj loĝas en sia aŭto.

Kelkfoje oni volas klarigi, ke la deverba substantivo ne estas verbo. Ĉe vortoj kiel **alga**, **multe**, kaj **poca**, oni povas aldoni **de** inter la difinilo kaj la substantivo; la difinilo tiam fariĝas pronomo, sed la substantivo ne fariĝas verbo. Ĉe aliaj difiniloj, kiel **esta** kaj **acel**, oni povas aldoni **la** antaŭ la difinilo:

- La profesor ia demanda **alga de atende**. – La profesoro petis iom da atento.
- **Multe de labora** pote es evitada. – Multe da laboro povas esti evitata.
- **La esta deside** no es un bon resulta. – Tiu ĉi decido ne estas bona rezulto.

Demandaj pronomoj

Elefeno havas di pronomojn, kiujn oni uzas por krei [demandojn](#):

- **cual?** – kiu?, kio? (= **cual cosa?**)
- **ci?** – kiu? (= **cual person?**)

Ci estas nur pronomo, kaj oni ne uzu ĝin kiel difinilon.

Cual estas baze difinilo, sed oni ofte uzas ĝin ankaŭ kiel pronomon, se oni akceptas [la malgrandan riskon de malkompreno](#) ĉe esprimoj kiel **cual veni de Italia**.

Ekzemploj:

- **Cual** tu gusta? – Kiun (el ĉi tiuj ebloj) vi ŝatas?
- **Cual** tu prefere, la rojas o la verdes? – Kiujn vi preferas, la ruĝajn aŭ la verdajn?
- **Ci** vole es un milionor? – Kiu volas esti milionulo?
- Tu vade a la sinema con **ci**? – Kun kiu vi iras al la kinejo?
- **Cual** es en la caxa? – Kio estas en la skatolo?
- Vos prefere **cual**? – Kion vi preferas?

Oni uzas **ci** e **cual** ankaŭ en [nerektaj demandoj](#).

Rilataj pronomoj

Cual e **ci** funkcias ankaŭ kiel rilataj pronomoj, enkondukante [rilatan subfrazon](#):

- **cual** – kiu, kiun
- **ci** – kiu, kiun (= **la person cual...**)

La rilata pronomo por homo estas **ci**. La rilata pronomo por aĵo estas **cual**:

- Esta es la fem de **ci** me ia compra mea auto. – Ĉi tiu estas la virino, de kiu mi aĉetis mian aŭton.
- La fem de **ci** me ia oblida sua nom es denova a la porte. – La virino, kies nomo mi forgesis, estas denove ĉe la pordo.
- A, vide la patetas **ci** segue sua madre! – Ha, vidu la anasidojn, kiuj sekvas sian patrinon!
- La libro **cual** me leje es tro longa. – La libro, kiun mi legas, tro longas.
- La casa en **cual** nos abita es tro peti. – La domo, en kiu ni loĝas, estas tro malgranda.
- La superstisios – me gusta esta parola! – **cual** me ia investiga es riabile. – La superstiĉoj – mi ŝatas tiun vorton! –, kiujn mi esploris, estas ridindaj.
- El esperia un sonia **cual** el teme. – Ŝi spertas songon, kiun ŝi (ankaŭ) timas.
- *Komparu:* El esperia un sonia ce el teme. – Ŝi spertas songon, ke ŝi timas. (Ŝi timas en la songo.)

Ĉe iuj rilataj subfrazoj, la ĉeffrazo preterlasas la substantivon, kiun la subfrazo priskribas. La rilata pronomo mem okupas la lokon de tiu substantivo. Tiam oni povas uzi **lo cual** anstataŭ **cual** kaj **el ci** anstataŭ **ci**, se oni volas eviti konfuzon:

- Acel es **lo cual** me ia comprende. – Tio estas tio, kion mi komprenis.
- Me comprende **lo sur cual** on ia instrui me. – Mi komprenas tion, pri kio oni instruis min.
- Me no recorda (**el**) **ci** me ia vide. – Mi ne memoras tiun, kiun mi vidis.

- Me no recorda **(el) a ci** me ia parla. – Mi ne memoras tiun, al kiu mi parolis.

Aliaj pronomoj

Ekzistas kvar specialaj pronomoj por indiki homojn. Oni uzas ilin nur singulare:

- **algun** – iu (homo) (= **alga un, alga person**)
- **cualcun** – iu ajn (homo) (= **cualce un, cualce person**)
- **cadun** – ĉiu (homo, individue) (= **cada un, cada person**)
- **nun** – neniu (homo) (= **no un, no person**)

Ekzemploj:

- **Algun** entre nos es la asasinor. – Iu inter ni estas la murdinto.
- Dise acel broma a **cualcun**, e el va rie. – Diru tiun ŝercon al iu ajn, kaj tiu ridos.
- **Cadun** debe reseta un premio. – Ĉiu devas ricevi premion.
- Me senta en la atrio per un ora, e **nun** ia parla a me. – Mi sidas unu horon en la vestiblo, kaj neniu parolis al mi.

La respondaĵoj de **algun**, **cualcun**, **cadun**, kaj **nun** por aĵoj estas **alga cosa** (io), **cualce cosa** (io ajn), **cada cosa** (ĉiu aĵo, individue), kaj **no cosa** (nenio).

Pronomaj vortgrupoj

Pronomojn oni normale ne modifas per [difiniloj](#) aŭ [adjektivoj](#), sed oni ja povas modifi ilin per [prepoziciaj vortgrupoj](#):

- **Nos en la sindikato** esije plu direktos. – Ni en la sindikato postulas pli da rajtoj.
- **Tota de la lenio** es danada. – Ĉiom el la ligno estas difektita.
/ La tuta ligno estas difektita.
- **La plu de esta linguas** es difisil. – Plej multaj el ĉi tiuj lingvoj malfacilas.

Adjektivoj

Adjektivo estas vorto, kiu modifas la signifon de [substantivo](#). Tipaj adjektivoj prezentas la ecojn aŭ kvalitojn de tio, kion iliaj substantivoj indikas.

En Elefeno, adjektivoj ne ŝanĝiĝas por montri nombron kaj sekson.

Vortordo

Plej multaj adjektivoj sekvas la substantivon, kiun ili modifas. Sed **bon** (“bona”) kaj **mal** (“malbona”) staras kutime antaŭ la substantivo, krom se ili mem estas modifitaj:

- un **bon** can – bona hundo
- un can plu **bon** – pli bona hundo (*modifita de plu*)
- la **mal** infante – la malbona infano
- un **mal** can bon instruida – malbona hundo bone dresita
- **bon** enfantes mal comprendeda – bonaj infanoj malbone komprenitaj

Plej ofte, oni povas aldoni pli ol unu adjektivon post la substantivo sin kaŭzi konfuzon. Sed iafoje, eblas kompreni unu el la adjektivoj ankaŭ kiel adverbon, kiu modifas la signifon de la sekvanta adjektivo. Oni povas meti **e** inter adjektivojn por eviti la konfuzon:

- la nara **vera longa** – la vere longa rakonto (*vera = adverbo*)

- la nara **vera e longa** – la vera (kaj) longa rakonto (*vera* = adjektivo)
- la om **grande, forte, e stupida** – la granda forta stupida viro (tri adjektivoj)

Iafoje, oni metas adjektivon antaŭ la substantivon: por stilo en poezio aŭ rakontoj, aŭ kiam oni havas du similpezajn adjektivojn:

- la **peti** casa bela – la bela eta domo
- un **fea** arbor vea – malbela arbo maljuna

La plej taŭgaj adjektivoj por antaŭsubstantiva uziĝo estas la plej simplaj kaj plej mallongaj, kiel ekzemple **bela, fea, nova, vea, grande**, kaj **peti**.

Komparo

Komparativajn adjektivojn oni formas per aldono de la averboj **plu** (“pli”) kaj **min** (“malpli”). “Ol” estas **ca**:

- La cosina es **plu calda ca** la jardin. – La kuirejo estas pli varma ol la ĝardeno.
- Esta leto es **min komfortosa ca** me ia previde. – Ĉi tiu lito estas malpli komforta ol mi antaŭvidis.

Superlativajn adjektivojn oni formas per aldono de la adverboj **la plu** (“plej”, “la plej”) kaj **la min** (“malplej”, “la malplej”):

- La sol es la ojetto **la plu calda** en la sistem solal. – La suno estas la plej varma objekto en la sunsistemo.

- El ia ave un fia **la plu bela** en la mundo. – Ŝi havis filinon, la plej belan en la mondo.

Oni povas kombini [ordan nombrovorton](#) kun la superlativa konstruo:

- Vega es la stela **sinco la plu brilante** en la sielo de note. – Vego estas la kvina plej brila stelo en la nokta ĉielo.
- El ia deveni la om **tre de la plu ricas** en la mundo. – Li fariĝis la tria plej riĉa viro en la mondo.

Egalecaj komparoj uzas la kombinon **tan... como...** (“tiel... kiel...”, “tiom... kiom...”):

- La arbor ia es **tan** alta **como** un casa. – La arbo estis tiel alta kiel domo.
- On es **tan** joven **como** on senti. – Oni estas tiel juna, kiel oni sentas sin.

Adjektivoj kiel substantivoj

Oni povas reuzi iun ajn adjektivon senŝanĝe kiel substantivon, kies signifo estas ulo aŭ aĵo, kiu havas la econ de tiu adjektivo. La rezulta substantivo obeas la kutimajn regulojn por substantivoj – ĝi pluraliĝas per **-s**, bezonas difinilon, kaj estas modifebla per la propraj adjektivoj:

- Esta anelo es perfeta sirculo. Lo es **un sirculo perfeta**. – Ĉi tiu ringo estas perfekte cirkla. Ĝi estas perfekta cirklo.

- Marilyn es un **blonde**, e seniores prefere **blondes**. – Marilyn estas blondulino, kaj sinjoroj preferas blondulinojn.

Adverboj

Ĝuste kiel [adjektivoj](#) estas vortoj, kiuj modifas [substantivojn](#), tiel adverboj estas vortoj, kiuj modifas preskaŭ ĉion ajn alian, ekzemple [verbojn](#), adjektivojn, aliajn adverbojn, [difinilojn](#), [prepoziciojn](#), [substantivajn vortgrupojn](#), kaj eĉ tutajn frazojn. Tipe adverboj informas pri loko, tempo, cirkonstanco, kaŭzo, maniero, aŭ grado.

Vortordo

En Elefeno adverboj kaj adjektivoj havas la saman formon. Oni klare distingas ilin per la vortordo: adjektivoj sekvas substantivojn; adverboj sekvas verbojn kaj staras antaŭ aliaj vortoj:

- La om **ia studia atendosa** la testo. – La viro studis la tekston zorge. (*modifas verbon*)
- Me ia veni asi en un tren **riable** lenta. – Mi venis ĉi tien en ridinde malrapida trajno. (*modifas adjektivon*)
- La tren ia move **asurda** lenta. – La trajno movis absurde malrapide. (*modifas alian adverbon*)
- Me no **oia multe bon** tu. – Mi ne aŭdas vin tre bone. (“*multe*” modifas “*bon*”, kaj “*multe bon*” modifas “*oia*”)
- **Cuasi** sento persones ia espeta sur la plataforma. – Preskaŭ cent homoj atendis sur la kajo. (*modifas kvantan difinilon*)
- On ia escava un buco **direta** ante mea porte. – Oni fosis truon rekte antaŭ mia pordo. (*modifas prepozicion*)

- **Sola** la manico es rompida. – Nur la tenilo estas rompita. (*modifas substantivan vortgrupon*)
- **Strana**, el ia porta un balde de pexes. – Strange, li portis sitelon da fiŝoj. (*modifas frazon*)

Adverbo (aŭ adverba vortgrupo), kiu modifas verbon (aŭ la tutan frazon) povas aperi ankaŭ komence de la frazo. Kaj se tio ne kaŭzas konfuzon, oni povas meti adverbbon ankaŭ post la objekto de la verbo aŭ fine de la frazo:

- El danza **bon**. – Li dancas bone.
- **Pronto** el va cade. – Baldaŭ li falos.
- **Surprendente**, el es un xico **multe** bon. – Surprise, li estas tre bona knabo.
- Me no oia tu **multe bon**. – Mi ne aŭdas vin tre bone.
- *sed*: Me leje **felis** la libro. – Mi legis la libron feliĉe.

Iafoje oni povas ligi adverbbon al adjektivo per dividstreko por klare montri la signifon:

- la parolas **nova-creada** – la nove kreitaj vortoj

Oni povas ankaŭ klarigi adverbbon signifon per la esprimoj **en modo** aŭ **a grado**:

- La melodia es bela **en modo** surprendente. – La melodio estas surprize bona.

Komparo

Komparo de adverboj funkcias precize kiel [komparo de adjektivoj](#).

Bazaj adverboj

Krom grandega nombro da adverboj derivitaj de adjektivoj, Elefeno havas kelkaj vortojn, kiuj estas nur adverboj:

- **apena** – apenaŭ
- **cisa** – eble
- **cuasi** – preskaŭ
- **tan** – tiom, tiel (*tiagrade*)
- **tro** – tro
- **asi** – ĉi tie
- **ala** – tie
- **an** – eĉ (*kontraŭ tio, kion oni supozus*)
- **ance** – ankaŭ
- **ancora** – ankoraŭ
- **aora** – nun
- **alora** – tiam
- **poi** – (kaj) poste
- **denova** – denove
- **ja** – jam
- **nunca** – neniam
- **sempre** – ĉiam
- **ier** – hieraŭ
- **oji** – hodiaŭ
- **doman** – morgaŭ

Tan estas uzata en elkrioj:

- Un vista **tan** bela! – Kia bela panoramo!
- **Tan** stonante! – Kiel mirinde!

Kvantaj adverboj

Oni povas konverti kelkajn [difnilojn](#) al adverboj, kiuj indikas, je kiu grado io estas vera:

- **no** – ne
- **alga** – iom
- **multe** – multe
- **poca** – malmulte
- **plu** – pli
- **min** – malpli
- **la plu** – (la) plej
- **la min** – (la) malplej

No kiel adverbo signifas “ne”, “je neniuj grado”. Ĝi neas tion, kion ĝi modifas. Kiel aparta okazo, kiam ĝi modifas verbon, ĝi staras *antaŭ* la verbo:

- Los **no** va comprende. – Ili ne komprenos.
- Nos ave **no** sola un orania, ma ance du bananas. – Ni havas ne nur oranĝon, sed ankaŭ du bananojn.
- O, **no** esta problem denova! – Ho, ne tiu ĉi problemo denove!

Alga kiel adverbo signifas “iom”, “sufiĉe”, “je iu grado”:

- Acel es un caso **alga** spesial. – Tio estas iom aparta okazo.

- **Alga** confusada, el ia cade en la lago. – Iom konfuzita, li falis en la lagon.

Multe kiel adverbo signifas “multe”, “tre”, “je alta grado”, “en alta kvanto”:

- Me es **multe** coler. – Mi estas tre kolera.
- El ama **multe** la femes. – Li multe amas virinojn.

Poca kiel adverbo signifas “malmulte”, “nur iomete”, “je nur malalta grado”, “en nur malalta kvanto”:

- Me es **poca** interesada. – Mi malmulte interesiĝas.
- El core **poca**. – Li kuras malmulte.

Plu kaj **min** kiel adverboj signifas “pli” kaj “malpli”, “je pli alta grado” kaj “je malpli alta grado”, “en pli granda kvanto” kaj “en malpli granda kvanto”:

- Tu aspeta **plu** joven ca me. – Vi aspektas pli june ol mi.
- No parla **plu**. – Ne plu parolu.
- Me es **min** contente con la resulta ca me ta prefere. – Mi estas malpli kontenta kun la rezulto, ol mi preferus.

La plu kaj **la min** kiel adverboj signifas “plej” kaj “malplej”, “je la plej alta grado” kaj “je la plej malalta grado”, “en la plej granda kvanto” kaj “en la plej malgranda kvanto”:

- “Pardona” es la parola **la plu** difisil. – “Pardonu” estas la plej malfacila vorto.

- El es la om **la min** interesante en la mundo. – Li estas la malplej interesa homo en la mondo.
- A **la min**, nos ave ancora la un la otra. – Almenaŭ ni ankoraŭ havas unu la alian.

Demandaj kaj rilataj adverboj

La jenajn adverbojn oni povas uzi plurmaniere:

- **cuando** – kiam
- **do** – kie
- **como** – kiel
- **cuanto** – kiom
- **perce** – kial

Ili kreas rektajn kaj nerektajn [demandojn](#), kaj ili enkondukas [rilatajn subfrazojn](#). Per etendiĝo de sia rilata uzo, ili kondukas ankaŭ kiel [konjunkcioj](#) enkondukantaj adverbecajn subfrazojn – ekzemple **cuando** estas tiam mallongigo por **a la tempo cuando**. Oni povas enkonduki ilin ankaŭ per [prepozicioj](#).

Cuando signifas “kiam” (**a cual tempo, en cual tempo**):

- **Cuando** nos va come? – Kiam ni manĝos?
- La enfante demanda **cuando** nos va come. – La infano demandas kiam ni manĝos.
- En la anio **cuando** me ia nase, la clima ia es multe calda. – En la jaro, kiam mi naskiĝis, la vetero tre varmis.
- **Cuando** nos ariva, me va dormi. – (Je la tempo) kiam ni alvenos, mi dormos.

- Nos va canta **ante cuando** nos dansa. – Ni kantos, antaŭ ol ni dancos.
- Nos va dansa **pos cuando** nos canta. – Ni dancos, post kiam ni kantos.
- Nos va dansa **asta cuando** nos adormi. – Ni dancos, ĝis ni endormiĝos.

Do signifas “kie” (**a cual loca, en cual loca**). Kiam oni uzas ĝin kun verbo de moviĝo, **do** ofte signifas “kien”:

- **Do** es la can? – Kie estas la hundo?
- Me no sabe **do** nos vade. – Mi ne scias, kien ni iras.
- En la pais **do** me ia nase, la clima es multe calda. – En la lando, kie mi naskiĝis, la vetero tre varmas.
- El ia dormi **do** el sta. – Li dormis, kie li staris.
- Me veni **de do** tu ia visita me. – Mi venas de tie, kie vi vizitis min.
- La polisior ia desinia un sirculo **sirca do** el ia trova la clave. – La policano desegnus cirklon ĉirkaŭ tie, kie ŝi trovis la ŝlosilon.

Como signifas “kiel”, “kiumaniere” (**en cual modo**). Ĝi funkcias ankaŭ kiel [prepozicio](#) signifanta “simile al”, “ekzemple”:

- **Como** tu conose mea nom? – Kiel vi konas mian nomon?
- Me no comprende **como** tu conose mea nom. – Mi ne komprenas, kiel vi konas mian nomon.
- La manera **como** tu pasea es riabile. – La maniero, en kiu vi piediras, estas ridinda.
- Me parla **como** me pensa. – Mi parolas, kiel mi pensas.

- La describe ia difere multe **de como** la loca aspeta vera. – La priskribo multe malsamis, ol kiel la loko vere aspektas.
- Tua oios es **como** los de un falcon. – Viaj okuloj estas kiel tiuj de falko.

Cuanto signifas “kiom” (**en cual cuantia**). Ĝi funkcias ankaŭ kiel [kvanta difinilo](#) kun la sama signifo:

- **Cuanto** la orologio costa? – Kiom kostas la horloĝo?
- **Cuanto** tu ia compra? – Kiom vi aĉetis?
- **Cuanto** tu desira esta torta? – Kiom vi deziras ĉi tiun kukon?
- Me va demanda **cuanto** ia ariva. – Mi demandos, kiom alvenis.
- Nos va aida **cuanto** nos pote. – Ni helpos tiom, kiom ni povos.
- Tu conose **cuanto** me ama tu? – Ĉu vi scias, kiom mi amas vin?

Perce signifas “kial” (plursence: **par cual causa, per cual razona, con cual intende**). La respondaj [konjunkcioj](#) estas **car** (“ĉar”, “pro tio, ke”) and **afin** (“por ke”, “kun la intenco, ke”). Oni ĉiam uzas la specialan vorton **perce**, kaj ne **per cual**:

- **Perce** tu core? – Kial vi kuras?
- La fem ia demanda **perce** la fenestra es rompeda. – La virino demandis, kial la fenestro estas rompita.

Verboj

Tipa verbo indikas la okazon aŭ ĉeson de iu ago (kuri, halti), rilato (havi, perdi), aŭ stato (stari, fandi). En Elefeno, verboj ne ŝanĝiĝas por indiki tiajn aferojn kiel tempo aŭ modo. Anstataŭe oni uzas adverbojn – precipe la tri antaŭverbaĵojn **ia**, **va**, kaj **ta**. Oni povas [senŝanĝe reuzi iun ajn verbon](#) kiel [substantivon](#).

Tempo

La estontan tempon oni markas per **va** (vorto de franca origino). Pasintajn tempojn, inkluzive de la perfekta kaj la pluskvamperfekta, oni markas per **ia** (de ĉabakana origino). Ĉi tiuj estas specialaj adverboj, kiuj staras *antaŭ* la verbo. La prezencon oni ne markas:

- Me **canta**. – Mi kantas.
- Me **va canta**. – Mi kantos.
- Me **ia canta**. – Mi kantis / Mi estas kantinta / Mi estis kantinta.

Rakontoj ofte priskribas aferojn, kiuj okazas en la pasinteco (aŭ en imagata pasinteco), aŭ kies tempa situo tute ne gravas al la leganto. En tiaj okazoj, oni povas ellasi la vorton **ia**.

Elefeno ne distingas perfektan kaj neperfektajn aspektojn de la verbo (ekz. “mi manĝis”, “mi estas manĝinta”, “mi estis

manĝinta”). Oni povas tamen facile klarigi la tempan sinsekvon de du agoj, se oni markas la pli fruan per **ja** (“jam”):

- Cuando tu ia encontra nos, nos **ia come ja**. – Kiam vi renkontis nin, ni jam manĝis.
- Si tu reveni doman, me **va fini ja** la labora. – Se vi revenos morgaŭ, mi estos (jam) fininta la laboron.
- Sempre cuando me ateni la fini de un capitol, me **oblida ja** la titolo. – Kiam ajn mi atingas la finon de ĉapitro, mi (jam) forgesis la titolon.

Oni povas klarigi la tempan sinsekvon alimaniere:

- Me ia come **ante aora**. – Mi manĝis antaŭ nun.
- Me ia come **plu temprana**. – Mi manĝis pli frue.
- Me ia **fini** come. – Mi finis manĝi.
- Me va come **pronto**. – Mi baldaŭ manĝos.
- Me **comensa** come. – Mi komencas manĝi.
- Me va come **pos acel**. – Mi manĝos post tio.
- Me va come **plu tarda**. – Mi manĝos poste.
- Me ia **abitua** come en la note. – Mi kutimis manĝi nokte.
- Me ia come **abitual** en la note. – Mi kutimis manĝi nokte.

Elefeno havas ankaŭ nedevigan partikulon **ta** (de haitia origino), kiun oni povas uzi por indiki, ke io estas nereala, aŭ dubata, aŭ nur ebla aŭ dezirata. Frazo kun **ta** parolas pri alternativa mondo. En tia frazo kun **si**, oni aldonas **ta** en la ĉeffrazon, sed oni kutime preterlasas ĝin en la **si**-subfrazo – sed oni ne malpermesas ĝin inkluzivi. **Ta** povas sugesti malpli probablan estontecon ol tiu de **va**. **Ta** povas ankaŭ indiki ĝentilan demandon. Oni povas uzi ĝin

en diversaj situacioj, kie multaj lingvoj uzus subjunktivan aŭ kondiĉan modon, kaj ĝi ofte respondas al la esperanta finaĵo ”-us”:

- Si me **ta rena** la mundo, cada dia ta es la dia prima de primavera. – Se mi regus la mondon, ĉiu tago estus la unua tago de printempo.
- Si lo no esiste, on **ta debe** inventa lo. – Se ĝi ne ekzistus, oni devus inventi ĝin.
- Si tu canta, me va escuta. – Se vi kantos, mi aŭskultos.
- Si tu va canta, me va escuta. – Se vi kantos, mi aŭskultos.
- Si tu canta, me **ta escuta**. – Se vi kantus, mi aŭskultus.
- Si tu **ta canta**, me **ta escuta**. – Se vi kantus, mi aŭskultus.
- Me duta ce tu **ta dise** acel. – Mi dubas, ke vi dirus tion.
- Tu **ta dona** la sal, per favore? – Ĉu vi bonvolus doni la salon?

Normale, oni povas uzi nur unu el **va**, **ia**, kaj **ta** kun ĉiu verbo. Escepta kazo estas **ia ta**, kiu samsignifas kiel la kondiĉan preteriton en la latinidaj lingvoj, “would have” en la angla, kaj “estus -inta” en esperanto. Ekzemple, Richard Nixon rimarkigis distre:

- Me **ia ta** es un bon pape. – “*I would have made a good pope.*”
(Mi estus estinta bona papo.)

Kiel en esperanto, nereкта parolo retenas la tempon de la rekta diro:

- El ia dise ce la sala **es** fria. = El ia dise: “Oji, la sala **es** fria.” –
Li diris, ke la ĉambro estas malvarma. = Li diris: “La ĉambro

estas malvarma hodiaŭ.”

- El ia demanda esce la sala **es** fria. = El ia demanda: “Esce la sala **es** fria?” – Li demandis, ĉu la ĉambro estas malvarma. = Li demandis: “Ĉu la ĉambro estas malvarma?”
- El ia pensa ce la sala **ia es** fria. = El ia pensa: “Ier, la sala **ia es** fria.” – Li pensis, ke la ĉambro estis malvarma. = Li pensis: “La ĉambro estis malvarma hieraŭ.”

Imperativo

La imperativon, aŭ ordonformon de la verbo, oni ne markas. Ĝi malsamas de la prezenco per tio, ke oni ellasas la subjekton. La subjekto estus normale **tu** aŭ **vos**, do la persono(j), al kiu(j) oni parolas. Oni povas uzi **ta** aŭ **ta ce**, se oni bezonas inkluzivi subjekton:

- **Para!** = Haltu!
- **Pardona** me. – Pardonu min.
- **Toca** la tecla de spasio per continua. – Puŝu la spacostangon por daŭrigi.
- **Vade** a via, per favore! = Bonvolu foriri!
- Ta ce tua rena **veni!** – (Mi deziras, ke) via regno venu!
- Ta ce nos **dansa!** – Ni dancu!

Neado

Oni neas verbojn per la adverbo **no**, kiu staras *antaŭ* kaj la verbo kaj **va**, **ia**, aŭ **ta**:

- Me **no labora** oji, e me **no va labora** doman. – Mi ne laboras hodiaŭ, kaj mi ne laboros morgaŭ.
- El **no ia pensa** ce algun es asi. – Li ne pensis, ke iu estas ĉi tie.
- **No traversa** la strada sin regarda. – Ne transiru la straton sen rigardi.

Participoj

Participo estas verbo uzata kiel adjektivo aŭ adverbo. Verboj formas aktivan participon per **-nte**, kaj pasivan participon per **-da**. Ĉi tiuj estas [adjektivoj](#) respondaj al tiuj formeblaj per ”-anta” kaj ”-ita” (aŭ ”-ata”) en esperanto, kaj oni povas ilin uzi egale bone kiel [adverbojn](#) kaj [substantivojn](#). La aktiva participo implicas normale disvolviĝantan agon, dum la pasiva participo sugestas, ke la ago okazis en la pasinteco:

- Un ruĉido **asustante** ia veni de la armario. – Timiga bruo venis de la ŝranko. (*adjektivo*)
- La om **creante** scultas es amirabile. – La viro kreanta skulptaĵojn estas admirinda. (*adjektivo; = la om ci crea scultas*)
- El ia sta **tremante** en la porte. – Ŝi staris tremante en la pordo. (*adverbo*)
- Nos ia colie tota de la **composantes**. – Ni kolektis ĉiun el la komponantoj. (*substantivo*)
- Per favore, no senta sur la seja **rompeda**. – Bonvolu ne sidi sur la rompita seĝo. (*adjektivo*)
- El ia leje **xocada** la reporta. – Li legis la raporton ŝokite. (*adverbo*)

- Sua novela va es un **bonvendeda**. – Ŝia romano estos furoraĵo. (*substantivo*)

La aktiva participo povas havi objekton. Krome, oni povas uzi ĝin kiel komplementon de la verbo **es** por transdoni progresan sencon:

- Me **es** lenta **asorbente** la informa. – Mi estas malrapide sorbanta la informon.
- Me no ia disturba tu, car tu **ia es laborante**. – Mi ne ĝenis vin, ĉar vi estis laboranta.

Sed participa konstruo ofte ne necesas, ĉar tiun signifon oni povas esprimi alimaniere:

- Me **asorbe** **lenta** la informa. – Mi malrapide sorbas la informon.
- Vade a via, me **labora**. – Foriru, mi laboras.
- Me **continua** come. – Mi daŭrigas manĝi.
- Me come **continual**. – Mi daŭre manĝas.
- Me come **tra la dia intera**. – Mi manĝas tra la tuta tago.

La pasivan participon oni povas uzi kiel komplementon de la verboj **es** aŭ **deveni**, donante pasivan sencon. **Par** (“de”, “fare de”) enkondukas la faranton de pasiva ago:

- Esta sala **ia es pintida** par un bufon. – Ĉi tiu ĉambro estas farbita de klaŭno.
- La sala **deveni pintida**. – La ĉambro estas farbata.

- Acel ponte **ia es desiniada par** un inĵenier famosa. – Tiu ponto estis fasonita de konata inĵenierio.
- Lo **ia deveni konoseda** ce el ia es un om perilosa. – Fariĝis konate, ke li estas/estis danĝera viro.

Aktiva frazo kun **on** aŭ **algun** kiel sia subjekto estas ofte eleganta alternativo por pasiva frazo:

- **On** pinti la sala. – Oni farbas la ĉambron.
- **On** no sabe cuanto persones teme arañas. – Oni ne scias, kiom da homoj timas araneojn.
- **Algun** ia come lo. – Ĝi estis manĝita de iu.

La aktiva participo de **es** estas **esente**:

- **Esente** un bufon, el ia senta sur la seja rompeda. – Estante klaŭno, li sidiĝis sur la rompita seĝo.

Transitiveco

Transitiva verbo estas verbo, kiun oni povas rekte sekvigi per [substantiva vortgrupo \(objekto\)](#), sen intervena [prepozicio](#).

Netransitiva verbo ne havas tian objekton. Ekzemple:

- Me **senta**. – Mi sidas. (**senta** estas *netransitiva*)
- La patatas **coce**. – La terpomoj kuirigās. (**coce** estas *netransitiva*)
- El **usa** un computador. – Ŝi uzas komputilon. (**usa** estas *transitiva*)

- Los **come** bananas. – Ili manĝas bananojn. (**come** estas transitiva)

Transitiveco estas fleksebla en Elefeno. Ekzemple, se oni aldonas objekton post netransitiva verbo, la verbo fariĝas transitiva. La objekto semantike respondas al la netransitiva subjekto, kaj la verbo nun signifas “igas (la objekton) ...i”:

- Me **senta** la enfantes. – Mi sidigas la infanojn. (= *Me causa ce la enfantes senta*)
- Me **coce** la patatas. – Mi kuiras la terpomojn. (= *Me causa ce la patatas coce*)

Oni povas ellasi la objekton de transitiva verbo, se ĝi evidentas pro la situacio aŭ la kunteksto:

- El **canta** un melodia. – Ŝi kantas melodion. > El **canta**. – Ŝi kantas. (= *El canta alga cosa*)

Kiam la objekto kaj subjekto de verbo estas la sama afero, oni povas uzi refleksivan pronomon kiel la objekton:

- Me **senta me**. – Mi sidigas min / mi sidiĝas. (= *Me deveni sentante*)
- La porte **abri se**. – La pordo malfermas sin / malfermiĝas. (= *La porte abri – sed kun emfazo, ke neniu ŝajnas ĝin malfermi; ĝi mem ŝajne sin malfermas*)

Kaj por klarigi, ke oni uzas verbon transitive, oni povas uzi esprimojn kun **fa** aŭ **causa**:

- Me **fa** ce la infantes senta. – Mi igas la infanojn sidi. (= Me senta la infantes)
- Me **causa** ce la fango adere a mea botas. – Mi igas la koton gluiĝi al miaj botoj. (= Me adere la fango a mea botas)

En iuj lingvoj, la objekto de transitiva verbo povas havi komplementon. Elefeno uzas aliajn strukturojn anstataŭe:

- Los ia eleje el **a** presidente. – Ili elektis lin prezidanto. (prepozicio de rezulta stato)
- Me ia pinti la casa **a** blanca. – Mi farbis la domon blanka. (prepozicio de rezulta stato)
- Me ia fa ce el **es** felis. – Mi faris lin feliĉa. (substantiveca subfrazo)
- El ia dise **ce** me es stupida. – Li nomis min stulta. (substantiveca subfrazo)

La unusola escepto temas pri la verbo **nomi**, kaj oni rigardas ĝin ekzemplo de [apozicio](#)

- La esplorores ia nomi la rio **la Amazon**. – La esploristoj nomis la riveron Amazono. (= los ia dona la nom “la Amazon” a la rio)

Verboj kun truŝtopaj subjektoj

Ĉiu finitiva verbo en Elefeno havas subjekton, eĉ se ĝi nur ŝtopas truon.

En iuj lingvoj, oni povas preterlasi la subjekton de verbo, kiu rilatas al la vetero aŭ la ĝenerala medio. En Elefeno, oni uzas **lo** (“ĝi”):

- **Lo neva.** – Neĝas.
- **Lo va pluve.** – Pluvos.
- **Lo es** tro calda en esta sala. – Tro varmas en ĉi tiu ĉambro.
- **Lo es** bon – Estas bone.

Alia ekzemplo okazas, kiam la subjekto estas efektive vosta [substantiveca subfrazo](#). Ĉar ĝi sekvas la verbon, oni uzas **lo** kiel ŝtopsubjekton:

- **Lo pare** ce tu es coreta. – Ŝajnas, ke vi pravas.
- **Lo es** importante ce me no oblida esta. – Gravas, ke mi ne forgesu ĉi tion.

Simile ĉe la verbo **es**, se la subjekto estas pronomo (tipe **el**, **lo**, aŭ **los**) priskribata de [rilata subfrazo](#), eblas movi la rilatan subfrazon ĝis la fino de la frazo kaj ekuzi **lo** kiel ŝtopsubjekton:

- **Lo es** me **ci** ama Maria. = **El ci** ama Maria **es** me. – Estas mi, kiu amas Marian. = Tiu, kiu amas Marian, estas mi.
- **Lo es** Maria **ci** me ama. = **El ci** me ama **es** Maria. – Estas Maria, kiun mi amas. = Tiu, kiun mi amas, estas Maria.
- **Lo es** la bal blu **cual** me ia perde. = **Lo cual** me ia perde **es** la bal blu. = La bal blu **es lo cual** me ia perde. – Estas la blua pilko, kiun mi perdis. = Tio, kion mi perdis, estas la blua pilko. = La blua pilko estas tio, kion mi perdis.

On ave indikas la ĉeeston aŭ ekziston de io:

- **On ave** un serpente en la rua. – Estas serpento sur la vojo.
- **On no ave** pexes en esta lago. – Ne estas multe da fiŝoj en ĉi tiu lago.
- **On ave** multe persones asi oji. – Estas multaj homoj ĉi tie hodiaŭ.

Verboj kiel substantivoj

En Elefeno oni povas uzi verbon kiel substantivon en du manieroj: la **infinitivo** kaj la **verba substantivo**.

La infinitivo enkondukas apartan tipon de [substantiveca subfrazo](#), nomitan “infinitiva subfrazo”, kies signifo similas al subfrazo enkondukita de **ce**. La infinitivo ankoraŭ vere estas verbo, kaj oni povas sekvi ĝin per adverboj kaj objekto aŭ negi ĝin per antaŭmeto de la vorto **no**. Grave, ĝi ne akceptas subjekton aŭ indikilon pri tempo aŭ modo. Tiujn oni komprenas laŭ la kunteksto.

Oni plej ofte uzas infinitivon kiel la objekton de alia verbo. La subjektoj de ambaŭ verboj estas kutime la sama afero, sed ili povas esti malsamaj, se la signifo sugestas tion, kiel en la ĉi-suba ekzemplo kun **proibi come**:

- Me espera **ariva ante tua parti**. – Mi esperas alveni, antaŭ via foriro.
- Me ia gusta multe **escuta oji mea musica**. – Mi multe ĝuis aŭskulti mian muzikon hodiaŭ.

- On pote nunca **spele coreta mea nom.** – Oni povas neniam ĝuste literumi mian nomon.
- El teme no **velia en la matina.** – Li timas ne vekigi en la mateno.
- La empleor proibi **come sanduitxes en la ofisia.** – La dunganto malpermesas manĝi sandviĉojn en la oficejo.

Infinativon oni ofte trovas ankaŭ post [prepozicio](#), kie ĝi ankoraŭ povas akcepti **no** antaŭ si kaj adverbojn kaj objekton post si:

- Me viaja per **vide la mundo.** – Mi vojaĝas por vidi la mondon.
- El ia mori pos **nomi sua susedor.** – Ŝi mortis nominte sian sekvonton.
- El ia abri la noza par **colpa lo forte con un martel.** – Li malfermis la nukson frapante ĝin forte per martelo.
- On no pote pasea tra la mundo sin **lasa impresas de pede.** – Oni ne povas promeni tra la mondo sen lasi piedsignojn.

Kontraste, la verba substantivo estas simpla substantivo, kaj **la** aŭ alia difinilo normale staru antaŭ ĝi. La substantivo indikas aŭ okazon de la verba ago, aŭ ties rektan rezulton. Ĝi povas akcepti adjektivojn, sed oni devas uzi prepozicion (ofte **de**), se oni volas inkluzivi objekton:

- Sua **condui** ia es vera xocante. – Lia konduto estis vere ŝoka.
- El ia destrui sua **labora** intera. – Ŝi detruis sian tutan laboron.
- La valsa e la samba es **dansas.** – La valso kaj la sambo estas dancoj.

- Esta va es un **ajunta** bela a la ragu. – Tio ĉi estos bela aldono al la stufaĵo.
- Me ia prepara du **traduis** de la testo. – Mi preparis du tradukojn de la teksto.
- Tu ave no **comprende** de la problemes. – Vi havas nenian komprenon pri la problemoj.
- “LFN” es un **corti** de “Lingua Franca Nova”. – “LFN” estas mallongigo de “Lingua Franca Nova”.
- La universo ia es extrema peti a la momento de sua **crea**. – La universo estis ege malgranda je la momento de sia kreo.

Kun tia verbo kiel **ajunta**, malmulte da diferenco ekzistas inter **un ajunta** kaj **un ajuntada**. Sed **la traduida** estas la origina teksto, el kiu oni produktas **la tradui**, kaj **un crea** estas ago de krei **un creada**. Ĉi tio sekvas el la signifoj mem de la objektoj de la verboj: **-da** ĉiam indikas la objekton. Kun **crea**, la objekto estas ankaŭ la rezulto de la ago; sed kun **tradui**, la objekto kaj la rezulto estas du malsamaj aferoj. Kun malmultaj verboj, ekzemple **dansa**, kie la objekto kaj la ago estas la samaj, oni parolas pri **un dansa**, ne **un dansada**.

Oni povas uzi infinitivan subfrazon kiel la subjekton de frazo:

- **Nada** es un eserse gustable. – Naĝi estas agrabla ekzerco.
- **Nada en fango** no es un eserse gustable. – Naĝi en koto ne estas agrabla ekzerco.
- **Scrive la novela** ia aida el a boni sua stilo. – Verki la romanon helpis ŝin plibonigi sian stilon.

Sed, skribe, se infinitiva subfrazo estas tro longa, legantoj eble riskas miskompreni la infinitivon kiel imperativon, ĝis ili atingos la ĉefan verbon de la frazo. Por eviti tion, oni povas ŝanĝi la infinitivon al verba substantivo per aldono de **la** aŭ alia difinilo antaŭ ĝi, aŭ per pluraligo:

- **Nada en fango** no es un eserse gustable. – La naĝado en koto ne estas agrabla ekzerco.
- **La scrive de la novela** ia aida el a boni sua stilo. – La verkado de la romano helpis ŝin plibonigi sian stilon.
- **Eras** es umana, **pardonas** es divin. – Erarado estas homa, pardonado estas dia / Erari estas home, pardoni estas die.

Prepozicioj

Prepozicio estas speciala vorto, kiu enkondukas [substantivan vortgrupon](#), forminte **prepozician vortgrupon**. Prepozicia vortgrupo tipe modifas antaŭan substantivon, pronomon, adjektivon, aŭ adverbon – aŭ ĝi povas modifi tutan frazon. La prepozicio indikas, kiel la substantiva vortgrupo rilatas al la enhavanta strukturo, montrante la rolon, kiun ĝi ludas en la modifo.

Elefeno havas 22 prepoziciojn.

a

A signifas “ĉe”. Ĝi prezentas lokon aŭ tempon kiel simplan punkton, aŭ kiel ĝeneralan spacon aŭ periodon, ignorante ties internan strukturon:

- Nos senta **a** la table. – Ni sidas ĉe la tablo.
- Me va encontra tu **a** la crus de vias. – Mi renkontos vin ĉe la vojkruciĝo.
- La scala apoa **a** la mur. – La ŝtupetaro apogas sin ĉe la muro.
- Tua casa es **a** lado de mea casa. – Via domo estas flanke de mia.
- El reposa **a** casa. – Li restas hejme.
- Sudan es **a** sude de Misre. – Sudano estas sude de Egiptujo.
- La barco es **a** mar. – La barko estas sur la maro.

- El ia fini la labora **a** la comensa de la anio. – Ŝi finis la laboron komence de la jaro.
- **A** medianote, on va vide focos artal. – Je noktomezo okazos artfajraĵoj.
- Me debe parti **a** la ora des-ses. – Mi devas foriri je la dek-sesa horo.

Per metafora etendiĝo, **a** enkondukas la referencpunkton en rilato:

- Tu sta tro prosima **a** la borda. – Vi staras tro proksime al la bordo.
- La forma de Italia es simil **a** un gama. – La formo de Italujo similas al kruro.
- Esta pen parteni **a** me. – Ĉi tiu skribilo apartenas al mi.
- Cual aveni si on no conforma **a** la regulas? – Kio okazas, se oni ne konformigas sin al la reguloj?
- **A** la min tredes persones espeta. – Almenaŭ tridek homoj atendas.

Krome, **a** povas esprimi movon direkte al punkto. Tio inkluzivas tiajn metaforajn movojn kiel transdonoj al ricevantoj, kaj ŝanĝoj al novaj statoj:

- Me viaja **a** New York. – Mi vojaĝas al Novjorko.
- Pone tua libros **a** via. – Formetu viajn librojn.
- El leva sua oios **a** la sielo. – Li levas la okulojn al la ĉielo.
- El ia dona un oso **a** la can. – Ŝi donis oston al la hundo.
- La sorsor ia cambia se **a** un capra. – La sorĉisto ŝanĝis sin en kapron.

- La seja ia cade **a** pesos. – La seĝo falis en pecojn.
- La xico ia ajunta sua nom **a** la lista. – La knabo aldonis sian nomon al la listo.
- Dise **a** me tua nom. – Diru al mi vian nomon.
- Me no va responde **a** acel demanda. – Mi ne respondos al tiu demando.
- Nos desira **a** tu un bon aniversario. – Ni deziras al vi bonan datrevenon.
- Tua idea pare asurda **a** me. – Via ideo ŝajnas absurda al mi.
- Me pasea longo la strada, de un fini **a** la otra. – Mi promenas laŭ la strato, de unu fino al la alia.
- Tu irita me de tempo **a** tempo. – Vi agacas min de tempo al tempo.
- La note progresas **a** la lus prima. – La nokto progresas al la tagiĝo.
- De lundĵ **a** jovedi es cuatro dias. – De lundo al ĵaŭdo estas kvar tagoj.

Fakte iu ajn prepozicio, kiu indikas lokon, povas indiki ankaŭ movon direkte al tiu loko. Ekzemple, en **me pone mea libros en mea sacco** (“mi metas miajn librojn en mian sakon”), **en** evidente implicas movon en la sakon, ne jam en la sako. Kiam oni bezonas aldonan klarecon, oni povas meti **a** antaŭ la prepozicio por klarigi la sencon de movo direkte al io:

- Core **a** la casa. – Kuru al la domo.
- Core **en** la casa. – Kuru en la domo.
- Core **a en** la casa. – Kuru en la domon.
- La gato salta **sur** la table. – La kato salta sur la tablo/tablon.

- La gato salta **a sur** la table. – La kato salta sur la tablon.

Aparta uzo de **a** estas por ebligi la uzon de prepozicio sen sekvanta substantiva vortgrupo, do kiel [adverbo](#). Se la prepozicio montras lokon, la kombinaĵo sugestas movon en la indikita direkto. **A ante** kaj **a pos** estas ankaŭ uzataj por indiki antaŭajn aŭ postajn *tempojn*:

- La can core **a ante**. – La hundo kuras antaŭen/antaŭe.
- Tu pote pone tua sako **a supra**. – Vi povas meti vian sakon supren.
- La sumerjor ia vade **a su**. – La plongisto iris malsupren.
- Vide **a su**. – Vidu sube.
- Me ia visita esta vila **a ante**. – Mi vizitis ĉi tiun urbon antaŭe.
- Nos pote reveni **a pos**. – Ni povas reveni poste.

Alia aparta uzo de **a** ebligas aldoni komplementon al la objekto de frazo. (Iafoje eblas tiel uzi ankaŭ aliajn prepoziciojn.)

- El ia pinti sua casa **a blanca**. – Li farbis sian domon blanka.
- Me va servi la gambas **a/en** fria. – Mi prezentos la salikoketojn malvarmaj.
- Los ia eleje Maria **a/per** presidente. – Ili elektis Marian prezidanto.

La komplemento povas esti infinitivo. Eblas uzi **per** anstataŭ **a**, sed tiam la signifo estas, ke la subjekto de la ĉefverbo intencas fari la agon de la infinitivo. **A** indikas, ke la subjekto celas, ke la objekto ĝin faru:

- El komando la soldatojn **a** ataca la fortreson. – Li ordonas la soldatojn ataki la fortreson.
- Me va instrui vos **a** parli la lingvon. – Mi instruos vin paroli la lingvon.

ante

Ante signifas “antaŭ”. Ĝia malo estas **pos**.

En spaco, ĝi indikas lokon ĉe la pli grava flanko de specifa objekto. Kiu flanko estas pli grava, tio dependas de la objekto kaj ĝia situacio. Multaj aferoj havas evidentan antaŭan flankon, kun kiu ili alfrontas la mondon; aliookaze **ante** signifas nur “ĉe la pli proksima flanko de”:

- Mea peto estas **ante** mea dorso. – Mia brusto estas antaŭ mia dorso.
- La gazetoj estas **ante** la librojn. – La gazetoj estas antaŭ la libroj.
- Ĝi estas tiel mallume, ke mi ne povas vidi miajn manojn **ante** miaj ojoj. – Estas tiel mallume, ke mi ne povas vidi mian manon antaŭ la okulojn.
- Unu hundo reposedas **ante** la botekojn. – Hundo kuŝas antaŭ la butikojn.
- Ni havas multe da laboro **ante** ni. – Ni havas multe da laboro antaŭ ni.

En tempo **ante** indikas punkton pli fruan ol specifa tempo:

- Janaro venas **ante** februaro. – Janaro venas antaŭ februaro.
- Ili intencas fini la laboron **ante** la sunsubiro. – Ili intencas fini la laboron antaŭ la sunsubiro.

- Verje a sinistra **ante** la fini de la strada. – Turnu vin dekstren antaŭ la fino de la strato.
- Nos esperia la lampo **ante** la tona. – Ni spertas la fulmon antaŭ la tondro.

Ante povas ankaŭ indiki movon al loko antaŭ io (= **a ante**):

- On ia pone un monton de libros **ante** me. – Oni metis amason da libroj antaŭ mi/min.
- Me veni **ante** tu per demanda per tua pardona. – Mi venas antaŭ vin por pardonpeti.

Ante cuando, aŭ **ante ce**, signifas “antaŭ ol”, subjunkcie (“antaŭ la tempo, kiam”):

- Nos vide la lampo **ante cuando** nos oia la tona. – Ni vidas la fulmon, antaŭ ol ni aŭdas la tondron.

asta

Asta signifas “ĝis” specifa objekto aŭ loko:

- El ia accompany me **asta** mea auto. – Ŝi akompanis min ĝis mia aŭto.
- La tera es covreda con neva **asta** la montania. – La tero estas kovrita per neĝo ĝis la montoj.
- Me es empapada **asta** mea pel. – Mi estas trempita ĝis mia haŭto.
- La custa ia cade **asta** sola un euro. – La prezo falis ĝis nur unu eŭro.

- El ia visita cada pais de Andora **asta** Zambia. – Li vizitis ĉiun landon de Andoro ĝis Zambio.
- Studia la pajes dudes-sinco **asta** cuatrades-du. – Studu paĝojn 25 ĝis 42 (inkluzive).

Ĉi tio kondukas al la tempa senco de **asta**, kiu estas ankaŭ “ĝis”:

- El labora **asta** medianote. – Li laboras ĝis noktomezo.
- Espeta **asta** la estate. – Atendu ĝis la somero.
- **Asta** doman! – Ĝis morgaŭ!

ca

Ca signifas “ol”. Ĝi indikas la referencpunkton por neegaleca komparo:

- Mea can es plu inteligente **ca** me. – Mia hundo estas pli inteligenta ol mi.
- Acel es multe min interesante **ca** esta. – Tio estas multe malpli interesanta ol tio ĉi.
- La sielo e tera ave plu cosas **ca** tu imagina en tua filozofia. – La ĉielo kaj la tero havas pli da aferoj, ol vi imagas en via filozofio.

como

Como signifas “kiel”. Ĝi indikas la referencpunkton por egaleca komparo:

- El rie **como** un iena. — Li ridas kiel hieno.

- Tua cor es dur **como** petra. – Via koro estas malmola kiel petro.
- Iogurte es **como** crema. – Jogurto estas kiel kremo.
- Tu ia veni a la mesma konclui **como** me. – Vi atingis la saman konkludon kiel mi.
- Me pote salta tan alta **como** tu. – Mi povas salti tiel alte kiel vi.
- Condui **como** un adulte. – Konduitu kiel plenkreskulo.

con

Con signifas “kun”. Ĝia malo estas **sin**.

Ĝi enkondukas akompanan ulon, aĵon, aŭ staton:

- Me vide la xica **con** sua padre. – Mi vidas la knabinon kun ŝia patro.
- Los vole come **con** nos. – Ili volas manĝi kun ni.
- Nos bevi cafe **con** lete. – Ni trinkas kafon kun lakto.
- On ia misca la zucar **con** sal. – Oni miksis la sukeron kun salo.
- Los batalia **con** la elementos. Ili batalas kun la elementoj.
- No multe parolas comensa **con** X. – Ne multaj vortoj komenciĝas per X.
- El ia dona a me un libro **con** multe fotos. – Ŝi donis al mi libron kun multaj fotoj.
- Elena es un xica **con** capeles roja. – Elena estas knabino kun ruĝaj haroj.

- La om vea senta **con** un pipa en sua boca. – La maljunulo sidas kun pipo en la buŝo.
- Sua sposa regarda el **con** stona. – Lia edzino rigardas lin kun miro.
- Compara esta **con** la clima de ier. – Komparu ĉi tion kun la hieraŭan veteron.
- Tota cambia **con** la pasa de tempo. – Ĉio ŝanĝiĝas kun la paso de tempo.
- A cada dia, me leva **con** la sol. – Ĉiutage mi leviĝas kun la suno.
- E **con** acel parolas, el ia desapare. – Kaj kun tiuj vortoj li malaperis.

Con povas ankaŭ signifi “per”, prezentante ion, kion uzas kiel ilon:

- Me scribe **con** un pen. – Mi skribas per skribilo.
- Nos oia **con** nosa oreas. – Ni aŭdas per niaj oreloj.
- La cavalo colpa **con** sua pede. – La ĉevalo batas per sia piedo.
- El ia compra un casa **con** la mone cual el ia erita. – Li aĉetis domon kun la mono, kiun li heredis.

Kiam ago okazas per io pli abstrakta aŭ malpli ileca, oni preferas [par](#).

An con signifas “malgraŭ”:

- Nos va fali **an con** tua aida. – Ni malsukcesos malgraŭ via helpo.

contra

Contra signifas “kontraŭ”. Ĝi enkondukas ion, kio frontas aŭ moviĝas en la alia direkto, ĉu vere, ĉu metafore:

- Clui tua oios **contra** la lus. – Fermu viajn okulojn kontraŭ la lumo.
- Esta camera es secur **contra** acua. – Ĉi tiu fotilo estas akvimuna.
- La elinicas antica ia batalia **contra** Persia. – La antikvaj grekoj batalis kontraŭ Persujo.
- La scala es **contra** la serca. – La ŝtupetaro estas kontraŭ la palisaro.
- El lisca e cade **contra** la mur. – Li glitas kaj falas kontraŭ la muro.
- Nada **contra** la flue es difisil. – Naĝi kontraŭ la fluo malfacilas.
- Me es **contra** la gera. – Mi estas kontraŭ la milito.
- Tu ia ata **contra** mea desiras. – Vi agis kontraŭ miaj deziroj.

de

De signifas “de”. Ĝi prezentas ion kiel originon:

- Me es **de** New York. – Mi estas de Novjorko.
- Me viaja **de** Paris a London. – Mi vojaĝas de Parizo al Londono.
- La paperes ia cade **de** la fenestra. – La paperoj falis de la fenestro.

- Me ia reseta un letera **de** la re. – Mi ricevis leteron de la reĝo.
- La furor asconde sua fas **de** la cameras. – La rabisto kaŝas sian vizaĝon de la fotiloj.
- La acua difere **de** la asida par sua cimica. – Akvo diferencas de acido per sia kemio.
- La resulta depende **de** la metodo usada. – La rezulto dependas de la uzata metodo.
- Nos labora ja **de** la lus prima. – Ni jam laboras de la tagiĝo.
- Multe anios ia pasa **de** la gera. – Multaj jaroj pasis de post la milito.
- La table es fada **de** lenio. – La tablo estas farita el ligno.
- Tu gusta carne **de** oveta? – Ĉu vi ŝatas ŝafidaĵon?

Per etendiĝo, **de** enkondukas la ulon aŭ aĵon, al kiu io apartenas:

- Acel es la auto **de** mea frate. – Tio estas la aŭto de mia frato.
- Me gusta escuta la canta **de** la avias. – Mi ŝatas aŭskulti la kantadon de la birdoj.
- El ia es impresada par la cuietia **de** la foresta. – Ŝi estis imponita de la trankvileco de la arbaro.
- Dona un peso **de** torta a me, per favore. – Bonvolu doni al mi pecon de kuko.

Pli abstrakte, **de** ofte indikas ĝeneralan rilaton inter du aferoj, aŭ inter kvalito aŭ ago kaj afero:

- Me ave tre caxas **de** libros per vende. – Mi havas tri skatolojn da librojn por vendi.
- El ia presta a me un tela **de** un color fea. – Ŝi pruntis al mi malbelkoloran tukon.

- La turo ave cuatro metres **de** altia. – La turo estas kvar metrojn alta.
- Esta balde es plen **de** pexes. – Ĉi tiu sitelo estas plena de fiŝoj.
- Nos vole es libre **de** vos. – Ni deziras esti liberaj de vi.
- La ora ia veni per parla **de** multe cosas. – Venis la tempo por paroli pri multaj aferoj.

Tion, kio estus kunmetita substantivo en iuj lingvoj, Elefeno kutime esprimas per du substantivoj ligitaj de **de**:

- Mea oculo **de** sol es rompeda. – Miaj sunokulvitroj estas rompitaĵ.
- La gavota es un avia **de** mar. – La mevo estas marbirdo.
- Esta va es tua sala **de** dormi. – Tio ĉi estos via dormoĉambro.
- Tu ia oblida aplica la freno **de** mano. – Vi forgesis apliki la manbremson.
- Per sua come **de** matina, el bevi sola cafe. – Por sia matenmanĝo li nur trinkas kafon.
- El es la campion **de** mundo **de** tenis **de** table. – Li estas la tablotenisa mondoĉampiono.

De aperas kiel la dua elemento en nombro da fiksaĵoj esprimoj, kiuj funkcias kiel kompleksaj prepozicioj:

- Los ia ajunta tota la ingredientes **con eseta de** la sal. – Ili aldonis ĉiun ingrediencon escepte de la salo.
- Los ia usa zucaro **en loca de** sal. – Ili uzis sukero anstataŭ salo.
- Me es tarda **par causa de** un conĵesta de trafika. – Mi malfruas pro trafikŝtopiĝo.

- La campaneria es **a destra de** laatedral. – La sonorilturo estas dekstre de la katedralo.

Oni povas meti **de** antaŭ alian prepozicion por indiki movon, kiu malproksimiĝas de io:

- La gato salta **de sur** la seĝo. – La kato saltas de sur la seĝo.
- Un arania rampe **de pos** la orologio. – Araneo rampas el malantaŭ la horloĝo.
- La paseros asende **de entre** la arbores. – La paseroj leviĝas el inter la arboj.

Kiel **a**, **de** povas ŝanĝi prepozicion al [adverbo](#). La adverbo signifas “de tiu loko, kiun sugestas la kunteksto”:

- La monstro ia veni **de su**. – La monstro venis de sube.
- La gidoro ia cria **de ante**, ma me ne ia pote oia. – La gvidanto kriis de antaŭe, sed mi ne povis aŭdi.

De cuando, aŭ **de ce**, signifas “de kiam”, subjunkcie (“(jam) de la tempo, kiam”):

- **De cuando** me ia es un enfante, me desira sta sur la luna. – De kiam mi estis infano, mi deziras stari sur la luno.

en

En signifas “en”. Ĝia malo estas [estra](#).

Ĝi indikas lokon en spaco aŭ tempo, kiu estas tute aŭ parte entenata en io alia:

- Mea cor es **en** mea peto. – Mia koro estas en mia brusto.
- La sol es **en** la sielo. – La suno estas en la ĉielo.
- Nos espeta **en** la auto. – Ni atendas en la aŭto.
- La plantas es **en** vasos. – La plantoj estas en vazoj.
- Sua ditos es fisada **en** la manico de un tas. – Liaj fingroj estas fiksitaj en la tenilo de taso.
- Me ave alga pensas **en** mea mente. – Mi havas kelkajn pensojn en mia mento.
- Gatos no gusta es **en** acua. – Katoj ne ŝatas esti en akvo.
- Nos no vide la stelas **en** la dia. – Ni ne vidas la stelojn en la tago.
- Beethoven ia nase **en** 1770. – Betoveno naskiĝis en 1770.
- Nos ia visita la museo **en** febrero. – Ni vizitis la muzeon en februaro.
- El ia scrive la libro **en** tre semanas. – Ŝi verkis la libron en tri semajnoj.

Metafore, la loko povas esti stato, aŭ ago, aŭ maniero:

- Me no vole viaja **en** esta clima. – Mi ne volas vojaĝi en ĉi tiu vetero.
- La konstruida es **en** foco. – La konstruaĵo brulas (“estas en fajro”).
- Nos es **en** peril. – Ni estas en danĝero.
- Esce nos es **en** acorda? – Ĉu ni estas en konsento?
- **En** ajunta, me vide un problem nova. – Aldone mi vidas novan problemon.
- **En** fato, me vide du problemes. – Fakte mi vidas du problemojn.

- Nos ia pasa un ora **en** conversa. – Ni pasigis horon en konversaciado.
- La infantes senta **en** un sirculo. – La infanoj sidas en rondo.
- Me va repete esta **en** elinica. – Mi ripetos ĉi tion en la greka.
- La custas es **en** euros. – La prezoj estas en eŭroj.

En povas indiki ankaŭ “en -n”, do movon al la internon de io (= **a en**):

- El ia cade **en** la rio. – Li falis en la riveron.
- Pone la dejetada **en** la baldon. – Metu la rubaĵon en la rubujon.
- Un bon idea ia veni **en** sua testa. – Bona ideo venis en ŝian kapon.
- Me ia tradui la article **en** franses. – Mi tradukis la artikolon en la francan.
- Nos pasa **en** un eda nova. – Ni pasas en novan epokon.

En cuando, aŭ **en ce**, signifas “dum”, “je punkto en la tempo, kiam”:

- Lo ia comensa pluve forte **en cuando** la reportor ia parla. – Komencis pluvi peze, dum la raportisto parolis.

entre

Entre signifas “inter”. Ĝi indikas, ke unu loko aŭ tempo estas ĉirkaŭata de du aŭ pli multaj aliaj:

- Mea testa es **entre** mea oreas. – Mia kapo estas inter miaj oreloj.
- La table es **entre** la seja e la mur. – La tablo estas inter la seĝo kaj la muro.
- Txesco es **entre** Deutxland, Osteraic, Slovensco, e Polska. – Ĉeĥujo estas inter Germanujo, Aŭstrujo, Slovakujo, kaj Pollando.
- El viaĵa **entre** Paris e Madrid a cada semana. – Ŝi vojaĝas inter Parizo kaj Madrido ĉiusemajne.
- Tu es **entre** amis asi. – Vi estas inter amikoj ĉi tie.
- La bal ia cade **entre** la flores. – La pilko falis inter la florojn.
- Cual es la difere **entre** un mur e un serca? – Kio estas la diferenco inter muro kaj palisaro?
- Elefen promove comunica **entre** poplas. – Elefeno antaŭenigas komunikadon inter popoloj.
- On va ave un interval de des minutos **entre** la du atas. – Okazos dekminuta intervalo inter la du aktoj.
- El ia nase **entre** la geras. – Li naskiĝis inter la militoj.
- Me velia usual **entre** sete e oto. – Mi kutime vekiĝas inter la sepa kaj la oka.
- On debe paia **entre** des e dudes euros. – Oni devas pagi inter dek kaj dudek eŭrojn.

estra

Estra signifas “ekster”. Ĝia malo estas **en**.

Ĝi indikas lokon, kiu *ne* estas entenata en io alia:

- Mea sapato es **estra** mea calseta. – Mia ŝuo estas ekster mia ŝtrumpeto.
- El abita **estra** la site. – Ŝi loĝas ekster la urbo.
- On no ave aira **estra** la barcon. – Ne estas aero ekster la ŝipo.
- Tu es aora **estra** peril. – Vi estas ekster danĝero nun.
- No telefoni **estra** la oras de labora. – Ne telefonu ekster laborhoroj.

Estra povas ankaŭ indiki movon al tia loko (= **a estra**):

- La infantes core **estra** la casa. – La infanoj kuris el la domo.

Metafore, **estra** povas signifi “escepte de”:

- El recorda no cosa **estra** sua nom. – Li memoras nenion krom sian nomon.

longo

Longo havas la spacan signifon de “laŭ”. Ĝi indikas la vojon, kiun io sekvas, dum ĝi moviĝas:

- Me pasea **longo** la strada. – Mi promenas laŭ la strato.
- La balsa ia flota **longo** la rio. – La flosa flosis laŭ la rivero.
- La xico lisca **longo** la ramo. – La knabo glitas laŭ la branĉo.
- Un arania rampe **longo** mea gama. – Araneo rampas laŭ mia kruro.

Per etendiĝo, ĝi povas signifi ankaŭ “laŭ la opinio de” io dirita aŭ verkita:

- **Longo** la predise, oĵi va es an plu calda. – Laŭ la prognozo morgaŭ estos eĉ pli varme.
- La viaĵa tra tempo es posible, **longo** esta fiziciste. – Tempovojaĝoj eblas laŭ ĉi tiu fizikisto.

par

Par signifas ”(fare) de”. Ĝi indikas la faranton de pasiva verbo, aŭ la aŭtoron de kreaĵo:

- El ia es colpada **par** un bal de neva. – Li estis trafita de neĝbulo.
- Me es surprendeda **par** tua reata. – Mi estas surprizita de via reago.
- Suiz es ensircada **par** otra paisas. – Svislando estas ĉirkaŭata de aliaj landoj.
- Hamlet es un teatral **par** Shakespeare. – Hamleto estas teatraĵo de Ŝekspiro.

Per etendiĝo ĝi indikas ankaŭ agon aŭ metodon, per kiu oni faras ion:

- Me ia viaĵa asi **par** tren. – Mi vojaĝis ĉi tien per trajno.
- Roberto es mea fio **par** sposi. – Roberto estas mia bofilo.
- La botelas es codigida **par** color. – La boteloj estas koditaj laŭ koloro.
- Nos ia descovre tua secretas **par** nosa spiores. – Ni eltrovis viajn sekretojn per niaj spionoj.
- La prisonida ia evade **par** asconde su un camion. – La malliberulo eskapis kaŝante sin sub kamiono.

- Me va destrui la serca **par** sola un colpa de pede. – Mi detruos la palisaron per nur unu piedbato.
- On no pote solve esta problem **par** negosia. – Oni ne povas solvi ĉi tiun problemon per intertraktado.

Kiam oni substantivigas [transitivan verbon](#) kaj la subjekto kaj objekto de la verbo estas similspecaj (ekzemple ambaŭ estas homoj), oni uzas **par** por indiki la subjekton kaj **de** aŭ **a** por indiki la objekton:

- La ama **par** la madre. – La amo (fare) de la patrino. (*La patrino amas*)
- La ama **de/a** la madre. – La amo al/de la patrino. (*Oni amas la patrinon*)
- La ataca **de** la troianes **par** la elinicas. – La atako al/de la trojanoj fare de la grekoj. (*La grekoj atakas la trojanojn*)

per

Per signifas “por”. Ĝi enkondukas intencitan celon aŭ ricevanton:

- Nos labora **per** mone. – Ni laboras por mono.
- Tases es usada **per** bevi. – Tasoĵ estas uzataj por trinki.
- Me viaja **per** vide la mundo. – Mi vojaĝas por vidi la mondon.
- Tu es vestida **per** un sera de dansa. – Vi estas vestita por vespero da dancado.
- Me va vade a la botecas **per** tu. – Mi iros al la vendejoj por vi.

- El ia scrive la libro **per** sua madre. – Ŝi verkis la libron por sia patrino.
- La viaja va es perilosa **per** tu. – La vojaĝo estos danĝera por vi.
- Me batalia **per** mea vive. – Mi batalas por mia vivo.
- **Per** esta razona, me no pote parla longa. – Pro tiu kialo mi ne povas paroli longe.
- **Per** esemplo, considera la balena. – Ekzemple, konsideru la balenon.

Per etendiĝo ĝi indikas ankaŭ aferon, kiun oni interŝangas por alia:

- Tu ia paia tro **per** acel computador. – Vi pagis tro por tiu komputilo.
- Me ia compra lo **per** mil euros. – Mi aĉetis ĝin por mil eŭroj.
- Gracias **per** tua carta postal. – Dankon pro via poŝtkarto.

Ĝi povas indiki intencitan tempodaŭron:

- Nos vade a Colorado **per** un semana. – Ni iras al Kolorado por semajno.
- Me no va retarda tu **per** plu ca un minuto. – Mi ne prokrastos vin por pli ol minuto.

Kiel aparta okazo, **per** enkondukas ion, kion oni favoras, aŭ nome de kio oni parolas:

- Me ia vota **per** la proposa, ma tu ia vota kontra lo. – Mi voĉdonis por la propono, sed vi voĉdonis kontraŭ ĝi.

- Car tu no ia es ala, me ia parla **per** tu. – Ĉar vi ne estis tie, mi parolis en via nomo.

pos

Pos signifas “post” aŭ “malantaŭ”. Ĝia malo estas **ante**.

En spaco, ĝi indikas lokon je la malpli grava flanko de specifa objekto:

- Mea dorso es **pos** mea peto. – Mia dorso estas malantaŭ mia brusto.
- La aparatas es **pos** un porte securida. – La ekipaĵo estas malantaŭ ŝlosita pordo.
- La xicos turbosa ia asconde **pos** la kabana. – La miskondutaj knaboj kaŝis sin malantaŭ la kabano.

En tempo, **pos** indikas punkton, kiu sekvas specifan tempon:

- Desembre veni **pos** novembre. – Decembro venas post novembro.
- Los va comensa bevi **pos** la reposa de sol. – Ili komencos trinki post sunsubiro.
- Verje a destra **pos** la eglesa. – Turnu vin dekstren post la preĝejo.
- Me va reveni **pos** tre dias. – Mi revenos post tri tagoj.

Pos povas indiki ankaŭ movon al punkto malantaŭ io (= **a pos**):

- La serpente ia desapare **pos** la arbor. – La serpento malaperis malantaŭ la arbon.

Pos cuando, aŭ **pos ce**, signifas “post kiam”, subjunkcie (“post la tempo, kiam”):

- Nos oia la tona **pos cuando** nos vide la lampo. – Ni aŭdas la tondron, post kiam ni vidas la fulmon.

sin

Sin signifas “sen”. Ĝi indikas ion, kio ne ĉeestas:

- Tua sposa gusta sua cafe **sin** lete. – Via edzino ŝatas sian kafon sen lakto.
- Me ia pasea tra la pluve **sin** parapluve. – Mi promenis tra la pluvo sen ombrelo.
- On ave no fuma **sin** foco. – Neniu fumo estas sin fajro.
- Me va decora la casa intera **sin** aida. – Mi dekoracios la tutan domon sen helpo.
- Tu es tota **sin** compatia. – Vi estas tute senkompata.
- El ia adormi **sin** intende. – Li endormiĝis senintence.
- La rexercor ia sorti **sin** descovre la responde. – La esploristo foriris sen eltrovi la respondon.
- La depinta ia cade **sin** causa evidente. – La pentraĵo falis sen evidenta kialo.

sirca

Sirca sinifia “ĉirkaŭ”. Ĝi indikas lokon, kiu ĉirkaŭas aŭ enfermas ion alian:

- La campores fa cantas **sirca** la foco. – La tendanoj faris kantojn ĉirkaŭ la fajro.
- Mea mano es cluida **sirca** mea diton. – Mia mano estas fermita ĉirkaŭ mia dikfingro.
- Edera crese **sirca** la tronco. – Hedero kreskas ĉirkaŭ la trunko.
- On ave pinta verde **sirca** la fenestras. – Estas verda farbo ĉirkaŭ la fenestroj.

Ĝi povas indiki ankaŭ movon laŭ ĉirkaŭa vojo:

- La luna vade **sirca** la tera, e la tera vade **sirca** la sol. – La luno iras ĉirkaŭ la tero, kaj la tero iras ĉirkaŭ la suno.
- Nos intende viaja **sirca** la mundo par cavalo. – Ni intencas vojaĝi ĉirkaŭ la mondo surĉevale.
- El vaga **sirca** la jardin e ole la flores. – Ŝi vagas ĉirkaŭ la ĝardeno kaj flaras la florojn.

Ĉe esprimoj de tempo kaj kvanto, **ĉirkaŭ** indikas, ke la valoro estas proksimuma – la efektiva valoro estas ie en la ĉirkaŭa amplekso:

- Me ave **sirca** sincodes anios. – Mi havas ĉirkaŭ kvindek jarojn.
- Me pote pensa a **sirca** sento razones per no revela mea eda. – Mi povas pensi de ĉirkaŭ cent kialoj por ne malkaŝi mian aĝon.
- La conserta ia comensa **sirca** dui pos dudes. – La koncerto komenciĝis ĉirkaŭ duono post la dudeka.

- **Sirca** la lus prima, me ia oia tua can abaiante. – Ĉirkaŭ la tagiĝo mi aŭdis vian hundon boji.

SU

Su signifas “sub”. Ĝi indikas lokon, kiu estas pli malalta ol alia, ĉu fizike, ĉu metafore:

- La neva craci **su** mea pedes. – La neĝo knaras sub miaj piedoj.
- La solo es **su** la sofito. – La planko estas sub la plafono.
- Antilopes ia reposa **su** la arbores. – Antilopoj ripozis sub la arboj.
- On ave un table de sanduitxes **su** la fenetra. – Estas tablo da sandviĉoj sub la fenestro.
- Tu pare es **su** la influe de la vino. – Vi ŝajnas esti sub la influo de la vino.
- Me no pote labora **su** tua regulas. – Mi ne povas labori sub viaj reguloj.

Per etendiĝo, **su** povas indiki ankaŭ iun ajn lokon, kiu estas fizike kovrita de io, ĉu ĝi vere estas pli malalta aŭ ne:

- La color vera de la sofito es apena visible **su** esta pinta fea. – La vera koloro de la plafono estas apenaŭ videbla sub tiu ĉi aĉa farbo.
- Me ave un paceta **su** mea braso. – Mi havas pakon sub mia brako.
- El ia porta un sueter **su** sua jaca. – Li portis sveteron sub sia jako.

Su povas indiki ankaŭ movon al loko sub io (= **a su**):

- La acua ia vade **su** la mobilas. – La akvo iris sub la meblojn.

supra

Supra signifas “super”. Ĝi indikas lokon, kiu estas pli alta ol alia, ĉu fizike, ĉu metafore:

- La nubes es **supra** mea testa. – La nuboj estas super mia kapo.
- La teto es **supra** la sofito. – La tegmento estas super la plafono.
- El ia apoa **supra** la table per ateni la sal. – Ŝi kliniĝis super la tablon por atingi la salon.
- Un tempesta enorme developa **supra** la mar. – Grandega ŝtormo disvolviĝas super la maro.

Supra implicas spacon inter la du aferoj. Se neniu spaco ĉeestas, oni uzas **sur** anstataŭe.

Per etendiĝo, **supra** povas indiki ankaŭ ion ajn, kio fizike kovras ion alian, ĉu ĝi vere estas pli alta aŭ ne:

- La montania lansa un ombra **supra** nosa casa. – La monto ĵetas ombron super nia domo.
- El ia porta un covretota **supra** sua otra vestes. – Li portis supertuton super siaj aliaj vestoj.

Supra povas indiki ankaŭ movon al loko super io (= **a supra**):

- La sol leva **supra** la tera. – La suno leviĝas super la teron.

sur

Sur signifas “sur”. Ĝi indikas lokon ĉe la supraĵo de io, ĉu tenate tie de gravito, ĉu fiksite al ĝi alimaniere:

- Mea xapo es **sur** mea testa. – Mia ĉapelo estas sur mia kapo.
- No senta **sur** la seja rompeda. – Ne sidu sur la rompita seĝo.
- Si on sta **sur** la balcon, on vide la mar. – Se oni staras sur la balkono, oni vidas la maron.
- La asfalto **sur** la strada fonde en la kaldia. – La asfalto sur la strato fandiĝas en la varmeco.
- Esce la vive esiste **sur** Marte? – Ĉu estas vivo sur Marso?
- Me va pende esta depinta **sur** la mur. – Mi pendigos tiun ĉi pentraĵon sur la muro.
- La om ia besa la fem **sur** sua jena. – La viro kisis la virinon sur ŝia vango.

Sur povas signifi ankaŭ “sur -n”, do movon al la supraĵo de io (= **a sur**):

- Pone tua cartas **sur** la table. – Metu viajn kartojn sur la tablon.
- Un roca cual cade **sur** la tera es nomida un meteorite. – Roko, kiu falas sur la teron, estas nomata meteorito.
- El ia pone un dital **sur** sua dito. – Ŝi metis fingringon sur sian fingron.

Metafore **sur** signifas “pri”:

- La teatral es **sur** la gera. – La teatraĵo estas pri la milito.
- Me ia leje multe libros **sur** la tema. – Mi legis multajn librojn pri la temo.
- La xica plora **sur** sua pupa perdeda. – La knabino ploras pri sia perdita pupo.

tra

Tra signifas “tra”. Ĝi indikas lokon, ene de kiu okazas movo, pasante de unu ekstremaĵo al la alia:

- Acua flue **tra** la tubos. – Akvo fluas tra la tuboj.
- La enfantes ia core **tra** la vileta. – La infanoj kuris tra la vilaĝo.
- La pluve ia trova un via **tra** mea sako. – La pluvo trovis vojon tra mia sako.
- La tren vade de Milano a Roma **tra** Bologna. – La trajno iras de Milano al Romo tra Bolonjo.
- Un rueta gida **tra** la campos a la lago. – Vojo kondukas tra la kampoj al la lago.
- Me regarda la stelas **tra** la fenetra abrida. – Mi rigardas la stelojn tra la malfermita fenestro.
- Los ia resta juntada **tra** la anios. – Ili restis kune tra la jaroj.
- El ia senta en un sejon **tra** la note. – Li sidis en fotelo tra la nokto.
- On ia oia la esplode **tra** la site. – Oni aŭdis la eksplodon tra la urbo.

Tra cuando, aŭ **tra ce**, subjunkcie, signifas “dum”, “tra la tuta tempo, kiam”:

- Me senta **tra cuando** mea larmas flue. – Mi sidas, dum miaj larmoj fluas.

ultra

Ultra signifas “aliflanke de” aŭ “superante”. Ĝi indikas lokon ĉe la alia flanko de io:

- La scola es **ultra** la eglesa. – La lernejo estas aliflanke de la lernejo.
- **Ultra** la ponto es un vista merveliosa. – Trans la ponto estas mirinda vidaĵo.
- Esta taxe es **ultra** mea capasia. – Ĉi tiu tasko superas mian kapablon.

Ĝi povas indiki ankaŭ “trans -n”, do movon al tia loko (= **a ultra**):

- La esplorores ia viaja **ultra** la montanias. – La esploristoj vojaĝis trans la montojn.
- Los ia remi un barceta **ultra** la lago. – Ili remis boaton trans la lagon.

Konjunkcioj kaj subjunkcioj

Konjunkcioj kaj subjunkcioj estas du similaj specoj de vortoj, kiuj kunligas du aferojn.

Konjunkcioj

Konjunkcio kunligas du samspecajn erojn, produktante pli grandan eron de tiu sama speco. Ekzemple du substantivaj vortgrupoj kunligitaj per **e** formas pli grandan substantivan vortgrupon.

Estas kvar konjunkcioj:

- **e** – kaj (*ambaŭ eroj egale validas*)
- **o** – aŭ (*unu el la eroj validas; eble ambaŭ validas*)
- **no** – ne, kaj ne, sed ne (*la unua ero validas; la dua ne validas*)
- **ma** – sed (*ambaŭ eroj egale validas, sed kontrastas unu al la alia*)

Ekzemploj:

- La om **e** la fem vade a la casa. – La viro kaj la virino iras al la domo.
- Tu es multe vea **e** saja. – Vi estas tre maljuna kaj saĝa.
(*verŝajne tre saĝa, ĉar alie la frazo estus **tu es saja e multe vea***)
- El ia labora ante **e** pos sua vacanse. – Li laboris antaŭ kaj post siaj ferioj.

- Sua aniversario es en marto **o** april. – Ŝia datreveno estas en marto aŭ aprilo.
- Tu desira cafe **o** te? – Ĉu vi deziras kafon aŭ teon?
- On pote visita la museo a lundi **o** jovedi. – Oni povas viziti la muzeon je lundo aŭ ĵaŭdo (aŭ ambaŭ).
- On ia eleje tu, **no** me. – Oni elektis min, ne vin.
- Me ia conta no sola la oveas **ma** ance la capras. – Mi nombris ne nur la ŝafojn sed ankaŭ la kaprojn.

Ĉe listoj de pli ol unu ero, oni kutime anstataŭigas la konjunkcion per komo, krom inter la fina paro. Komon oni ofte metas ankaŭ antaŭ la konjunkcio en tia listo:

- Nos va viaja tra Italia, Suiz, Osteraic, **e** Deutxland. – Ni vojaĝos tra Italujo, Svislando, Aŭstrujo, kaj Germanujo.

Por emfazo oni povas duobligi **e**, **o**, kaj **ne**, lokante la kroman konjunkcion antaŭ la unuan eron de la kunligo. Duobla **o** eliminis la eblon, ke ambaŭ eroj validas:

- **e... e** – kaj... kaj
- **o... o** – aŭ... aŭ
- **no... no** – nek... nek

Ekzemploj:

- **E** Luis **e** Maria vade a scola. – Kaj Luis kaj Maria iras al la lernejo.
- **O** tu **o** me gania, ma no ambos. – Aŭ vi aŭ mi gajnos, sed ne ambaŭ.

- Me ave **no** la tempo **no** la desira per leje plu. – Mi havas nek la tempon nek la deziron legi plu.

E, o, kaj **ma** povas ankaŭ kunligi du frazojn aŭ subfrazojn:

- Me ia vade a la biblioteka, **e** tu ia visita la museo. – Mi iris al la biblioteko, kaj vi vizitis la muzeon.
- **O** nos solve esta problem, **o** la mundo va fini. – Aŭ ni solvu ĉi tiun problemon, aŭ la mondo finiĝos.
- **Ma** acel es difisil. – Sed tio malfacilas.

Oni uzas ankaŭ la adverbbon **donce** tiamaniere, kiel mallongigojn de **e** **donce**:

- Me pensa, **donce** me esiste. – Mi pensas, tial mi ekzistas.
- Nos no ave un mapa, **donce** nos es perdeda. – Ni ne havas mapon, do ni estas perditaj.

Subjunkcioj

Subjunkcio ligas subfrazon al la enhavanta frazo, kaj indikas ĝian rolon en tiu frazo:

Tri specoj ekzistas: la [pronomoj-subjunkcioj](#), la [adverboj-subjunkcioj](#), kaj la [specialaj subjunkcioj](#).

Pronomoj-subjunkcioj

La demandaj pronomoj **cual** kaj **ci** povas ankaŭ funkcii kiel subjunkcioj por enkonduki [rilatajn subfrazojn](#):

- La om **ci** ia abita asi ia vade a New York. – La viro, kiu loĝis ĉi tie, iris al Novjorko.
- La poma **cual** ia cade de mea sako es aora noncomable. – La pomo, kiu falis de mia sako, estas nun nemanĝebla.
- La fem **de ci** nos parla labora a mea ofisia. – La virino, pri kiu ni parolas, laboras en mia oficejo.
- Tua libro, **en cual** me ia scrive sua nom, es sur la table. – Via libro, en kiu mi skribis ŝian nomon, estas sur la tablo.

Ili kutime rilatas al antaŭa substantivo. Oni foje preterlasas tiun substantivon. Tiam oni poovas aldoni pronomon por klarigi la signifon:

- Esta es lo **cual** parteni a tu. – Ĉi tio estas tio, kio apartenas al vi.
- La auto blu es lo en **cual** nos vole viaja. – La blua aŭto estas tiu, en kiu ni volas vojaĝi.
- Acel es el **ci** me ia vide. – Tiu estas la persono, kiun mi vidis.
- Tu es el a **ci** me ia parla ier. – Vi estas tiu, al kiu mi parolis hieraŭ.
- **Ci** osa, gania. – Kiu aŭdacas, gajnas. / Tiu, kiu aŭdacas, gajnas.

Multe similas la uzo de **cual** kaj **ci** en [nerektaj demandoj](#).

Adverboj-subjunkcioj

La demandaj adverboj – **do**, **cuando**, **cuanto**, **como**, e **perce** – povas funkcii kiel subjunkcioj por enkonduki [adverbecajn subfrazojn](#):

- Nos parla **como** nos pensa. – Ni parolas, kiel (= en tiu sama maniero, en kiu) ni parolas.
- Me dormi **cuando** me pote. – Mi dormas, kiam mi povas.
- Me va esplica **cuanto** me comprende. – Mi klarigos, kiom mi komprenas.
- Nos abita **do** la du rios encontra. – Ni loĝas, kie la du riveroj renkontiĝas.
- Me ia fini la taxe **en cuando** tu ia parla a me. – Mi finis la taskon, dum vi parolis al mi.
- Nos va core **a do** la vias encontra. – Ni kuros tien, kie la vojoj renkontiĝas.

Eblas uzi ilin ankaŭ post substantivo, kiel subjunkciojn por enkonduki [rilatajn subfrazojn](#):

- Me labora en Paris, **do** me abita. – Mi laboras en Parizo, kie mi loĝas.
- El va visita en julio, **cuando** la clima es bon. – Li vizitos en julio, kiam la vetero estas bona.
- Acel es la razona **perce** Juan ia parti. – Jen kial Johano foriris / Tio estas la kialo de tio, ke Johano foriris.

Kaj ankaŭ eblas uzi ilin en [nerektaj demandoj](#) (speco de [substantiveca subfrazo](#)).

Specialaj subjunkcioj

La specialaj subjunkcioj **ce** kaj **esce** enkondukas [substantivecan subfrazon](#). **Ce** enkondukas raportitan informon, kaj **esce**

enkondukas nerektan (= raportitan) demandon pri la vereco de informo:

- Me pensa **ce** tu nesesa un vacanse. – Mi pensas, ke vi bezonas ferion.
- Me no sabe **esce** el va veni. – Mi ne scias, ĉu li venos.

Eblas uzi ilin post kelkaj substantivoj, adjektivoj, kaj prepozicioj por kompletigi la signifon:

- La idea **ce** la Sol orbita la Tera es un era. – La ideo, ke la Suno orbitas ĉirkaŭ la Tero, estas eraro.
- Nos es surpriseda **ce** vos no ia cexa. – Ni estas surprizitaj, ke vi ne plendis.
- Me es felis **ce** tu ia susede. – Mi ĝojas, ke vi sukcesis.
- Los no ia es certa **esce** la tren ia parti ja. – Ili ne certis, ĉu la trajno jam foriris.
- La gato ia entra a la sala sin **ce** algun vide el. – La kato eniris la ĉambron, sen ke iu vidis ĝin.

Oni povas ankaŭ uzi **ce** por enkonduki iujn subfrazojn, kiuj esprimas rezulton:

- El ia es tan fatigada **ce** el no ia pote pensa. – Ŝi estis tiom laca, ke ŝi ne povas pensi.
- El ia es tan fame **ce** el ia pote oia la ronca de sua stomaco. – Li tiel malsatis, ke li povis aŭdi la stomakon ronki.

La specialaj subjunkcioj **afin**, **car**, **si**, kaj **ca** enkondukas [adverbecajn subfrazojn](#):

- Me va veni **si** tu clama. – Mi venos, se vi vokos.
- Me labora **afin** mea enfantes pote come. – Mi laboras, por ke miaj infanoj povu manĝi.
- Lo es calda **car** la sol brilia. – Varmas, ĉar la suno brilas.
- Esta es plu labora **ca** me ia espeta. – Ĉi tio estas pli da laboro, ol mi atendis.

Demandoj

Ekzistas tri specoj de **demando**: tiuj, kiujn oni povas respondi simple per “jes” aŭ “ne”; tiuj, kiuj prezentas liston de ebloj, inter kiuj oni elektu; kaj tiuj, kiuj petas apartan informon.

Krome, demandoj povas esti **rektaj** (“Kien ni iras?”) aŭ **nerektaj** (“Mi demandis vin, kien ni iras”, “Mi ne scias, kiu mi estas”). Rektaj demandoj finiĝas per demandosigno (?).

Ĉu-demandoj

Oni povas fari ĉu-demandon el frazo per aldono de **esce** (“ĉu”) ĉe la komenco:

- **Esce** tu parla deŭtx? – Ĉu vi parolas la germanan?
- **Esce** tu ia come la salada? – Ĉu vi manĝis la salaton?

Du aliaj metodoj ankaŭ disponeblas. Kiam oni parolas, ĉe demando, kiu proponas eblon kaj petas nur konfirmon pri ĝi, oni povas aldoni **si?** (“ĉu?”) aŭ **no?** (“ĉu ne?”) ĉe la fino de la frazo. Kaj en tre simplaj demandoj eblas nur altigi la frazmelodion de la voĉo ĉe la fino:

- Tu ia come la salada, **si?** – Vi manĝis la salaton, ĉu?
- Tu ia come la salada, **no?** – Vi manĝis la salaton, ĉu ne?
- Tu ia come, **si?** –
- Nos es perdeda, **no?** – Ni perdiĝis, ĉu ne?
- Vos comprende? – Ĉu vi komprenas?

La respondo al ĉu-demando estas **si** (“jes”) aŭ **no** (“ne”). **Si** diras, ke veras la eblo esprimita en la demando; **no** diras, ke ĝi estas falsa:

- Tu desira bir? – Ĉu vi deziras bieron?
 - **Si**, per favore. – Jes, mi petas. (*mi deziras bieron*)
 - **No**, gracias. – Ne, dankon. (*mi ne deziras bieron*)

Se la demando havis negativan formon, **si** kaj **no** esprimas la samajn signifojn, kiel se la demando ne estus negativa. Sed tio povas esti konfuza, do pli klare povas esti respondo per plena frazo:

- Tu no desira bir? – Ĉu vi ne deziras bieron?
 - **Si**. – Jes. (*mi deziras bieron*)
 - **No**. – Ne. (*mi ne deziras bieron*)
 - **Si**, me desira bir. – Jes, mi deziras bieron.
 - **No**, me no desira bir. – Ne, mi ne deziras bieron.

Demandoj pri alternativoj

Demando pri alternativoj simple petas, ke la aŭskultanto elektu unu el kelkaj ebloj, kutime esprimitaj kiel listo ligita per la [konjunkcio o](#):

- Tu desira te, cafe, **o** bir? – Ĉu vi deziras teon, kafon, aŭ bieron?
 - Cafe, per favore. – Kafon, mi petas.
- Tu ia veni par auto, **o** par bisicle, **o** tu ia pasea? – Ĉu vi venis aŭte, aŭ bicikle, aŭ ĉu vi promenis?

Aliaj demandoj

Aliaj demandoj uzas demandajn [difinilojn](#), [pronomojn](#), aŭ [adverbojn](#) kiel ekzemple **cual**, **ci**, **cuando**, **cuanto**, **como**, **do**, kaj **perce**. La demandan vorton oni ofte movas al la komenco de la frazo, sed ĝi povas aperi ankaŭ tie, kie aperus ĝia respondo:

- **Cual** libro tu leje? = Tu leje **cual** libro? – Kiun libron vi legas?
- **Ci** es tua autor prefereda? = Tua autor prefereda es **ci**? – Kiu estas via preferata aŭtoro?
- **Cual** es acel musica fea? = Acel musica fea es **cual**? – Kio estas ĉi tiu malbela muziko?
- **Cuando** tu dormi? = Tu dormi **cuando**? – Kiam vi dormas?
- **Cuanto** tu ia paia? = Tu ia paia **cuanto**? – Kiom vi pagis?
- **Como** vos ia evade? = Vos ia evade **como**? – Kiel vi eskapis?
- **Do** nos es? = **Do** es nos? = Nos es **do**? – Kie ni estas?
- **Perce** tu core? = Tu core **perce**? – Kial vi kuras?
- **Con cual** tu come la salada? = Tu come la salada **con cual**? – Per kio vi manĝas la salaton?
- **Cual force** tu usa per come la salada? = Tu usa **cual force** per come la salada? – Kiun forkon vi uzas por manĝi la salaton?
- **Con cual force** tu come la salada? = Tu come la salada **con cual force**? – Per kiu forko vi manĝas la salaton?
- **Como rapida** tu pote come la salada? = Tu pote come la salada **como rapida**? – Kiel/kiom rapide vi povas manĝi la salaton?

Nerektaj demandoj

Nerektan demandon oni esprimas kiel [substantivecan subfrazon](#), kiu kutime enhavas la saman vortsinsekvon kiel rekta demando, inkluzive la saman verbotempon. En nerekta demando, la demandovorto ĉiam staras komence de la subfrazo:

- Vos va demanda: “Ci tu ia vide?” → Vos va demanda **ci** me ia vide.
 - Vi demandos: “Kiun vi vidis?” → Vi demandos, kiun mi vidis.
- Me no recorda: “A ci me ia parla?” → Me no recorda a **ci** me ia parla.
 - Mi ne memoras: “Al kiu mi parolis?” → Mi ne memoras, al kiu mi parolis.
- Los no sabe: “Cual nos va fa?” → Los no sabe **cual cosa** los va fa.
 - Ili ne scias: “Kion ni faros?” → Ili ne scias, kion ili faros.
- Me vide: “Do me va senta?” → Me vide **do** me va senta.
 - Mi vidas: “Kie mi sidos?” → Mi vidas, kie mi sidos.
- Me no ia sabe: “Cuando nos va parti?” → **Cuando** me va parti, me no ia sabe.
 - Mi ne sciis: “Kiam ni foriros?” → Kiam mi foriros, mi ne sciis.

Nerektaj ĉu-demandoj ĉiam uzas **esce**:

- El no sabe: “Esce los ia parti?” → El no sabe **esce** los ia parti.
 - Li ne scias: “Ĉu ni foriris?” → Li ne scias, ĉu ni foriris.

- El ia demanda: “Esce tu pote aida?” → El ia demanda **esce** me pote aida.
 - Li demandis: “Ĉu vi povas helpi?” → Li demandis, ĉu mi povas helpi.

Iafoje tre subtilas la diferenco inter nereкта demando kaj rilata subfrazo:

- (a) Me ia descovre **cual cosa ia es en la caxa.** – Mi eltrovis, kio estis en la skatolo. (nereкта demando)
- (b) Me ia descovre lo **cual ia es en la caxa.** – Mi eltrovis tion, kio estis en la skatolo. (rilata subfrazo)

En ekzemplo (a) mi eltrovis la *identecon* de la aĵo en la skatolo, eĉ se mi ne vidis aŭ tuŝis ĝin rekte. En ekzemplo (b), mi eltrovis ĝin, la fizikan objekton mem.

Subfrazoj

Kiel frazo, **subfrazo** enhavas subjekton kaj verbon, sed ĝi formas parton de pli granda frazo.

Ĉiu frazo entenas **ĉeffrazon**. Tion oni povas modifi diversmaniere per unu aŭ pli multaj **subfrazoj**. Se subfrazo modifas [substantivan vortgrupon](#), oni nomas ĝin [rilata subfrazo](#) (aŭ adjektiveca subfrazo). Se ĝi modifas verbon aŭ la tutan ĉeffrazon, oni nomas ĝin [adverbeca subfrazo](#). Kaj se ĝi ludas la rolon de substantivo, oni nomas ĝin [substantiveca subfrazo](#).

Krome, frazo povas enhavi [pli ol unu ĉeffrazon](#).

Rilataj subfrazoj

Rilata subfrazo (aŭ **adjektiveca subfrazo**) estas subfrazo, kiu modifas substantivon. Rilataj subfrazoj sekvas la substantivojn modifatajn, kaj ili kutime komenciĝas per unu de la [rilataj pronomoj](#) **ci** kaj **cual**:

- La om **ci** ia abita asi ia vade a New York. – La viro, kiu loĝis ĉi tie, iris al Novjorko.
- La poma **cual** ia cade de mea saco es aora noncomable. – La pomo, kiu falis de mia sako, estas nun nemanĝebla.

Por klareco, oni povas apartigi rilatan subfrazon disde la cetera frazo per komoj, precipe se ĝi estas longa aŭ komplika:

- La poma, **cual** ia cade de mea sako en la fango a matina ier, es aora noncomable. – La pomo, kiu falis de mia sako en la koton hieraŭ matene, estas nun nemanĝebla.

Iuj rilataj subfrazoj ne estas esencaj por la signifo de la frazo, sed simple aldonas pasantan komenton. Tiajn subfrazojn oni ĉiam apartigas per komoj:

- La can, **ci** ave manxas negra, ia morde la polisor. – La hundo, kiu havas nigrajn makulojn, mordis la policanon.
- Mea padre, **ci** ia jubila, abita en Mexico. – Mia patro, kiu emeritiĝis, loĝas en Meksiko.
- Esta jus, **cual** Ana ia fa, ave un bon sabor. – Ĉi tiu suko, kiun Ana faris, bongustas.

Ci kaj **cual** povas funkcii kiel aŭ la subjekto aŭ la objekto de la rilata subfrazo. Objektoj normale sekvas la verbon, sed kiam unu el ĉi tiuj estas la objekto, ĝi staras antaŭ kaj la subjekto kaj la verbo:

- La fem **ci** me ama veni de Frans. – La virino, kiun mi amas, venas de Francujo.
- La robot **cual** me ia konstrui no opera. – La roboto, kiun mi konstruis, ne funkcias.
- Ta ce nos vade a mea casa, **cual** es prosima. – Ni iru al mia domo, kiu proksimas.

Kiam la rilata pronomo estas la objekto de [prepozicio](#), la prepozicio venas unue:

- La fem **de ci** nos parla labora a mea ofisia. – La virino, pri kiu ni parolas, laboras ĉe mia oficejo.
- Tua libro, **en cual** me ia scrive sua nom, es sur la table. – Via libro, en kiu mi skribis ŝian nomon, estas sur la tablo.

Kiam **de ci** aŭ **de cual** enkondukas posedatan nomon ene de la rilata subfrazo, tiun substantivon oni kutime enkondukas per **sua** por klareco:

- Esta fem, **de ci sua** spozo labora en la banco, es un cocor eselente. – Ĉi tiu virino, kies edzo laboras en la banko, estas bonega kuiristo.
- La fem, **de ci** tu conose **sua** spozo, labora a mea ofisia. – La virino, kies edzo vi konas, laboras ĉe mia oficejo.
- La fem, **de ci** tu ia dona la letera a **sua** spozo, es encantante. – La virino, al kies edzo vi donis la leteron. estas ĉarma.
- Mea auto, **de cual sua** motor es rompeda, es aora dejetada. – Mia aŭto, kies motoro estas rompita, estas nun rubaĵo.

In iuj lingvoj, rilata subfrazo povas rilati al la tuta antaŭa ĉeffrazo. En Elefeno, se tio estigus dusencecon, oni povas uzi tian esprimon kiel **lo cual, e lo, e esta** aŭ **e acel** anstataŭe:

- El pote salta a un metre alta, **e esta** ia surprinde me. – Li povas salti unu metron alte, kio surprizis min.
- Me ia eleje aprende elefen, **lo cual** ia es un deside multe bon. – Mi elektis lerni Elefenon, kio estis tre bona decido.

Alia maniero por komenci rilatan subfrazon estas per [rilata adverbo](#):

- Me labora en Paris, **do** me abita. – Mi laboras en Parizo, kie mi loĝas.
- El va visita en julio, **cuando** la clima es bon. – Li vizitos en julio, kiam la vetero estos bona.
- Acel es la razona **per ce** Juan ia parti. – Tio estas la kialo, pro kiu Juan foriris.

Tiaj rilataj subfrazoj ofte similas al [adverbecaj subfrazoj](#):

- Me laboras **do** me abita. – Mi laboras, kie mi loĝas.
- El va visita **cuando** la clima es bon. – Li vizitos, kiam la vetero estos bona.

Adverbecaj subfrazoj

Adverbeca subfrazo modifas aŭ la verbon de la ĉeffrazo aŭ la ĉeffrazon mem. Adverbecan subfrazon oni enkondukas per unu el la [adverbaj-subjunkcioj](#) (**como, cuando, cuanto, do**) aŭ unu el la [specialaj subjunkcioj](#) **si, car, afin**, kaj **ca**:

- Me no teme la can, **car** el es multe peti. – Mi ne timas la hundon, ĉar ĝi estas tre malgranda.
- **Si** los redui tro rapida sua pesa, los va regania lo. – Se ili perdos pezon tro rapide, ili regajnos ĝin.
- Me core **afin** la rinoseros no catura me. – Mi kuras, por ke la rinoceroj ne kaptu min.
- Esta es plu labora **ca** me ia previde. – Ĉi tio estas pli da laboro, ol mi atendis.
- El ia scrive **cuando** sua madre ia demanda. – Li skribis, kiam lia patrino petis.

- El dise ce el es felis **do** el abita. – Li diras, ke li estas feliĉa, kie li loĝas.
- On no ia permete ce me fa la cosas **como** me ia desira. – Oni ne permesis min fari aferojn, kiel mi deziris.

Oni povas rigardi adverbegan subfrazon enkondukitan per [subjunkcio](#) (**como, cuando, cuanto, do**) kiel mallongigitan [rilata subfrazo](#). Ekzemple, la lastajn tri ekzemplojn ĉi-supre oni povas esprimi ankaŭ ĉi-maniere:

- El ia scrive **a la ora cuando** sua madre ia demanda. – Li skribis je la horo, kiam lia patrino petis.
- El dise ce el es felis **a la loca do** el abita. – Li diras, ke li estas feliĉa en la loko, kie li loĝas.
- On no ia permete ce me fa la cosas **en la modo** como me desira. – Oni ne permesis min fari aferojn en la maniero, kiel mi deziris.

Substantivecaj subfrazoj

Substantiveca subfrazo funkcias kiel substantivo: ĝi povas esti la subjekto aŭ objekto de verbo aŭ prepozicio. Substantivecajn subfrazojn oni enkondukas per la [specialaj subjunkcioj](#) **ce** aŭ **esce**, per unu el la [pronomoj-subjunkcioj](#) **ci** kaj **cual**, aŭ per unu el la [adverboj-subjunkcioj](#).

Por eltrovi, ĉu subfrazo estas vere substantiveca subfrazo, anstataŭigu ĝin per “li”, “ŝi”, “ĝi”, aŭ “ili”. Se tio rezultigas bonan frazon, la subfrazo estas substantiveca subfrazo. Substantivecaj

subfrazoj estas tipe objektoj de verboj de pensado, sensado, aŭ emocio:

- Me vide **do** tu es. – Mi vidas, kie vi estas.
- **Cuando** me va parti, me no sabe. – Kiam mi foriros, mi ne scias.
- Me sabe **de do** tu veni. – Mi scias, de kie vi venas.
- Me sabe **ci** ia dise acel. – Mi scias, kiu diris tion.
- Me ia oia **cual** tu ia dise. – Mi aŭdis, kion vi diris.
- Me pote divina **cual** el leje. – Mi povas diveni, kiun li legas.

Multajn substantivecajn subfrazojn oni enkondukas per la [specialaj subjunkcioj](#) **ce** (“ke”) aŭ **esce** (“ĉu”):

- Me pensa **ce** el es bela. – Mi pensas, ke ŝi estas bela.
- Me pensa **ce** el pote salta a un metre alta. – Mi pensas, ke li povas salti unu metron alte.
- Me pensa **ce** si. – Mi pensas, ke jes.
- Me duta **esce** el pote salta a un metre alta. – Mi dubas, ĉu li povas salti unu metron alte.

Substantivecaj subfrazoj ofte raportas tion, kion iu diris, pensis aŭ demandis. Ĉiakaze, la tempo de la verbo en la substantiveca subfrazo restas sama kiel tiu en la origina diro, penso aŭ demando (ĝuste kiel en Esperanto):

- Me ia dise: “Me **veni** de London.” → Me ia dise ce me **veni** de London.
 - Mi diris: “Mi venas de Londono.” → Mi diris, ke mi venas de Londono.

- El pensa: “La tren **ia es** tarda.” → El pensa ce la tren **ia es** tarda.
 - Ŝi pensas: “La trajno malfruis.” → Ŝi pensas, ke la trajno malfruis.
- El ia demanda: “Cuando nos **va parti?**” → El ia demanda cuando nos **va parti**.
 - Li demandis: “Kiam ni foriros?” → Li demandis, kiam ni foriros.
- Me va vole sabe: “Do la selebra **es?**” → Me va vole sabe do la selebra **es**.
 - Mi volos scii: “Kie estas la festo?” → Mi volos scii, kie la festo estas.

Rilataj kaj adverbecaj subfrazoj povas aspekti simile al substantivecaj subfrazoj. Por klarigi, ke oni intencas rilatan aŭ adverbecan subfrazon, aldonu substantivon aŭ pronomon antaŭ **cual** aŭ **ci**:

- Me no comprende **la ata** cual tu intende. – Mi ne komprenas la agon, kiun vi intencas.
- Me ia oia **lo cual** tu ia dise. – Mi aŭdis tion, kio vi diris.
- Me no conose **el ci** tu ia indica. – Mi ne konas tiun, kiun vi indikis.
- Me vide **la loca do** tu es. – Mi vidas la lokon, kie vi estas.
- Me no sabe **la ora cuando** me va parti. – Mi ne scias la horon, kiam mi foriros.

Ankaŭ [infinativon](#) oni povas rigardi kiel enkondukilon de ia substantiveca subfrazo.

Kunligitaj ĉeffrazoj

Per [konjunkcioj](#) oni povas kunligi du ĉeffrazojn kiel unu solan frazon. Oni ofte inkluzivas komon antaŭ la konjunkcio:

- Me ia desira la auto, **ma** me no ia ave la mone. – Mi deziris la aŭton, sed mi ne havis la monon.
- Me desira un bon carera **e** me vole ance trova un sposa bela. – Mi deziras bonan karieron kaj mi volas ankaŭ trovi belan edzinon.

Tiaj ĉeffrazoj povas stari kiel sendependaj frazoj, kun aŭ sen konjunkcioj:

- El ia vole canta **e** el ia vole dansa, **ma** el ia teme. – Li volis kanti kaj li volis danci, sed li timis.
- El ia vole canta. **E** el ia vole dansa. **Ma** el ia teme. – Li volis kanti. Kaj li volis danci. Sed li timis.
- El ia vole canta. El ia vole dansa. El ia teme. – Li volis kanti. Li volis danci. Li timis.

Nombroj

Kardinalaj nombrovortoj

La bazaj kardinalaj nombrovortoj estas:

- **zero** – nul
- **un** – un
- **du** – du
- **tre** – tri
- **cuatro** – kvar
- **sinco** – kvin
- **ses** – ses
- **sete** – sep
- **oto** – ok
- **nove** – naŭ
- **des** – dek
- **sentto** – cent
- **mil** – mil
- **milion** – miliono

Nombrojn ĝis 999 oni skribas kiel unuopajn vortojn el ĝis tri eroj, ligitaj per dividstreko. Ĉiu ero prezentas ciferon, kaj konsistas el kardinala nombrovorto inter **un** kaj **nove**, kun **des** aŭ **sentto** aldonita ĉefine, se la cifero prezentas dekoblon aŭ centoblon. Unuopajn oblojn de dek kaj cent oni esprimas per nur **des** kaj **sentto**, sen iu mencio de **un**. La erojn per nulaj obloj (kiel la “0” en “209”) oni entute ellasas.

- **des-un** – 11
- **des-du** – 12
- **des-nove** – 19
- **dudes** – 20
- **dudes-un** – 21
- **dudes-sinco** – 25
- **sentto-un** – 101
- **sentto-des-du** – 112
- **tresentto-dudes-un** – 321
- **cuatrosentto** – 400
- **novesentto-sinco** – 905

Mil kaj **milion** estas ĉiam skribitaj kiel sendependaj vortoj, disigante ĉiun grupon el tri ciferoj:

- **mil setesentto-sesdes-tre** – 1763
- **du mil un** – 2001
- **tre mil des-cuatro** – 3014
- **cuatrosesdes-sinco mil sesentto-setedes-oto** – 45 678
- **novesentto-otodes-sete milion sesentto-sincodes-cuatro mil tresentto-dudes-un balones roja** – 987 654 321 ruĝaj balonoj

Kiam oni skribas nombrojn per ciferoj, Elefeno metas spaceton inter ĉiu grupo el tri ciferoj, kiel montrite ĉi-supre. La decimalan signon oni skribas kiel aŭ punkton aŭ virgulon laŭprefere, kaj simile oni prononcas ĝin kiel aŭ **punto** aŭ **virgula**. Ciferojn post la decimala signo oni simple listigas:

- **tre punto un cuatro un ses** – 3.1416

- **du virgula zero nove** – 2,09

Negativajn nombrojn oni esprimas per **min**:

- **min sinco grados** – minus kvin gradoj

Miloj da milionoj

La vorto “biliono” povas signifi aŭ mil milionojn aŭ milionon da milionoj, depende de la kulturo. Similaj problemoj trafas “trillion”, “quadrillion”, ktp. Por eviti konfuzon, Elefeno preferas esprimi tiajn nombrojn plene:

- **mil milion** – 1 000 000 000 (unu kun naŭ nuloj, 10^9)
- **milion milion** – 1 000 000 000 000 (10^{12})
- **mil milion milion** – 1 000 000 000 000 000 (10^{15})

La vortoj **bilion**, **trilion**, **cuadrilion**, ktp ja ekzistas en Elefeno, sed parolanto, kiu uzas ilin, zorge klarigu la celitan signifon.

En scienca verkado la plej klara eblo estas uzi la internaciajn prefiksojn:

- **deca-** – 10
- **ecto-** – 100
- **cilo-** – 10^3
- **mega-** – 10^6
- **giga-** – 10^9
- **tera-** – 10^{12}
- **peta-** – 10^{15}
- **exa-** – 10^{18}

- **zeta-** – 10^{21}
- **iota-** – 10^{24}

Ordaj nombrovortoj

Kiam nombrovorto staras *antaŭ* substantivo, ĝi estas kardinala nombrovorto kaj indikas kvanton:

- **tre** omes e **cuatro** femes – tri viroj kaj kvar virinoj

Sed kiam nombrovorto *sekvas* substantivon, ĝi estas orda nombrovorto kaj indikas lokon en sinsekvo:

- la **om tre** – la tria viro
- la **pato ses** – la sesa anaso
- la **paje un** – la unua paĝo, paĝo unu

Prima estas ofta alternativo de orda **un**, sed oni ne povas ĝin uzi por pli altaj numeroj, kiuj hazarde finiĝas per la cifero “1”:

- la **paje prima** – la unua paĝo
- sala **sentoun** – ĉambro 101

Oni povas uzi **numero** kiel lokokupan substantivon por subteni ordan nombrovorton:

- El es **numero tre**. – Li estas numero tri / Li estas tria.
- A cual paje tu es? Me es a **numero setedes**. – Ĉe kiu paĝo vi estas? Mi estas ĉe numero sepdek.
- **Numero tre**, me vole gracia la furnores de come. – Trie, mi volas danki la proviantistojn.

Onoj

Unu uzo de la sufikso **-i** estas formi vortojn por onaj nombroj:

- **dui** – duono
- **tri** – triono
- **cuatri** – kvarono
- **desi** – dekono
- **des-dui** – dek-duono
- **cuatordesi** – kvardekono
- **senti** – centono
- **tresento-sesdeso-sinci** – 1/365
- **mili** – 1/1000
- **dudes-mili** – 1/20 000

Onoj sekvas la regulojn por ordinaraj [substantivoj](#):

- **un tri** de la tarte – triono de la torto
- **du tris** de la tarte – du trionoj de la torto
- **esta tri ardeda** de la tarte – ĉi tiu bruligita triono de la torto
- **un cuatri** de un sentenio – kvarono de jarcento
- **tre tredes-duis** de un diton – tri tridek-duonoj el colo

Oni povas indiki onojn en kelkaj aliaj manieroj:

- **tre e un dui** oras – tri kaj duona horoj
- tre oras e **un dui** – tri horoj kaj duono
- **sete e un dui** milion anios = sep kaj duona milionoj da jaroj
- **des persentos** de la popla = dek procentoj/elcentoj de la popolo

- **des sentis** de la popla = dek centonoj de la popolo
- **du punto sete sinco oto** metres = 2,758 metroj

Por scienca verkado, internaciaj prefiksoj disponeblas:

- **desi-** (d) – 1/10
- **senti-** (c) – 1/100
- **mili-**(m) – 10^{-3}
- **micro-** (μ) – 10^{-6}
- **nano-** (n) – 10^{-9}
- **pico-** (p) – 10^{-12}
- **femto-** (f) – 10^{-15}
- **ato-** (a) – 10^{-18}
- **zepto-** (z) – 10^{-21}
- **iocto** (y) – 10^{-24}

Obloj

La sufikso **-uple** formas vortojn por nombraj obloj kaj opoj:

- **duple** – duoblo, duopo, paro
- **truple** – trioblo, triopo
- **cuatuple** – kvaroblo, kvaropo

Vortgrupoj kun **ves** aŭ **veses** esprimas kiomfoje io okazas:

- **a un ves** – unufoje
- **a du veses** – dufoje
- **a tre veses** – trifoje

Ves ne esprimas [aritmetikan multiplikon](#).

Aritmetiko

Adicion oni esprimas per **plu** aŭ **e**:

- Un **plu** un es du. – Unu plus unu estas du.
- Du **e** du no es sinco. – Du kaj du ne estas kvin.

Subtrahon oni esprimas per **min**:

- Ses **min** tre es tre. – Ses minus tri estas tri.

Multiplikon oni esprimas per **multiplida par**, ofte simpligita al nur **par**:

- Du **multiplida par** tre es ses. – Du multiplikite per tri estas ses.
- Ses **par** cuatro es dudes-cuatro. – Sesoble kvar estas dudek kvar.

Dividon oni esprimas per **divideda entre**, ofte simpligita al nur **entre**:

- Des **divideda entre** du es sinco. – Dek dividite per du estas kvin.
- Sinco **entre** du es du e un dui. – Kvin dividite per du estas du kaj duono.
- Sinco **entre** du es du punto sinco. – Kvin dividite per du estas 2.5.
- Sinco **entre** du es du virgula sinco. – Kvin dividite per du estas 2,5.

Potencojn oni esprimas per **a potia** kaj orda nombrovorto.
Cuadrada kaj **cubida** estas alternativoj por “kvadratigita” and “kubigita”:

- Tre **a potia du** es nove. – La dua potenco de tre estas naŭ.
- Tre **cubida** es dudes-sete. – Tri kubigita estas dudek sep.
- des **a potia min nove** – 10^{-9}
- des **a potia sento** – 10^{100}

Radikojn oni esprimas per **a radis** kaj orda nombrovorto:

- 256 **a radis cuatro** es 4. – La kvara radiko de 256 estas 4.
- La **radis cuadrado** de 64 es 8. – La kvadrata radiko 64 estas 8.
- La **radis cubo** de 27 es 3. – La kuba radiko 27 estas 3.

Mezuroj

Fizikajn mezurojn oni povas esprimi diversmaniere:

- **Cuanto alta es** la tore? – Kiom alta estas la turo?
- **Cuanto de altia** la tore ave? – Kiom da alteco la turo havas?
- La tore **es cuanto alta**? – La turo estas kiom alta?
- La tore **ave cuanto de altia**? – La turo havas kiom da alteco?
- La tore **es 40 metres alta**. – La turo estas 40 metrojn alta.
- La tore **ave 40 metres de altia**. – La turo havas 40 metrojn da alteco.
- La tore **es un metre plu alta ca** la casa. – La turo estas unu metron pli alta ol la domo.
- La tore **ave un metre plu de altia ca** la casa. – La turo havas unu metron pli da alteco ol la domo.

- La turo **es du vesoj plu alta** ol la domo. – La turo estas dufoje pli alta ol la domo.
- La turo **ave du de la altia de** la domo. – La turo havas dufoje la altecon de la domo.
- La domo **ave un du de la altia de** la turo. – La domo havas duono de la alteco de la turo.
- La turo **es duoble plu alta** ol la domo. – La turo estas duoble pli alta ol la domo.
- La turo **ave duoble la altia de** la domo. – La turo havas duoble la altecon de la domo.

Baza principo estas, ke oni *havas* altecon (**ave altia**) sed estas alta (**es alta**).

40 metroj alta laŭvorte signifas “40 altaj metroj” (t.e. la metroj mem estas altaj), sed per natura etendiĝo ĝi alprenas la signifon “40 metroj laŭ alteco”.

La samaj ebloj validas por aliaj mezuroj, kiel ekzemple:

- **larga, largia**
- **grande, grandia**
- **pesosa, pesa**
- **longa, longia**
- **longa, tempo**
- **vea, eda**
- **basa, basia**
- **profonda, profunda**
- **frecuente, frecuentia**
- **rapida, rapidia**

- **densa, densia**

Vortfarado

En Elefeno, oni povas formi novajn vortojn aldonante [prefiksojn](#) aŭ [sufiksojn](#) al ekzistantaj vortoj, aŭ kombinante du ekzistantaj vortojn kiel [kunmetitan substantivon](#).

Oni povas ankaŭ rekte reuzi [adjektivon kiel substantivon](#) kaj [verbon kiel substantivon](#) aldonante neniun afikson.

Prefiksoj

Kiam oni aldonas prefikson, kiu finiĝas per konsonanto, al vorto, kiu komenciĝas per la sama konsonanto, oni skribas tiun konsonanton nur unufoje (**inter+rede** → **interede**, **non+nesesada** → **nonesesada**).

Anti- signifas “kontraŭ-” aŭ “anti-”. Ĝi formas adjektivojn kaj substantivojn, kiuj indikas kontraŭecon:

- **sosia** → **antisosial** – kontraŭsocia
- **avion** → **antiavional** – kontraŭaviadila
- **proton** → **antiproton** – antiprotono

Auto- signifas “sin-” or “mem-”. Ĝi formas substantivojn, verbojn, kaj adjektivojn, kiuj indikas refleksivan aŭ aŭtomatan agon:

- **respeta** – respekto → **autorespeta** – sinrespekto

- **flue** – flui → **autoflue** – aŭtomata linisalto (ĉe komputila teksto)
- **adere** – gluiĝi → **autoaderente** – memgluiĝa

Des- signifas “mal-”, kiam oni malfaras agon. Ĝi formas verbojn. Ĝi simpliĝas al **de-** antaŭ S, Z, X, aŭ J:

- **botoni** – butoni → **desbotoni** – malbutoni
- **infeta** – infekti → **desinfeta** – malinfekti
- **jela** – frostiĝi → **dejela** – fandiĝi
- **sifri** – ĉifri → **desifri** – malĉifri

Inter- signifas “inter-”. Ĝi formas substantivojn, verbojn, kaj adjektivojn, kiuj indikas reciprokan agon aŭ staton:

- **cambia** – ŝanĝi → **intercambia** – intersanĝi
- **nasional** – nacia → **internasional** – internacia

Media- signifas “mez-” aŭ ”-mezo”. Ĝi formas substantivojn, kiuj indikas la mezpunkton de io:

- **note** – nokto → **medianote** – noktomezo
- **estate** – somero → **mediaestate** – somermezo
- **punto** – punkto → **mediapunto** – mezpunkto

Non- signifas “mal-” aŭ “ne-”, formante adjektivojn kaj substantivojn, kiuj indikas malajn kvalitojn:

- **justa** – justa → **nonjusta** – maljusta
- **ativa** – aktiva → **nonativa** – neaktiva
- **nativa** – indiĝena → **nonativa** – neindiĝena

- **nesesada** – necesa → **nonesesada** – nenecesa
- **crede** – kredo → **noncrede** – nekredo

Pos- signifas “post-”. Ĝi formas substantivojn, verbojn, kaj adjektivojn, kiuj aludas al tempo (aŭ loko) post aŭ malantaŭ (**pos**) alia:

- **graduada** – diplomita studento → **posgraduada** – universitata studento post sia unua diplomo
- **media** – mezo → **posmedia** – posttagmezo
- **alveolo** – alveolo → **posalveolal** – postalveol(ar)a

Pre- signifas “antaŭ-”. Ĝi formas substantivojn, verbojn, kaj adjektivojn, kiuj aludas al tempo (aŭ loko) antaŭ (**ante**) alia:

- **graduada** – diplomita studento → **pregraduada** – universitata studento antaŭ sia unua diplomo
- **istoria** – historio → **preistoria** – prahistorio
- **judi** – juĝi → **prejudi** – antaŭjuĝi

Re- signifas “re-”. Ĝi formas verbojn, kiuj indikas ripetitan agon, aŭ agon en la kontraŭa direkto:

- **comensa** – komenci → **recomensa** – rekomenci
- **pleni** – plenigi → **repleni** – replenigi
- **paia** – pagi → **repaia** – repagi
- **veni** – veni → **reveni** – reveni

Su- signifas “sub-”. Ĝi formas substantivojn, verbojn, kaj adjektivojn, kiuj indikas pli malaltan punkton en hierarkio. Ĝi simpliĝas al **supra-** antaŭ A:

- **teninte** – leŭtenanto → **suteninte** – subleŭtenanto
- **divide** – dividi → **sudivide** – subdividi
- **consensa** – konscia → **suconsensa** – subkonscia
- **indise** – indico → **suindise** – subindico
- **campion** – ĉampiono → **sucampion** – dua gajninto

Supra- signifas “super-” aŭ ”-eg-”. Ĝi formas substantivojn, verbojn, kaj adjektivojn, kiuj indikas pli altan punkton en hierarkio:

- **computador** – komputilo → **supracomputador** – superkomputilo
- **pasa** – pasi → **suprapasa** – superi
- **dramosa** – drameca → **supradramosa** – dramecega
- **fem** – virino → **suprafem** – supervirino
- **natural** – natura → **supranatural** – supernatura
- **analise** – analizi → **supranalise** – tro analizi

Vis- signifas “vic-”. Ĝi formas substantivojn, kiuj indikas eventualajn anstataŭulojn:

- **presidente** – prezidento → **vispresidente** – vicprezidento
- **re** – reĝo → **visre** – vicreĝo

Bon- e **mal-** formas bonajn kaj malbonajn (aŭ misajn) variantojn de adjektivoj kaj verboj, foje metafore. **Mal-** ofte korespondas al “mis-” en Esperanto:

- **parla** – paroli → **bonparlante** – elokventa
- **vende** – vendi → **bonvendeda** – furora

- **dise** – diri → **bondise** – beni
- **veni** – veni → **bonveni** – bonvenigi
- **acusa** – akuzi → **malacusa** – kalumnii
- **comprende** – kompreni → **malcomprende** – miskompreni
- **nomida** – nomita → **malnomida** – misnomita
- **odorosa** – odora → **malodorosa** – malbonodora

Oni uzas [nombrovortojn](#) kaj [onojn](#) kiel prefiksojn ĉe iuj vortoj. Ĉe familianoj, nombrovortoj indikas pliĝe forajn generaciojn, kiel sinsekvoj de “pra-” en Esperanto:

- **avo** – avo → **duavo** – praavo
- **neta** – nepino → **treneta** – prapranepino
- **pede** – piedo → **cuatropede** – kvarpieda / kvarpiedulo
- **sore** – fratino → **duisore** – duonfratino
- **galon** – galjono → **cuatrigalon** – kvarono de galjono

Sufiksoj

Multaj sufiksoj komenciĝas per vokalo. Kiam oni aldonas tian sufikson al vorto, kiu jam finiĝas per vokalo, oni forigas la ekzistantan vokalon, krom se ĝi estis la sola vokalo en la origina vorto:

- **fruta** – frukto → **frutosa** – fruktoplana
- **jua** – ludo → **jueta** – ludilo
- **fe** – feo → **fein** – feeca

Kie sufikso kreus [nevalidan vokalsinsekvon](#), oni forigas la duan vokalon de la sinsekvo:

- **comedia** + **-iste** → (comediiste) → **comediste** – komediisto

Tiuj ĉi reguloj havas du esceptojn:

- **tre** + **-i** → **tri**
- **tre** + **-uple** → **truple**

Sufikso formanta verbojn

Same kiel aliaj [verboj](#), la verbojn kreitajn per ĉi tiu sufikso oni povas uzi kaj [transitive kaj netransitive](#), aŭ [kiel substantivojn](#).

Oni aldonas **-i** al substantivoj kaj adjektivoj por formi verbojn, kiuj signifas “fariĝi ...”, “ŝanĝ(iĝ)i al ...”. Kiel aparta kazo, ĝi inkluzivas ankaŭ verbojn, kiuj signifas “eligi substancon aŭ novan parton”:

- **arco** – arko → **arci** – arkigi
- **roja** – ruĝa → **roji** – ruĝiĝi
- **umida** – humida → **umidi** – humidigi
- **duple** – duobla → **dupli** – duobligi
- **saliva** – salivo → **salivi** – salivi
- **flor** – floro → **flori** – flori

-i kreas ankaŭ verbojn, kiuj signifas “uzi ...” (tipe kiel ilon aŭ aparaton), aŭ “apliki ...” (substancon aŭ konvencion):

- **boton** – butono → **botoni** – butoni
- **telefon** – telefono → **telefoni** – telefoni
- **sponja** – spongo → **sponji** – spongi
- **pinta** – farbo → **pinti** – farbi

- **nom** – nomo → **nomi** – nomi

Sufiksoj formantaj adjektivojn

Same kiel aliaj [adjektivoj](#), la adjektivojn kreitajn per ĉi tiuj sufiksoj oni povas reuzi kiel substantivojn, kiuj indikas ulon aŭ aĵon kun la specifa kvalito.

Oni aldonas **-in** al substantivo por formi adjektivon, kiu signifas “simila al ...”, ”-eca”:

- **ami** – amiko → **amin** – amika / amikeca
- **enfante** – infano → **enfantin** – infaneca
- **fantasma** – fantomo → **fantasmin** – fantomeca
- **menta** – mento → **mentin** – menteca
- **monstro** – monstro → **monstrin** – monstra
- **serpente** – serpento → **serpentin** – serpenteca

Oni aldonas **-osa** al substantivo por fari adjektivon, kiu signifas “plena de ...” aŭ “farita el ...”:

- **zucar** – sukero → **zucarosa** – sukerplena
- **oro** – oro → **orosa** – farita el oro
- **capel** – haro → **capelosa** – harkovrita
- **crea** – krei → **creosa** – kreema
- **melma** – ŝlimo → **melmosa** – ŝlima
- **jua** – ludo → **juosa** – ludema
- **caos** – kaoso → **caososa** – kaosa

Oni aldonas **-al** al substantivo por formi ĝeneralan adjektivon, kiu signifas “rilata al ...” aŭ “kiu temas pri ...”

- **fotografia** – fotografo → **fotografial** – fotografia
- **nasion** – nacio → **nasional** – nacia
- **siensa** – scienco → **siensal** – scienca
- **averbo** – adverbo → **averbal** – adverba
- **erita** – heredo → **erital** – hereda
- **mito** – mito → **mital** – mita
- **monce** – monaĥo → **moncal** – monaĥa

Oni aldonas **-iste** al substantivo indikanta kredon, ekzemple religion aŭ filozofion, por fari ĝeneralan adjektivon. Se la substantivo finiĝas per **-isme**, **-iste** anstataŭas tion. En kelkaj vortoj, kie la radiko estas propra nomo, oni retenas la finan vokalon de la substantivo, se tio kreas vorton pli internacian:

- **bigamia** – bigamio → **bigamiste** – bigamia
- **otimisme** – optimismo → **otimiste** – optimisma
- **puria** – pureco → **puriste** – purisma
- **Mitra** – Mitrao → **mitraiste** – mitraisma

Oni aldonas **-an** al kelkaj substantivoj indikantaj regionojn de spaco aŭ tempo (lokojn kaj epokojn) por formi ĝeneralajn adjektivojn:

- **suburbe** – antaŭurbo → **suburban** – antaŭurba
- **Victoria** – Viktorino → **victorian** – viktorina

-an estas ankaŭ unu el la kvin normaj sufiksoj, per kiuj oni formas adjektivojn, kiuj indikas lingvojn kaj popolojn. La aliaj kvar estas **-es**, **-ica**, **-i**, kaj **-sce**. Por tiuj adjektivoj Elefeno uzas vortojn, kiuj sonas kiel eble plej simile al la surlokaj nomoj: rezulte, iuj nomoj uzas apartan propran sufikson, aŭ neniun ajn sufikson, kaj oni modifas foje ankaŭ la radikon:

- **Africa** – Africa → **african** – afrika
- **Frans** – Francujo → **franses** – franca
- **Elas** – Grekujo → **elinica** – greka
- **Arabia** – Arabujo → **arabi** – araba
- **Rusia** – Rusujo → **rusce** – rusa
- **Europa** – Eŭropo → **european** – eŭropa
- **Deutxland** – Germanujo → **deutx** – germana
- **Britan** – Britujo → **brites** – brita

Sed, se oni preferas, ankaŭ eblas simple aldoni **-an** al iu ajn landonomo:

- **Frans** – Francujo → **fransan** – franca
- **Elas** – Grekujo → **elasan** – greka
- **Arabia** – Arabujo → **arabian** – araba
- **Rusia** – Rusujo → **rusian** – rusa
- **Deutxland** – Germanujo → **deutxlandan** – germana
- **Britan** – Britujo → **britanan** – brita

Oni aldonas **-ica** al substantivo indikanta medicinan, psikologian, aŭ similan problemon por formi adjektivon pri persono, kiu havas tiun problemon:

- **catalesia** – katalepsio → **catalesica** – katalepsia
- **xenofobia** – ksenofobio → **xenofobica** – ksenofobia

Oni aldonas **-nte** al verbo por krei la aktivan participon, adjektivon, kiu signifas ”-nta”, t.e. “tia, ke ĝi faras (la specifan agon)”. Ĝi alprenas la formon **-ente**, se la verbo finiĝas per konsonanto, sed **es** estas la sola efektiva ekzemplo:

- **ama** – ami → **amante** – amanta
- **depende** – dependi → **dependente** – dependanta / dependa
- **dormi** – dormi → **dorminte** – dormanta
- **obedi** – obei → **obedinte** – obeanta / obeema
- **pare** – ŝajni → **parente** – ŝajnanta / ŝajna
- **es** – esti → **esente** – estanta

Kiam oni uzas tian adjektivon kiel substantivon, ĝi normale indikas aĵon, kiu faras la agon. *Homon*, kiu faras agojn, oni indikas per la sufikso **-or**. Substantivojn, kiuj finiĝas per **-nte**, oni ne uzas kiel nomojn de agoj:

- La **covrente** es sur la caxa. – La kovrilo estas sur la skatolo.
- **Covre** la caxa es un bon idea. – Kovri la skatolon estas bona ideo / La kovro de la skatolo estas bona ideo.

Oni aldonas **-da** al verbo por formi la pasivan participon, adjektivon, kiu signifas ”-ata” aŭ ”-ita”, t.e. “tia, ke oni ...as aŭ ...is ĝin”:

- **ama** – ami → **amada** – amata / amita
- **clui** – fermi → **cluida** – fermita

- **conose** – koni → **conoseda** – konata
- **jela** – frostigi → **jelada** – frostigita
- **nesesa** – necesi → **nesesada** – necesata / necesata
- **putri** – putriĝi / putrigi → **putrida** – putriĝinta / putrigita / putra

Oni aldonas **-able** al verbo por krei adjektivon, kiu signifas ”-ebla”, “tia, ke oni povas ...i ĝin”, aŭ ”-inda”, “tia, ke ĝi meritas, ke oni ...u ĝin”:

- **ama** – ami → **amable** – amebla / aminda
- **come** – manĝi → **comable** – manĝebla
- **infla** – ŝveli → **inflable** – ŝvelebla
- **loda** – laŭdi → **lodable** – laŭdinda
- **nota** – noti → **notable** – notinda
- **titila** – tikli → **titilable** – tikliĝema

Sufiksoj formantaj substantivojn

-or signifas ”-anto” aŭ ”-isto”. Kiam oni aldonas ĝin al verbo, ĝi formas substantivon kun la signifo de homo, kiu faras la specifan agon, ofte kiel sian tipan aŭ kutiman okupon. Kiam oni aldonas ĝin al substantivo, ĝi formas substantivon kun la signifo de homo, kiu laboras pri la specifa aĵo, aŭ kiu ludas la specifan sporton:

- **aida** – helpi → **aidor** – helpanto
- **deteta** – detekti → **detetor** – detektivo
- **dirije** – direkti → **dirijor** – direktoro
- **fumi** – fumi → **fumor** – fumanto

- **gania** – gajni → **ganior** – gajnanto / gajninto
- **jogla** – ĵongli → **joglor** – ĵonglisto
- **parla** – paroli → **parlor** – parolanto
- **pexa** – fiŝkapti → **pexor** – fiŝisto
- **carne** – viando → **carnor** – viandisto
- **vaso** – vazo → **vasor** – vazisto
- **futbal** – futbalo → **futbalor** – futbalisto
- **tenis** – teniso → **tenisor** – tenisisto

-ador signifas ”-ilo”. Ĝi kreas nomojn kun la signifo de ilo aŭ maŝino, kiu faras la specifan agon, aŭ kiu laboras pri la specifa aĵo:

- **caldi** – hejti → **caldador** – hejtilo
- **computa** – komputi → **computador** – komputilo
- **fax** – faksi → **faxador** – faksilo
- **lava** – lavi → **lavador** – lavmaŝino
- **parla** – paroli → **parlador** – laŭtparolilo
- **surfa** – foliumi (TTT-paĝojn) → **surfador** – foliumilo / TTT-legilo
- **umidi** – humidigi → **umidador** – humidigilo

-eria respondas al ”-ejo” en Esperanto. Oni aldonas ĝin al substantivo aŭ verbo por krei substantivon, kiu indikas lokon, ofte vendejon, ligita al la specifa ago aŭ aĵo:

- **cafe** – kafo → **caferia** – kafejo
- **pan** – pano → **paneria** – panvendejo
- **beli** – beligi → **beleria** – kosmetikejo
- **campana** – sonorilo → **campaneria** – sonorilturo

- **fruto** – frukto → **fruteria** – fruktarbaro
- **monce** – monaĥo → **monceria** – monaĥejo
- **planeta** – planedo → **planeteria** – planetario
- **xef** – ĉefo / estro → **xeferia** – ĉefsidejo

-ia respondas al ”-eco” en Esperanto. Ĝi formas abstraktajn substantivojn, kiuj servas kiel la nomoj de ecoj. Kiam oni aldonas **-ia** al vorto, kiu finiĝas per **-ia**, la vorto ne ŝanĝiĝas:

- **ajil** – movlerta → **ajilia** – movlerteco
- **felis** – feliĉa → **felisia** – feliĉo
- **jelosa** – ĵaluza → **jelosia** – ĵaluzo
- **neutra** – neŭtrala → **neutria** – neŭtraleco
- **madre** – patrino → **madria** – patrineco
- **enfante** – infano → **enfantia** – infaneco
- **sultan** – sultano → **sultania** – sultaneco
- **fria** – malvarma → **fria** – malvarmeco
- **vea** – maljuna / maljunulo → **veia** – maljuneco

Vortoj kiel **enfantia** kaj **sultania** povas indiki tempojn aŭ lokojn, en kiuj la eco ekzistas.

Ankaŭ la nomoj de multaj studkampoj finiĝas per **ia** (aŭ **ica**), sed tio estas parto de la radiko, kaj ne sufikso. La nomojn de la respondaj praktikistoj oni formas per **-iste**. Oni uzas **-iste** ankaŭ por formi la nomojn de kredantoj je religio aŭ filozofio (kiel derivite de [la adjektiva sufikso -iste](#)), la nomojn de muzikistoj, kaj la nomojn de iuj aliaj homoj, kiuj finiĝas per ”-ist-” internacie:

- **jeografia** – geografio → **jeografiste** – geografo
- **psicologia** – psikologio → **psicologiste** – psikologo
- **cimica** – kemio → **cimiciste** – kemiisto
- **eletrica** – elektro → **electriciste** – elektristo
- **musica** – muziko → **musiciste** – muzikisto
- **Crixna** – Kriŝno → **crixnaiste** – kriŝnisto
- **ideal** – idealo → **idealiste** – idealisto / idealisma
- **gitar** – gitaro → **gitariste** – gitaristo
- **solo** – solo → **soliste** – solisto
- **jornal** – ĵurnalo → **jornaliste** – ĵurnalisto
- **sicle** – ciklo → **sicliste** – biciklisto

-isme formas la nomojn de kredsistemoj, anstataŭante **-iste** en la nomo de la kredanto. Ĝi aperas ankaŭ en iuj aliaj vortoj, kiuj finiĝas per ”-ism-” internacie:

- **dauiste** – taoisto → **dauisme** – taoismo
- **altruiste** – altruisto / altruista → **altruisme** – altruismo
- **raziste** – racisto → **razisme** – racismo
- **sindicatiste** – sindikatisto → **sindicatisme** – sindikatismo
- **turiste** – turisto → **turisme** – turismo
- **simbol** – simbolo → **simbolisme** – simbolismo
- **canibal** – kanibalo → **canibalisme** – kanibalismo

Malpli produktemaj sufiksoj

La jenajn sufiksojn oni aplikas nur al specifaj vortoj, kiel difinite en la vortaro.

Oni aldonas **-eta** al iuj substantivoj por krei nomon por versio de io, kion oni malpliigis en aparta maniero. Tio inkluzivas la nomojn de bestidoj kaj internaj vestaĵoj. Simile oni povas aldoni **-eta** al kelkaj verboj kaj adjektivoj por krei vortojn por malpliigitaj versioj de agoj kaj ecoj:

- **bebe** – infaneto → **bebeta** – novnaskito
- **caro** – ĉaro → **careta** – ĉarumo
- **imaje** – bildo → **imajeta** – miniaturo
- **lente** – lenso → **lenteta** – kontaktolenso
- **mone** – mono → **moneta** – monero
- **orolojo** – horloĝo → **orolajeta** – brakhorloĝo
- **bove** – bovo → **boveta** – bovido
- **ovea** – ŝafo → **oveta** – ŝafido
- **calsa** – ŝtrumpo → **calseta** – ŝtrumpeto
- **camisa** – ĉemizo → **camiseta** – subĉemizo / T-ĉemizo
- **jaca** – jako → **jaceta** – veŝto
- **pluve** – pluvi → **pluveta** – pluveti
- **rie** – ridi → **rieta** – subridi / hihii
- **parla** – paroli → **parleta** – babili
- **bela** – bela → **beleta** – beleta

Oni aldonas **-on** al iuj substantivoj por krei nomon por versio de io, kion oni pliigis en aparta maniero. Tio inkluzivas la nomojn de eksteraj vestaĵoj:

- **abea** – abelo → **abeon** – burdo
- **caxa** – skatolo → **caxon** – kesto
- **dente** – dento → **denton** – dentego

- **dito** – fingro → **diton** – dikfingro
- **padre** – patro → **padron** – patriarko / ĉefo
- **sala** – ĉambro → **salon** – salono
- **seja** – seĝo → **sejon** – fotelo
- **calsa** – ŝtrumpo → **calson** – kalsonŝtrumpoj
- **jaca** – jako → **jacon** – palto / mantelo

-eta kaj **-on** ne estas sinonimoj de **peti** kaj **grande**: oni certe povas havi **un careta grande** aŭ **un salon peti**. Anstataŭe ili formas vortojn kun specifaj novaj signifoj, kiujn oni povas nebule priskribi kiel pli etajn aŭ pli grandajn versiojn de la origina afero.

Oni aldonas **-o** kaj **-a** al kelkaj [substantivoj indikantaj familianojn](#), por ŝanĝi la signifon inter viro kaj ino respektive:

- **tio, tia** – onklo, onklino

La nomojn de kelkaj arboj oni formas ŝanĝante la finan **-a** de la nomo de la frukto aŭ nukso al **-o**:

- **pera** – piro → **pero** – pirarbo

Oni aldonas **-esa** al kelkaj [substantivoj indikantaj historiajn virajn sociajn rolojn](#) por formi la inan ekvivalenton:

- **prinse** – princo → **prinsesa** – princino

Fakaj afiksoj

Internaciajn sciencajn kaj medicinajn terminojn oni formas el latinaj kaj grekaj fontoj per granda nombro da fakaj prefiksoj kaj sufiksoj. Ĉi tiujn afiksojn oni uzas ankaŭ en Elefeno, kaj ili sekvas la transskribajn regulojn de Elefeno.

Kiam oni uzas prepozicion kiel fakan prefikson, ĝi sekvas la saman regulon kiel **supra-**: se ĝi havas pli ol unu silabon kaj finiĝas per vokalo, kaj la resto de la vorto komenciĝas per la sama vokalo, tiu vokalo aperas nur unufoje (**contra+ataca** → **contrataca**).

La sufiksoj **-i** kaj **-uple** estas uzataj por nomi [onojn](#) kaj [oblojn](#).

Kunmetitaj substantivoj

Kunmetitan substantivon oni povas formi kombinante verbon kun sia objekto, en tiu ordo. La rezulto signifas ulon aŭ aĵon, kiu faras la specifan agon al la specifa objekto:

- **corti, ungia** – tondi, ungo → **cortiungia** – ungotondilo
- **covre, table** – kovri, tablo → **covretable** – tablotuko
- **fura, bolsa** – ŝteli, mansaketo → **furabolsa** – poŝoŝtelisto
- **lansa, petra** – ĵeti, ŝtono → **lansapetra** – katapulto
- **para, morde** – haltigi, mordi → **paramorde** – buŝumo
- **para, pluve** – haltigi, pluvo → **parapluve** – pluvombrelo
- **pasa, tempo** – pasigi, tempo → **pasatempo** – ŝatokupo
- **porta, mone** – porti, mono → **portamone** – monbilujo
- **porta, vose** – porti, voĉo → **portavose** – preparolanto
- **brinca, dorso** – salteti, dorso → **brincadorso** – ŝafsaltado
(la ludo, nomita laŭ siaj ludantoj)

Kiam la objekto komenciĝas per vokalo, oni retenas tiun, krom se ĝi estas sama kiel la fina vokalo de la verbo, kiel en **portavion**.

En Elefeno, du sinsekvaj substantivoj ne formas kunmetaĵon. Anstataŭe oni metu prepozicion inter la du nomojn. Ekzemple:

- avia **de** mar – marbirdo
- casa **per** avias – birdejo
- xef **de** polisia – poliestro

En maloftaj okazoj, tia esprimo havas apartan signifon nelaŭvortan, kaj oni rigardu ĝin kvazaŭ unu fiksitan vorton. Ekzemple, **leon-de-mar** (marleono) ne estas leono. En tiaj okazoj, oni kunigas la vortojn per dividstrekoj, kaj adjektivoj sekvas la duan substantivon. Oni povas uzi dividstrekojn ankaŭ ĉe pli laŭvortaj kunmetaĵoj, se ŝajnas pli klare tiel:

- un **leon-de-mar** grande – granda marleono
- un **leon** grande **de mar** – granda leono de la maro
- un **avion** grande **de mar** – granda hidroplano (*ĉar hidroplano estas speco de aviadilo*)
- un **avion-de-mar** grande – granda hidroplano (*alternativo*)
- un **avion de mar** grande – granda hidroplano (*dusenca, ĉar ĝi ŝajne volas diri, ke grandas la maro*)

Mallongigoj

Oni mallongigas plurajn oftajn vortojn aŭ vortgrupojn. Oni ĝenerale uzas majusklojn en mallongigo, kiu restas mallongigita en la prononco:

- **acc.** (ance conosedada como) – ankaŭ konata kiel
- **AEC** (ante la eda komun) – aKE (antaŭ la komuna erao), a.K. (antaŭ Kristo)
- **EC** (de la eda komun) – KE (komuna erao) / p.K. (post Kristo)
- **etc.** (e tal cosas, e tal continuante) – ktp (kaj tiel plu)
- **LFN** – LFN (Lingua Franca Nova)
- **n.** (numero) – n-ro (numero)
- **NB** (nota bon) – NB (notu bone)
- **OVN** (ojeto volante nonidentifiada) – nifo (neidentigita fluganta objekto)
- **p.** (paje, pajes) – p. (paĝo, paĝoj)
- **pd.** (per dise) – t.e. (tio estas)
- **pe.** (per esemplo) – ekz. (ekzemple)
- **pf.** (per favore) – bv. (bonvolu)
- **PS** (pos scrive) – PS (postskribo)
- **TV** (televisa, televisor) – TV (televido, televidilo)
- **v.** (vide) – v. (vidu: por enkonduki referencon al alia teksto)

Elefeno retenas ankaŭ kelkajn alilingvajn mallongigojn, kiuj internacie rekoneblas, inkluzive de la normaj mallongigoj por la metraj unuoj:

- **CD** (disco compata) – KD (kompakta disko)
- **PC** (computador personal) – PK (persona komputilo)
- **cm** (sentimetre) – cm (centimetro)
- **km** (cilometre) – km (kilometro)
- **mg** (miligram) – mg (miligramo)
- **µm** (micrometre) – µm (mikrometro)
- **MB** (megabait) – MB (megabitoko)

La mallongaj formoj de propraj nomoj kaj titoloj uzas majusklojn. Sed oni ne inkluzivas en la mallongigo malgravajn vortojn kiel **la** kaj **de** – kiuj estas minusklaj en la plena formo de la nomo. Tiajn nomojn oni ofte enkondukas per **la**, eĉ kiam mallongigitaj:

- **Dr** (dotor) – d-ro (doktoro: kiel parto de ies nomo)
- **Sr** (senior) – s-ro (sinjoro: kiel parto de ies nomo)
- **Sra** (seniora) – s-ino, f-ino (sinjorino, fraŭlino: kiel parto de ies nomo)
- la **NU** (Naciones Unida) – la UN (Unuiĝintaj Nacioj)
- la **RU** (Rena Unida) – the Unuiĝinta Reĝlando
- la **SUA** (Statos Unida de America) – Usono (la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko)

Oni plej bone konas kelkajn propraj nomojn internacie kiel netradukitajn mallongigojn, kaj ĉi tiujn Elefeno retenas:

- **IBM** – IBM (International Business Machines Corporation)
- **KGB** – KGB (Комитет государственной безопасности, Komitato por Ŝtata Sekureco)

Interpunkcio

Ĝenerale Elefeno lasas la interpunkcian elekton al la verkisto – la solaj normoj estas, ke oni estu klara kaj konsekvenca. Kelkaj bazaj konvencioj ekzistas tamen, samaj kiel en plej multe de eŭropaj lingvoj.

La unua vorto en frazo komenciĝu per [majusklo](#).

Ĉefaj interpunkciiloj

Ordinara frazo finiĝas per **punkto** (.).

Se frazo estas rekta demando, ĝi finiĝas per **demandosigno** (?).

Oni povas uzi **krisignon** (!) fine de frazo, kiu parole havus ian emocian intenson.

Komo (,) indikas naturan paŭzon en frazo, aŭ foje oni inkluzivas ĝin nur por klare apartigi unu parton de frazo (kiel ekzemple propozicion) disde alia. Oni uzas komojn ankaŭ por apartigi la erojn en listo.

Kiam oni skribas nombron per ciferoj, oni povas uzi aŭ komon aŭ punkton por signi la komencon de la frakcia parto. Oni povas uzi spaceton por apartigi grupojn de po tri ciferoj.

La **dupunkto** (:) enkondukas pli detalan prezenton de tio, kio staras antaŭ ĝi. Post dupunkto uzu majusklon, se la sekvaĵo estas

kompleta frazo, sed ne se ĝi estas nur listo aŭ parto de frazo.

Oni povas uzi la **punktokomon** (;) anstataŭ punkto inter du frazoj, kiuj reciproke spegulas aŭ ekvilibrigas sin proksime. Punktokomo povas ankaŭ apartigi la erojn en listo, se tiuj estas longaj aŭ enhavas la proprajn komojn.

Ne skribu spaceton antaŭ ĉefa interpunkciilo. Sed skribu spaceton poste, krom ĉe la fino de alineo.

Citiloj

Citilo aperas komence kaj fine de vortoj, kiujn oni prezentas kiel rektan citaĵon. Estas diversaj formoj de citiloj en la mondo, inkluzive de ' " <...> «...».

En Elefeno, oni normale uzas la formon " , kiu estas klara, facile tajpebla, kaj internacia. Kiam citaĵo aperas ene de alia citaĵo, oni metas ' ĉirkaŭ la internan citaĵon – ekzemplo troviĝas ĉi-sube. En bona tipografio, oni uzas la kurbajn formojn "" kaj '' , sed tiuj ne necesas en ordinaraj komunikoj. Ne metu spacetojn inter la citiloj kaj la citata teksto.

En iuj lingvoj, oni skribas haltostrekon (—) meze de dialogo, kiam nova persono komencas paroli, anstataŭ citiloj. Ni rekomendas eviti tion en Elefeno, ĉar ĝi estas malpli klara kaj oni povas konfuzi ĝin kun aliaj uzoj de haltostrekoj.

Kiam oni citas la vortojn de karaktero en rakonto, oni ofte akompanigas la citaĵon per indikilo de la parolanto kaj ties

maniero. Por tiaj frazoj en Elefeno, oni preferas meti haltostrekon inter tiu indikilo kaj ĉiu parto de la citaĵo. Tiamaniere oni facile retenas la precizan interpunkcion de la origina frazo:

- La vendor murmura – “Ma lo no es tan simple, mea ami.”
- “Me acorda.” – la om responde felis.
- “Perce tu es asi?” – la fem demanda.
- “Cisa” – la bonvolor sujesta – “me pote aida.”
- “Me ave un ami nomida Freda,” – el esplica – “ci es un tortuga.”

Kiam oni skribas pri lingvoj kaj citas vorton aŭ esprimon por mencii ĝin, oni uzas nur citilojn:

- Me gusta la parola “xuxa”.
- Sua sposa ia comenta – “Me gusta la parola ‘xuxa’.”

Kromaj interpunkciiloj

La **tripunkto** (...) sugestas paŭzon, aŭ indikas, ke oni ellasis kelkajn vortojn.

Haltostrekoj (– o —) kaj **krampoj** ((...)) entenas komentojn enkondukitajn en la normalan fluon de frazo.

La **apostrofo** (') indikas, ke oni ellasis vokalon. Normale ĉi tio okazas nur en verso.

En Elefeno, oni skribas **valutsimbolojn** (€, ¥, £, \$, ktp) antaŭ aŭ post la ciferoj de prezo, laŭ la kutimo de la koncerna lando.

Ekzistas ankoraŭ aliaj interpunkciiloj, sed ilia uziĝo apenaŭ rilatas al la reguloj de Elefeno.